EDMOND PRIVAT:

# INTERPOPOLA KONDUTO

LITERATURA
MONDO

Ĉi tiu libro estas la kvardeksesa libro, eldonita de Literatura Mondo kaj la unua volumo de la arto-scienca serio de AELA 1935.

F. kiadó: Bleier Vilmos — Pestvidéki Nyomda Vácon — F. v. Bénik Gyula

EDMOND PRIVAT:

# INTERPOPOLA KONDUTO

1935
ELDONIS LITERATURA MONDO, BUDAPEST

## *TEMO KAJ CELO*

Tiu ĉi libro estas frukto de multjara observado kaj aperis en 1931 en la franca Filozofia Kolekto Felix Alcan en Parizo. La nuna reverko en Esperanto ne aldonis ian mencion pri faktoj okazintaj dum la postaj jaroj. Ili ne ŝanĝus ion al la sufiĉa instruo de la ĝistiama Historio tra sinsekvaj centjaroj. Tial bonvolu legantoj unue legi la antaŭparolon.

La celo ne estis esprimi partian opinion, sed ekzameni faktojn sur psikologia kampo ne sufiĉe atentata. Kiuj ŝatas insultojn, tiuj ne legu ĝin. Ili ne trovos ion por nutri pasion. Ne ofendi, sed pripensigi, jen la intenco: Kiel homoj kondutas de nacio al nacio? Kiel ili sentas are?

Ĉu Historio povas esperigi sur tiu kampo ian progreson etikan, tion esploras la persona konkludo. Kiu de l' frua knabeco jam aŭdis la homarajn alvokojn de Zamenhof kaj observis la kontraston kun kruda realo, tiu neniam povis forlasi temon konstante sin trudinta al observemo.

Locarno, Pasko 1934.

*E. P.*

Esper. 513 I
I-18779
BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

# ANTAŬPAROLO

Tiu ĉi libro montras observitajn faktojn. Verkinte pri la historio de polaj ribeloj kaj pri slavaj nacioj batalintaj por libereco, la aŭtoro sidis kiel konsilanto ĉe kvar kunvenoj de la Ligo de Nacioj kaj notis siajn impresojn.

Ĉiuj centjaroj aperigas kontrastojn. La XX-a estos ja vidinta du fortajn klopodojn en kontraŭaj direktoj: apartiĝo kaj kuniĝo de nacioj. Ambaŭ naturaj.

En Azio, kiel en Eŭropo, la popoloj emas al plena liberiĝo el fremda rego. Sendependaj ili fariĝas. Samtempe sian internacian vivon ili provas organizi. Tasko malpli facila!

Sur la vojo al memrego klare brilas la baro: unu premanto kiel sola pafcelo. Kontraŭ ĝi fajras ĉiuj lumoj.

Sur la vojo al federacio, malpli nete vidiĝas la baroj. En mallumo ĉiuflanke aperas ili. La plej grava nomiĝas: timo. Estas eĉ ne certe, ĉu oni ĉiam deziras antaŭen veturi.

Ankaŭ reiri ŝajnas danĝere. Tial oni piedumas ofte kiel opera ĥoro surloke restanta kaj kadence levanta la kruroјn laŭ milita kanto: »Antaŭen! Iru ni, marŝu ni, paŝu ni, senĉese antaŭen!...

La ekonomia flanko de tiu kontraŭeco ricevis abundan studon. Ankaŭ la politika. Eĉ la jura. Sed restas alia flanko malpli esplorita. Estas tradicioj, moroj, hereditaj ideoj, kolektivaj emocioj, vasta reala mondo ne pli forgesinda ol la mondo de ciferoj. La vivo miksas ĉion, enligas ĉion en sia konstanta fluo.

Por ekkompreni tion, kio akazas en Azio aŭ en Okcidento, necesas aŭdi, kion la homoj manĝas tie, kion ili gajnas. Necesas ankaŭ aŭdi, kion ili kredas.

Ĉu la unu dependas de l' alia? tiam eĉ pli necesas ekstudi ambaŭ, Kial? Ĉar unu ŝanĝiĝas antaŭ alia kaj trovas ĝin baranta la vojon. Aŭ male.

Kondiĉoj novaj kontraŭ kutimoj hereditaj. Sentoj malnovaj kaj bezonoj kontraŭaj. Kolektivaj pasioj. Moralo enlanda kaj moralo nacia en interbatalo. Ĉu tio ne meritas esploron?

La virinon interesas la temo eĉ pli ol la viron, kiu forgesas tiun muron kaj rompas sian nazon. Se la legantoj bonvolas iom peni por eliri el si mem kaj rigardi la mondon, ŝanĝante lokon en ĉiu momento, eble tiuj paĝoj helpos ilin pli bone kompreni la moviĝantan realon ĉirkaŭ si.

Por ĝin ekvidi, necesas turni konstante la binoklon kaj rigardi per ambaŭ flankoj.

Se la mondo nur konsistus el anĝeloj kaj friponoj, ĉio estus ja multe pli simpla. Sed nek unu, nek alia ni estas entute.

Malpli komplikas la situacion la escepta krimulo, kiu vin izole doloriĝas, ol la bonaj homoj, kiuj vin suferigas amase kredantaj eĉ agi prave.

Valoras do serĉi la kialon. Facile vi diras, ke sufiĉus ŝanĝi la koron de l' homo por alvenigi la pacon definitivan. Historio pruvas alion. Necesas krome, ke la homo lumigu sian inteligenton kaj adaptu siajn organizojn. Sen tio lia plej heroa virto servas nur la kolektivajn pasiojn, kiuj ŝtopas liajn okulojn.

La hereditaj kutimoj kuntrenas la korojn. La sentoj ligiĝas al ekzistantaj organizoj.

Ni rigardu la spertojn kaj provu eklegi en animo de popoloj, kien tempo fluanta ĉion enskribas.

Junio 1931.

## 1.
## ANIMO NACIA

*Naciana religio — Patrujo kaj ŝtato — Korpo kaj animo — La ĉefa kredo — Clémenceau — Valéry pri patrujo — Johanino Lotringa — Kresko de individua ekzistado — Formado de l' animo nacia*

En la dudeka centjaro post Jesu-Kristo, Azio pruntas el Okcidento ties ĉefan kredon.

Ne kristanismo ĝi estas, sed naciismo. Tiu kredo rigardas la ŝtaton kvazaŭ korpon kaj la patrujon kvazaŭ animon.

Oni povas imagi la unu sen l' alia. Trudita kreaĵo politika, jen korpo sen animo. Premata nacio, jen animo sen korpo.

La Ligo de Nacioj ekzistas tiom, kiom ekzemple la svisa konfederacio. Sed unu estas nova kaj serĉas animon. L' alia forĝis la sian tra centjaroj.

Polujo persistis pli ol centjaron kvazaŭ sen korpo aŭ pli vere sur ĉerko de krucumito. Ĝia volo vivi renaskis ŝtaton.

Neniam ĉesis la homoj krei por si diojn laŭ bildo de si mem. Nenia homa organizo kreskas sen ia mistiko.

Ĉirkaŭ limŝtono flugetadas papilio de floro al

floro. Ĝi ne suspektas landlimon ignoratan de naturo. Sed la homoj havas propran historion kaj memoras pri ĝi.

Ili vivas en gentoj. Unua patrujo de l' infano estas la patrino. El ŝi li apartiĝas kun timo, kaj ekkonscias malrapide pri ekzisto sendependa. Kiam li akiris tiun iluzion, li jam devas ĝin perdi.

Unue familio. Poste patrujo. Al ĝi li devas reporti la filan amon kaj la sopiron al varma rifuĝejo.

Se venos milito, li devos al la patrujo la vivon mem oferi. Laŭ tiu mezurilo jam li komprenas, ke tio estas la ĉefa religio ĉirkaŭ li.

Kiu kredo plej multe postulas, tiu plej multe gravas.

Nacian konscion oni kulturas en lernejo, en preĝejo, en la hejmo, en gazetaro, en armeo. Per ĝi la homo super si mem altiĝas. Per ĝi li partoprenas en estaĵo multobla kaj dia.

Naskiĝa tero fariĝas templo, gepatra lingvo kvazaŭ komunio, nacia flago kvazaŭ sanktaĵo, ŝtata himno kvazaŭ preĝo kaj milito jam ofero sur altaro.

Tiuj profundaj emocioj kortuŝas eĉ la plej skeptikajn. Tiu mokema sendiulo, nomita »La Tigro«, ekploradis aŭdante *La Marseillaise*. Pie li konservis eĉ saketon da nacia tero. Kiam estis minacata la korpo de l' patrujo, li per tuta kredo laŭdegis ĝian animon.[1])

Paul Valéry pentras tiun amon, vekitan per milito:

»Multaj en sia koro miris tiom ami sian landon; kaj same kiel neatendita doloro vekas ĉe ni profundan konon pri nia korpo kaj lumigas al ni realaĵon nature nesenteblan, tiel same la fulmotondra

1) »La tigro« estas *Clemenceau*.

eksento pri la ekzisto de l' milito aperigis kaj rekonigis al ĉiuj la realan estadon de tiu patrujo, tiu nedirebla io, tiu aĵo nedifinebla senpasie, kiun identigas nek raso, nek lingvo, nek tero, nek interesoj, eĉ ne historio: kiun analizo povas eĉ nei, sed kiu similas (ĝuste per tio kaj per ĝia pruvita tutpotenco) al amo pasia, al kredo, al iu el tiuj misteraj posedoj, kiuj kondukas la homon tien, kien li ne sciis, ke li kapablas iri — trans sin mem. La sento pri la patrujo estas eble samspeca kiel doloro, kvazaŭ malofta kaj stranga ekkonscio, kiu kaptis kaj skuis sub niaj okuloj eĉ la plej malvarmajn, la plej filozofajn, la plej racie liberajn.«[1])

En aneksita lando, la patrujo estas spirito. Por kompreni tion, necesas vidi popolon suferanta.

Gardas polico. Kurtenojn oni fermas. Kvazaŭ sanktaĵon oni kisas flagon malpermesatan. Lingvo fariĝas simbolo.

Sub caro en 1861 l' amaso senarma de Varsovianoj ekkantis la polan himnon por esti buĉata. En Galicio, la rutenoj sin ĵetis antaŭ vagonaron por havigi surskribaĵon en ukrajna lingvo.

Ateno, Sparto kaj Romo konis la senton civitan. Dum la Mezepoko la nacia konscio ankoraŭ ne floris en Francujo. La pacemaj burĝoj elliveris Johaninon, kiu ĝin vekadis. Eĉ anglan reĝon ili estus akceptintaj.

La Eklezio ŝin bruligis, ĉar senpermese ŝi miksis Dion al tera patrujo. Nun la sanktulinon ĝi honoras kaj ĉiujn bravulojn, kiuj donis sian vivon por certigi korpon al tia patrujo.

[1]) Parolado de Paul Valéry, la poeto, ĉe solena akcepto de marŝalo Pétain en la Francan Akademion (27 Januaro 1931).

Kiam ĝi havas la korpon, tiam ĝi ekvivas kiel ŝtato. Nova ekzistanto inter popoloj, ĝi havas emojn, bezonojn, deziron preni kaj posedi. Tute same kreskas vivo besta aŭ infana. Ekzisto fizika turnas sin al intereso, kapto kaj konservo, envio kaj defendo. La korpo batalas por vivo.

Kaj animo sekvas. En tiu batalo aperas la reagoj de l' menso, konataj en ĉiu ekzisto individua: ambicio, ĵaluzo, timo, memadmiro. Ili kuniras kun la volo vivi.

Animo de nacio formiĝas el ties sentoj kaj rememoroj, antaŭ ĉio la defendo.

Plej forte dum milito regas la sento nacia. Eĉ la miraklon de l' *sankta unueco* ĝi ebligas.[1])

Dum paco l' animo kolektiva estas malpli streĉita,[2]) sed ĝi konservas la postsignon de la krizoj, dum kiuj ĝi vibris. Ĉu patrujo kontraŭ ceteraj montriĝas egoista, fanfarona, maljusta aŭ ignorema, pri tio ne tro zorgas tiuj, kiuj ĝin amas. Eterne ĝi defendas sin kaj sur la okuloj ili havas blindotukon.[3])

Amantoj de patrujo ne donas al ĝi animon ĉiam egalan aŭ eĉ tiel noblan kiel la ilia. Ĉu vi ne vidis blindiĝintajn gepatrojn igi sian filon dorlotita sentaŭgulo post malsano vivdanĝera, kiam ili riskis perdi lin tute?

Kion faras la homoj el sia dio nacia? Valoras iom pripensi tion. Unue observu.

[1]) En franca lingvo: *union sacrée* (paco inter partioj).

[2]) escepte dum revolucioj.

[3]) Ricevitaj suferigoj enskribiĝas profunde en la kolektivan animon kej poste ree elŝprucas en perfortaj manifestiĝoj. La venĝo celas kompreneble tiun, kiu suferigis, sed la senkonscia revenĝo trafas iun ajn, kiu survoje troviĝas.

## II.
## LA GENTO

*Genta moralo — Afrika ĉefo difinas krimon — Duobla moralo — Spionado heroa, spionado basa — Dia lokiĝo de patrujo — Premita popolo fariĝas premanta — Nekapableco vidi sin el ekstero — Refleksoj — Arma konkurado — Madariaga pri prestiĝo — Maljustaĵo suferita kaj repagata — Stampo — Kutimo — Logiko kaj relativeco*

Eĉ gentoj primitivaj instruas al infanoj regulojn de konduto faciligantajn al homoj la vivadon en socio. Multnombraj ekzistas ekzemploj de moralo altnivela ĉe popoloj indiĝenaj. En Afriko misiisto konstatis pli grandan sekurecon en vera centrolando de nigruloj ol en apudeco de l' urboj, kie ili najbaradas kun blankuloj.

Sed tiu moraleco kompreneble rilatas nur al la interno de la gento. Vi konas eble la respondon de l' afrika ĉefo, demandita, ĉu li punas kiel krimon la forrabon de alies edzino: »Certe, li diris, t. e. se iu forŝtelas edzinon de mia gento, ĝi estas krima. Sed, se mi kaptas edzinon de alia gento, ĝi ne estas krima.«

Pri naciaj aferoj la modernaj civilizitaj popoloj ankoraŭ staras sur tiu nivelo. Rigardu pri spionado kiel ekzemplo. Ĉu ĝi estas krimo? Sendube, se iu venas el

ekstero por promenadi ĉirkaŭ niaj armilejoj kaj fotografadi, ĝi estas hontiga. Sed, se ni sendas iun fari tion ĉe l' najbaro, ĝi estas heroa, kaj la kuraĝulo sukcesinta ricevas honorigon pro lia braveco.

Sed, en ara konduto, eĉ pli frape sin montras nia du-ŝranka moralo. Ĉe la fino de milito, premita popolo postulas kontentigon de siaj sopiroj en la nomo de l' principo pri nacieco. Apenaŭ gajninta sian propran unuecon aŭ liberecon, tuj ĝi rifuzas al ceteraj la rajton profiti la saman principon. Tuj ĝi klopodas akiri kiom eble plej multe da teritorio kaj aneksi alilingvajn loĝantarojn sen ia konsidero al iliaj preferoj.

Poste ĝi suferigas ilin ĝuste per la sama ĉikanado, pri kiu ĝi mem antaŭe plendadis... »Sed tio estas ja tute alia afero!« Tiun ĉi respondon vi aŭdos al ĉiu rimarko. KomprENeble ĝi estas alia afero kaj kia estas do la fundamenta diferenco? Ĝuste tia, kia difinis ĝin afrika ĉefo tiel trafe.

Estas ja nature, ke la homoj kreis sian dion nacian laŭ la propra bildo. Psikologio de l' amasoj — ankoraŭ tro malmulte progresinta scienco — trovas eĉ tre multajn okazojn, kiam ara konduto montriĝas rimarkinde malsupra je meza moralnivelo de la individuoj enkalkulitaj.[1])

Tamen impresas malpli la konduto mem ol la frapanta nekapableco eĉ imagi alian agmanieron. Individuo ja povas agi maljuste kaj poste rekoni tion, sed patrujo konas nenian malbonon, krom la suferata. Ĝi ne povas esti malprava, eĉ ne venkita. Nur legu ĝian historion en ĝiaj lernolibroj. Preskaŭ neniam ĝi perdis batalon, escepte kiam ĝin perfidis krimulo.

[1]) Ekzemple konsideru linĉadon (kiam civilizitaj blankuloj mort-turmentas ankoraŭ ne juĝitan negron).

Ĝi vere okupas lokon de dio. Ĝi estas maksimumo al si mem sufiĉanta kaj ne kapabla erari. La tuta moralo pri ĝi estas ŝuldata: servi ĝin kun amo. Ofero al la patrujo estas nobla devo. Ofero de la patrujo al ceteraj estas ne imagebla. Juĝo pri ĝi estas blasfemo. Ĝi povas eĉ esti punata kiel ŝtatperfido.

Reprenu la ekzemplon de premita popolo, fine liberiĝinta kaj poste premanta la ceterajn siavice. Sento pri justeco igis vin pledi por tiu popolo, dum ĝi suferadis. La sama sento vin igos defendi tiujn, kiujn ĝi nun ĉikanas. Neniam ĝiaj nacianoj kapablos vin kompreni. Hieraŭ vi estis amiko, hodiaŭ malamiko; nur tiel ili vidos kaj maltrafe cerbumos por malkovri kialon.

Via juĝo estas ekstera. Ilia sento estas interna rilate al ilia patrujo. Sub ties tegmento ili restas kaj ne povas ekvidi, al kio vi aludas. Ĉu vi estas *por* ili aŭ *kontraŭ* ili? Ĉu vi adoras ilian dion aŭ alian?

Dumlonge la homoj kredis, ke rondiras la suno ĉirkaŭ nia tero. Ĝin atestas ankoraŭ postsignoj en ĉiuj lingvoj. Kial do miri pri la limiteco de la prinaciaj religioj?

Por ke ne tiel estu sed alie, devas ekzisti kredo je io pli vasta aŭ la kapableco pense meti sin en la haŭton de l' najbaro. Meti sin tien nur per armeoj postulas malpli kreskintan cerbon.

Eniĝi en ĉemizon aŭ ĉapon de ceteruloj, imagi sin en ilia loko por ekkompreni, kiamaniere ili vidas aferojn, estas mensa ekzerco, kiu faciligas al ĉiu la vivadon en socio. Se ĝin provas malmulte la homoj, ankoraŭ pli malofte la nacioj! Vidu pri armiloj. Tiuj de l' najbaroj nin timigas. Ni aĉetas do pluajn aviadilojn kaj pluajn militŝipojn, »Tion postulas sekureco«.

Ke la najbaroj siavice maltrankviliĝos pri nia

aĉeto, tia ideo eĉ ne venas en nian cerbon. Kiam ili estos farintaj kiel ni mem kaj pligrandigintaj sian materialon pro timo al la nia plua, nur tiam ni maltrankviliĝos kaj denove kreskigos nian armilaron. Tio kompreneble ripetiĝos la fenomenon, kaj tiel plu, k. t. p. senfine. Refleksoj. Konduto besta. Cerbo mallarĝa. Tiel progresadis jam duoncentjaron la konkurado por armiloj. Se ĉiu, antaŭvidante la reagon de l' najbaro, estus timinta la proprajn aĉetojn kiel kaŭzojn de la ceterlandaj, ĉiu estus ŝparinta la elspezon, kaj la sekureco estus pli granda. Nur la vendistoj estus malpli profitintaj.

Ĉe la senarmigaj konferencoj, kunvokitaj por haltigi la konkuradon, ne regas tia logiko, tiom elementa. Eĉ se oni devos redukti, oni partoprenas kun la intenco konservi ĉiuokaze pli ol tiu alia.

Kion li konkludos el tiu intenco, tio ne ricevas eĉ konsideron, ankaŭ ne la eventuala malsukceso de la kunveno. Se iu ŝtatisto malsame rezonus kaj akceptus egalecon hontigan, li ja riskus famiĝi kiel perfidulo, aŭ almenaŭ kiel malvenkisto.

Intervenas ankaŭ demandoj pri prestiĝo. Madariaga komparas iujn ŝtatojn al senmoniĝinta kastelano, kiu nun devas kontentiĝi je tri servistoj. Sed akcepti kvazaŭ kontrakton, kiu trudus al li tian limon, tion li ne konsentas. Propran defalon li rifuzas subskribi.[1])

Dum jaroj elportas regno tre malvolonte la maljustecon de kontrakto brutale trudita de venkinta najbaro. Posta milito ŝanĝas la rolojn. Tiam la najbaro estas la venkito. Siavice oni trudas al li severajn kondiĉojn. Sed, se li plendos kaj rompos harmonion per

[1]) Salvador de Madariaga: Disarmament, p. 26 kaj 53.

siaj protestoj, jen forta surprizo kaj nekompreno ĝuste ĉe tiuj, kiuj neniam akceptis por si mem la staton de venkiteco.

Kie kuŝas logiko, racio, inteligento en ĉio ĉi? Ne serĉu ilin, kie mankas ili. Dezerta kampo tie. Ĉu vi serĉus racion, kiam vi frapetas lignon gratulante vin mem pri evitita malsano? Hodiaŭ ne kredebla ŝajnas al vi kruda superstiĉo aŭ naŭza kruelaĵo de la Mezepoko. Dume, por la homoj tiutempaj, ĝi estis vero nediskutebla.

Vi tro ignoras la stampon kaj kutimon. Potenco fortega. Pozitiva kaj negativa. Kiam ĝin subtenas sento sanktiga, ne sufiĉas unu tago por ĝin aliigi.

Enkonduki logikon en similan kampon estus kompleta revolucio. Uzante ĝin por ekmezuri la universon, Einstein eltrovis relativecon. Vi malkovrus tre parencan trovaĵon.

Tuj la bezonoj de l' aliaj nacioj aspektus tiom gravaj, kiom la niaj. Tuj alies rajto al feliĉa vivo fariĝus fundamenta por ni. La prinacia religio, en si mem enŝlosita, malfermus la fenestrojn. Etiko nova transkovrus ĝian tegmenton. La Olimpaj dioj estus trovintaj juĝistojn en Hago kaj superleĝon en la spirito de l' homoj. Kia renverso!

## III.
## *NACIA VANTECO*

*Fanfaronemaj homoj kaj nacioj — Pri eskimoj kaj hotentotoj — Filoj de l' suno — Centro de l' mondo — Laŭdado pri sia nacio — Karikaturado pri aliaj — Naciaj himnoj — Respektego kaj blasfemo — Memlaŭdaj kantoj — Grupaj sentoj — Prestiĝa rivaleco — Studentaj societoj — Asocioj diversaj.*

Unu elemento faciligas la vivon en socio, tio estas la kapableco ridi, eĉ pri si mem. Angloj nomas tion *sense of humour*. Inter individuoj la ridindeco haltigas la troan vantecon. Sed la prinacia religio ne konas tiun limigon. La sankteco de la diigita nacio malebligas al ĝiaj anoj ridi pri ĝi, se okaze. Kaj la mokoj de l' eksterlando pli ofendas ol instruas.

Tial unu nacio povas senpune permesi al si mem tiajn fanfaronaĵojn, kiuj jam dronigus iun ajn individuon sub ĝenerala gajiĝo.

La plej multaj popoloj sin taksas tre alte. Eskimoj nomas sin mem *la sukcesaj kreituloj* kaj nomas blankulojn *la malsukcesaj*. Ĉipeŭaoj diras: *malsprita kiel blankulo*. Hotentotoj sin titolas *la viroj el la viroj*. Indianoj el Hudsona Golfo: *la veraj ruĝuloj*. Unu popolo estas *filo de l' suno*, alia *la elektito de Dio*. La

sudamerikaj mbajaoj kredas sin »la plej nobla nacio en la mondo, la plej malavara, la plej lojale honesta kaj la plej kuraĝa«.[1]) Konkurantojn ili havas ankaŭ en Eŭropo.

Vere gajigan krestomation oni povus kunverki el gazetartikoloj kaj paroladoj ilustrantaj nacian vantecon. Ne nur la ŝaho de Persujo elektis la titolon centro de l' mondo. Paris estas *lum-urbo*, Ĝenevo *ĉefurbo de la nacioj*.

En la gazetaro de . . . . . , ni diru Balavujo por utiligi algebran *X* kaj ofendi neniun, plurfoje en ĉiu gazetkolono vi legas bone konatajn esprimojn: gesto vere balava, nobleco tute balava, kuraĝo tipe balava, ne forgesante la balavan honestecon, la balavan elegantecon kaj la nekompareblan brilon de Balavujo en la mondo.

La sola manko riproĉata de Balavujo al si mem estas kritiki sin tro facile. Vane vi serĉus ekzemplon de tio. Verdire ĝi estas la sola eco, kiu mankas al ĝi kaj al ĉiuj ceteraj. La Bruyère estus dirinta tion multe pli bone.

Eĉ la scienculoj de Balavujo plenigas siajn malfermajn prelegojn per laŭdegoj al la balava scienco, kvazaŭ povus ekzisti io alia ol scienco sen iu ajn adjektivo. Estas pluraj Balavujoj en la mondo.

Kaj kio estas vera pri Balavujo, tio estas ankaŭ vera pri multaj aliaj, kiuj vidas ĉi tie nur la portreton de l' najbaro. Balavismo sin kaŝas en ĉiu el ni. Ĝi estas komplekso de malsupereco. Vere supera popolo ne be-

[1]) *Azara:* Vojaĝoj en Sudameriko, citita de *Westermarck* en *Deveno kaj evoluo de moralaj ideoj.*

zonas fanfaroni. Nacia modesteco estas signo de alta civilizo, tre malofta.

En la nacia lingvo svarmas do la esprimoj neĝentilaj pri aliaj popoloj. Nomaĉojn krudajn aŭ ridigajn ili ricevas. Ilia simpla adjektiva nomo jam entenas fi-sencon. Se »gesto vere balava« signifas en Balavujo noblan agon, ĝi kredeble trans la limo signifas sentaktan konduton.

Se vi ŝteliras el hotelo forgesinte pagi la restadon, tion oni nomas en Francujo *filer à l'anglaise* (angle foriri) kaj en Anglujo *prendre congé à la française* (france adiaŭi). Eĉ la plej diskretaj apotekaĵoj estas nomataj »francaj« en Londono kaj »anglaj« en Parizo.

Ofte la naciaj himnoj rebriligas kolektivan vantecon kaj malamikecon al aliaj. Se iliaj vortoj estus lumbilde prezentataj sur teatra kurteno dum oficiala vizito de fremdlanda estro, li rajtus suspekti malbongustan ŝercon.

Oni povas kompreni, kial angla episkopo proponis ŝanĝi kelkajn versojn de *God save the King*. Ili sonas malĝentile kontraŭ la fremdaj ambasadoroj invititaj al *Guildhall*. Jam Tolstoj rimarkigis la ironion de la *Marseillaise*, kantata kontraŭ tiranoj tuj post la *Dio Ŝirmu Caron* en la tempo de la franca-rusa alianco. En kiom da naciaj himnoj ne troviĝas unu verso, kiu sonus iom maldece dum ceremonio de la Ligo de Nacioj?

Reale ĉiu afero posedas du kolorojn kontraŭajn. Ĉu el ekstero, ĉu el interno vi ĝin vidas? Ĉu el unu, ĉu el alia vidpunkto vi ĝin rigardas? Simbolo, ceremonio, ago de tradicia respekto povas al eksterulo aspekti treege komika. Tia vidaĵo tiklas eble lian

ridemon. Male, ĉe la enlandulo, ĝi vekas solenan senton. Estus danĝere lin ofendi. Ankaŭ kruele. Prudenton kaj bonvolon entenas la ĝentileco.

Ĉe tria ĉeestanto, la sama simbolo riskas eble kontraŭi alian senton el simila speco kaj kaŭzi ĉe li sanktan abomenon. Konsideru la diversajn sentojn pri objekto. Por iu: relikvo; por alia: ŝerco; por tria: blasfemo incitanta al indigno kaj kolero. La ŝildo sekta, desegnita sur muro, povas kaŭzi tiajn reagojn ĉe malsamaj ekvidantoj.

Kial fanatikulo disrompas idolon? ĉar alian li adoras en sia koro.

La saman fenomenon ilustras la »reputacioj« de la diversaj nacioj eksterlande juĝataj. Kiam ni estis infanoj, malsprita kantaĉo ripetiĝis en stratoj:

Rouge blanc noir,
Les Allemands font leur poire.
Rouge, blanc, bleu,
Les Français sont peureux.

Ĉiu rimo fremdan popolon malfavoris. Ĉe la lasta verso kompreneble la naciaj koloroj ebligis memgratulon

Rouge et Blanc
Les Suisses sont de braves gens.

Neniu lando monopolas tiujn knabajn azenaĵojn Folkloro konstatas la fakton.

Kun la gepatra lingvo ankaŭ plenaĝuloj heredas kliŝitajn juĝojn pri fremdaj nacioj. Estas karikaturoj, plej ofte priskribantaj tipon superŝarĝatan per ĉiuj negativaj trajtoj. Tiom malĝustaj ili estas kiom la mala bildo interne fabrikata kaj dike ŝvelanta je brilaj virtoj



BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

La plej multaj homaj grupoj produktas similajn fenomenojn. Tuj kiam ili ekstarigas sian apartan ekziston, ili aperigas samspecajn arajn sentojn. Rigardu ilian mistikon, la kolektivan vanteon, la ĵaluzon, la malestimon pri la ceteraj grupoj. Ne menciante partiojn, nur vidu la studentajn societojn.

Jen ili marŝas en procesio, kun rapiroj en pugno, kun flagoj flirtantaj, kun skarpoj koloraj brilantaj al suno! La verdĉapuloj havas proprajn solenajn tradiciojn. La flavĉapuloj havas la siajn. Fratetoj aŭ amikinoj de la verduloj nepre volas scii, ke ekzistas ja vera diferenco. Por ilin feliĉigi, necesas absolute, ke la flavuloj estu malpli literaturamaj aŭ malpli bravaj, aŭ ke la manieroj de la verduloj estu pli noblaj kaj pli elegantaj. Foje sin enmiksas ia klasa diferenceto, por akrigi la kontraŭecon.

Herediĝas tiuj tradicioj kaj antaŭjuĝoj de patroj al filoj. En certaj familioj oni ĉiam estis »verda« jam de generacioj. Veran ĉagrenon kaŭzus la studento al siaj gepatroj, se li aliĝus al la »flavaj« aŭ al »bluaj« anstataŭ al la »verdaj«. Tian fenomenon konas la sportaj unuiĝoj, ankaŭ la laboristaj.

Eĉ inter samcelaj grupoj, ekzistas tradiciaj sentoj kaj interbataloj por prestiĝo. Ili malhelpas kuniĝojn, ĉiuflanke deziratajn almenaŭ teorie. Tiu prezidanto, tiu sekretario estas aplaŭdata, ĉar li brile defendis la meritojn de la grupo kaj iel lerte malutilis al la alia. Neniom gajnis la komuna celo.

Ankaŭ ne la gratulito. Tute malavara povas esti lia fervoro. Gin li dediĉas al glorigo de sia grupo. Eble sin mem li forgesas, sed ankaŭ la celon. Se lia meminteresо ligiĝas kun la sinpuŝo de l' grupo, tiam fariĝas eĉ pli danĝere.

## IV.
## *NACIA VERO*

*Vero grupa — Objektiveco de scienco — Senpartieco de justeco — Iluzio privata — Vero pro amo aŭ pro malamo — Gazetaro — Lingvo — Antaŭjuĝoj — Malfido — Pasio — Nacia Historio — Vero en multnombro — Objektiveco ŝajnas mensoga.*

Ĉe rivalecoj inter grupoj, la ĉefa oferato estas la vero. La plej etan okazintaĵon ĉiu rakontas laŭ sia maniero. Ne nur tio. Inter la faktoj ĉiu elektas la plaĉantajn kaj emas memori nur tiujn, kiujn li ŝatas kredi. Poste li trograndigas ilin kaj traktas kiel mensogojn la flanke lasitajn.

Kiam alvenis al tio du homoj, ĉio fariĝas malfacila. Inter grupoj, estas multe pli malbone. Inter nacioj, katastrofe. Nenia societo povas kunteniĝi sen ia minimumo de komuna vero.

Por progresi pli antaŭen, scienco fariĝis publika. Ĝi komplete forlasis apartajn antaŭjuĝojn. La preferojn ĝi lasis al privata kampo. Neŭtrala kaj objektiva, ĝi ekzamenadas la faktojn sen atento je plaĉo aŭ malplaĉo. Al tio ĝi dediĉas sian propran lojalecon.

Ankaŭ la tribunala justeco estas publika.

De la individuoj ĝi forigas la privatajn iluziojn.

Ĝi subigas ilin al la ĝenerala vero, deviganta vidi ĉiujn faktojn per ĉies okuloj. La ĵurintaro devas konkludi pri la realeco de l' krimo antaŭ ol la juĝisto rajtas kondamni la kulpulon. Unue pruvi la okazintaĵon. Poste informiĝi pri la motivoj. Fine mezuri la kulpon kaj la domaĝon.

La scienco haltas ĉe la dua operacio. Ĝi ne juĝas, sed nur klasigas, kvazaŭ mortintaj estus la agintoj. Sed scienco kaj justeco ambaŭ kontrolas kaj esploras la faktojn. Ilia vero devas esti unu. Ambaŭ serĉas la evidenton, akcepteblan de ĉiu. Tial ambaŭ tiom zorgeme procedas: enketo, ekzameno, atestoj, aŭdo de du flankoj.

La privata iluzio konas nenion similan. Ĝi nur kredas. Ankaŭ la grupaj veroj estas kredaĵoj. La popolo estas edukata sen klopodo al scienca kontrolo. Certajn faktojn ĝi lernas. Aliajn ĝi ignoras kaj dum, ĝi koleras, ĝi ja volas ilin ignori. Multe ĝi preferas imagi faktojn pli respondajn al sia animstato.

Infano songas kaj bonafide mensogas. Popolo amas aŭ malamas. Al si mem ĝi mensogas en plena sincereco. Vi ridas pri lavistinoj ĉe vilaĝaj fontoj. Ili klaĉas kaj babilas. Ili laŭdas proprajn gefilojn, kalumnias najbarinon. Ĉiu popolo tiel agas.

En iliaj tribunaloj, eĉ la plej malinda krimulo ricevas oficialan defendanton. En ilia gazetaro male cent kalumniantojn rajtas havi najbara lando, sed neniun advokaton. Sola ŝanco, ke ĝia vidpunkto estu klarigita, kuŝas en korupto de iu perfidulo aŭ en soleca braveco de unu justulo. Cetere danĝerplena kuraĝo, ĉar la publiko rifuzos distingi la du motivojn.

Ĉiu homo dubanta pri la komuna vero aspektas mensogulo al okuloj de la grupo. Foje li fariĝas he-

roo al okuloj de l'translima grupo. Por la sia, li nur estas perfidulo.

Gazetaro kaj gepatra lingvo estas la potencaj disvastigiloj de la naciaj veroj. Dum la mondmilito aldoniĝis propagando. La neŭtralaj landoj ricevis inundadon.

En Svisujo la interbato de kontraŭaj klopodoj montris ilian vanecon. Sen ia propagando, la gepatraj lingvoj jam estis fiksintaj la limon inter la sentoj. Kiu parolas france, tiu vidis kune kun Francujo. Kiu parolas svisgermane, tiu dividiĝis, same kiel en Svedujo aŭ Nederlando la publika opinio. Iuj vidis kun Germanujo, aliaj malfidis ambaŭ flankojn kaj restis objektivaj.

Kiam alvenis propagando, ĝi nur malutilis sin mem. Mensoga malbonodoro naŭzis la nazojn. Oni ja emis kredi pro amo, ne laŭ mendo de ŝtatoj.

La vero pro amo aŭ pro malamo estas maltolerema kiel dogmo eklezia. Sur la tuta teritorio de granda lingvo ĝi posedas senapelacian aŭtoritaton. Kruelaĵoj, persekutoj, premado de popoloj, eĉ malvenkoj, ne estas eblaĵoj en la favorata tendaro.

Se gazeta redakcio riskus mencii tiajn aferojn, la ŝtonoj jam pafus al ĝiaj fenestroj. Negativaj historiaĵoj rajtas okazi nur en la kontraŭa tendaro.

Dum pactempo, apenaŭ malpli vi rimarkos tion. Almenaŭ unu nigran beston vidas ĉiu nacio, ĉu proksiman, ĉu malproksiman. En tiu landaĉo nenio sukcesas, sed ĉio estas danĝera. Ĉiumonate ĝia registaro estas falonta la venontan semajnon. Ne restas eĉ soldo en kaso. Ĝenerala ruino, malordo, bankroto. Samtempe armeo kolosa kaj industria konkurenco mortigminacan-

ta. Eĉ la plej frapantaj kontraŭdiraĵoj ne impresas la publikon.

Kiu zorgas pri logiko, ho vi naivulo, kiam parolas pasio? Jam de longe lingvistoj studas la uzon de l' homa parolo. Malofte ĝi servas por konigi ĝustajn faktojn. Tion faru matematiko. Lingvo estas ilo de pasio. Ĝi esprimas niajn sentojn. Ĝi blekas niajn amojn kaj kraĉas niajn indignojn. Aŭskultu iun ajn parolantan nature. La faktoj nur servas por pravigi ekkriojn.

Redakcioj havas du tirkestojn por depeŝtitoloj. Flataj dekstre, insultaj maldekstre. Elektu laŭ la deveno de la novaĵo. Se el la dorlotata lando ĝi venas, tiam taŭgos la plej belaj adjektivoj. Se el la alia, tiam ironia demandsigno. Laŭ la regno, bonflanka aŭ malbonflanka, ĉefministro nomiĝas »eminenta prezidanto« aŭ »tiu sinjoro«. Lia parolado fariĝas »lojala deklaro« aŭ »trompa ŝajnigo«.

Gazetaro disvastigas la eltranĉitajn citaĵojn, forigojn de vortoj. suspektigojn, rakontaĉojn kaj kalumniojn kontentigajn al la momenta animstato kolektiva. La plej basaj personaj ecoj de anonimuloj projektiĝas milionope sur paperon. Ĉar la gazetaro laboradas ambaŭflanke de landlimoj, vidu la danĝeron de apartaj veroj.[1])

Eĉ la nomo de popolo fariĝas sinonima kun »suspektinda«. En certa lando ĉian novaĵon el Balavujo ili tuj klasigas kiel malveran, escepte se ĝi anoncas katastrofon. Kelkajn jarojn pli poste, ne plu Balavujo, sed . . . Rotacujo ricevas oficon de nigra

[1]) Pri kleruloj en la servo de araj pasioj, vidu J. Benda: La perfido de la kleruloj *(La trahison des clercs)*.

besto. Tiam ili nur ŝanĝas la surskribon de la tirkestoj.

En lernejo vi lernas Nacian Historion, Fakte ĝi ne povas esti. Nur *historio de la nacio* povas ekzisti. Tute alia afero ĝi estas. Kion oni instruas, tio estas nur historio vidata de la nacio. Se oni ĝin instruadus *vidatan de la ceteraj*, tiam ĝi pli riskus esti ĉie sama, t. e. iom pli vera.

Se nur objektiva kaj malvarma ĝi estus, ankaŭ tio ne estus kompleta. Necesas ja scii, kiel la prapatroj komprenis aferojn. Sed same ni bezonas ekscii, kiel eksteruloj ilin sentis. Komparo de lernolibroj ebligas tion.

En ĉiuj landoj edukistoj ekatentis pri tio. Eĉ internaciajn konferencojn oni kunvenigis. Konstatinte la danĝeron de kontraŭaj veroj, ili provis malpliigi la diferencojn.[1])

El nacianista flanko tia klopodo ricevas malaprobon. Oni malkapablas vidi, kiom la nacio gajnos, se maloftiĝos eksterlanda kalumniado pri ĝi. Oni kredas nur, ke ĝi perdos liberecon nigrigi la ceterajn. Tial estas priskribita la klopodo al historia vero kiel »marŝo al mensogo«. Nur unu historio rajtas esti vera. Vi divenas kiu. Ĉiuj aliaj estas »nuraj fabeloj«. Ĉar en ĉiu nacio la samon oni diras, entute rezultas ia stranga multnombro, eĉ ridinda kakofonio. Sed nur malmulte ĝi maltrankviligas tiujn samajn lernestrarojn, kiuj instruigas la junularon pri tutmondaj leĝoj de fiziko.

En multaj lernejoj historio ankoraŭ ne estas scienco. Ĝi estas nura literaturaĵo. Ankaŭ la lernado

[1]) Vidu la enketon de la Carnegie Fondaĵo pri la lernolibroj. Paris 1923.

de fremdaj lingvoj, kiu povus utili al historio, ne estas turnita tiuflanken.

Tiu literaturaĵo estas ĉefe primilita. En ĝi la bataloj okupas la plej grandan lokon. Tion kune konstatis francaj kaj germanaj edukistoj, kunvenintaj en kongreso post la mondmilito. Ilin oni hontigis.

Oni timis, ke ili volas senigi la historion je lipharoj kaj muziko. Verdire nur tion ili postulis, ke ankaŭ la nombro de mortintoj estu menciata.

La vero scienca, eĉ literatura, entenas ankaŭ la historion de la pactempaj kutimoj. Vi ja lernas kiel vivadis la homoj kavernaj. Kion vi aŭdas pri la vivmaniero kaj laboro de niaj malpli foraj prapatroj? Riĉa estas la legendaro pri la dukornaj ĉapeloj de Napoleono. Kion oni instruadas pri la kamparanoj, burĝoj kaj metiistoj envarbitaj en liaj armeoj? Kion oni diras pri la loĝantaroj en la tempo de l' Renesanco aŭ de l' Mezepoko? Kompare nur malmulte[1])

Dume, pri sekretaj amoj de Henriko VIII aŭ Ludoviko XIV. ni konas ĉiujn detalojn, aŭtentikajn aŭ ne.

La nacia vero estas privata iluzio, nekompleta fabelo. Por vivi are, la homoj bezonas komunan veron. Por vivi en societo, ankaŭ la nacioj nepre ĝin bezonos. *La vero*, en unu simpla vorto, estas eble ambicia parolo. *Pli vasta vero* estu almenaŭ la proksima ŝtupo.

Kiuj ĝin serĉadis, tiuj ekŝajnis mensogistoj al okuloj de sia komuno. Sur punfajro niaj prapatroj

[1]) Vidu la raporton de F. Maurette al la Universala Kongreso de Pedagogiaj Asocioj en Genève 1928.

bruligis la unuajn pionirojn, kiuj malkovris ĝeneralajn principojn de fiziko kaj astronomio.

Rilate al naciaj veroj, senpartia historio ŝajnas ankoraŭ mensoga. En pli progresinta societo de grupoj, neeviteble renversiĝos la situacio.

Ke malrapida sin montras la fenomeno, tio estas facile komprenebla. Kalkulu pri la kutimoj, barantaj la tempon, kaj pri la diverseco de lingvoj, dividanta la spacon.

## V.
## *HOMOJ KAJ ŜTATO*

*Individua egoismo — Ara egoismo — Sindono al patrujo — Maria Terezia — Bismarck — Celo kaj rimedoj — Ŝtatistoj-advokatoj — Regnano-soldato — Konflikto inter du moraloj — Lernolibro pri bajoneto — Mortpuno — Ekzekutistoj — Rifuzantoj pro konscienco — Militistaj tribunaloj — Paca helpservo en Skandinavio — Ara indigno — Nacia zorgo super ĉio.*

Moralo por individuoj, moralo por regnoj, jen du aĵoj ankoraŭ tre malsamaj. Konstantaj memzorgo kaj memlaŭdo, trompo, senkompato kontraŭ aliaj, ĉio ĉi estas ja realo konata ĉe individuoj; tamen ĝi ofendas la ĝenerale akceptitan etikon. Ĉe filozofoj tia konduto ne havas multajn defendantojn. Ankaŭ ĉe lernoprogramoj ĝi ne servas kiel modelo.

Eĉ egoistaj kaj vantemaj homoj indignas pri sinpuŝo kaj fanfarono de la ceteraj. Ĉu vi deziras ja pruvon? Nu, malfermu politikan ĵurnalon aŭ legu ian afiŝon en voĉdona semajno. Ekzamenu la insultojn al kontraŭuloj.

Ĉe la publiko la plej ordinaraj uloj volonte bonvenigas kontraŭ samurbano kulpigojn pri mem-

intereso, hipokriteco, sinpuŝemo aŭ maldecaj moroj. Se ne helpas ilin tiu moralsento por ŝanĝi la propran konduton, ĝi servas ilin ĉiuokaze kiel mezurilo por juĝi la konduton de l' aliaj.

Amo al patrujo ne estas hipokrita ĉe l' plimulto de la homoj konfesantaj kaj predikantaj patriotismon. Kiam sincera, ĝi altigas la homon super lin mem. Tio estas pli ol nura frazo. Ilustraĵoj el historio atestas pri tio. Svarmas la ekzemploj de sinofero al patrujo, speciale dum militoj.

Kiu trompas la patrujon kaj liveras al armeo ŝuplandojn el kartono, tiu fariĝas io pli ol ŝtelisto. Vi, scias, kian furiozon povas ekkapti popolamaso ĉe tia suspekto. Dum paco tia kolero malpli facile vekiĝas. Kiu trompas la poŝtan aŭ impostan oficejon, ne estas juĝata tiel severe. Cetere, ankaŭ dum milito, la amo al patrujo ne supreniras ĝis subigo de ĉiuj privataj profitoj al ĝenerala bonfarto.

Escepte dum revolucia tempo, vi malofte vidas apliki por la progresigo de la regno aŭ forigo de mizero tiun kolosan entuziasmon kaj ondon de sinoferoj, kiu flamigas tutan popolon en komunan klopodegon.

Dum paco, la »sankta unueco« por igi la patrujon justa kaj »inda je siaj herooj«[1]) estas miraklo malfacile atingebla. Por ĝin provi, unu metodo estas krei atmosferon de ĝenerala savurĝo aŭ de danĝerzono, tre simila al la mentaleco dum-milita.

Kvankam nekompleta, la patriotisma etiko tamen entenas potencajn elementojn de heroeco kaj fervora

[1]) Esprimo uzita de ministro Lloyd George post la mondmilito.

sindono. Ili povas supreniĝi al tre nobla nivelo ĉe la homoj, kiuj altigas tiun senton super la propran vivon.

Ĝin altigi super la monhavaĵon estas io multe pli malofta. Rimarkinda fakto.

La ideo pri la devo civitana, la ekzemploj de fideleco, la lernita kutimo ion ami super si mem, jen punktoj kie la patriota idealo harmonias kun la plej alta persona etiko.

Sed ankaŭ formojn abomenajn al tiu moralo ĝi foje ricevas. Sendube ploris Maria-Terezia, hejme bonkora patrino, dum ĝi dividis Polujon kun Katarina kaj Frederiko. Sed ju pli ŝi ploris, des pli da teritorio ŝi prenis por Aŭstria Imperio.

La fera Kanceliero estis neriproĉebla familiestro kaj, en privata vivo, homo lojala kaj kompata. Sed por la gloro de Prusujo li agis foje, kiel li neniam estus aginta por si mem, eĉ en monaferoj.

La fama devizo *celo praviĝas rimedojn* montras la frapantan kontraŭecon inter du malaj etikoj. Unueco morala estas atingebla nur per ekkompreno de plia vero, t. e. ke *daŭrigataj rimedoj fariĝas celo per la forto de kutimo*. Sur tiu konstato bazas la tuta Gandhista movado kontraŭ uzo de perforto en Hindujo.

Ŝtatisto, eĉ por si mem malegoista, oferas siajn etikajn preferojn al la profito de la patrujo. Tiom pli facile, ĉar plejofte li estas juristo. Sian taskon li do vidas kiel rolon de kuratoro aŭ advokato. La sanktan aferon de siaj protektatoj li defendas. Por vidvino kaj orfoj li batalas. Ĉu li rajtas esti malavara kaj malavida pri ties bienoj? Jen lia klera senkulpigo.

Ambicia ŝtatisto eĉ ne bezonas tiom da klarigoj. Li kune defendas propran aferon kaj profiton. La translima nacio havas proprajn advokatojn tute same.

Guste tio donas al eksterlanda politiko tiun aspekton de senĉesa procesado kun la najbaroj. Se ĉiuj procesoj irus al juĝejo, ne tiel gravus, sed tiom longe, kiom armilaroj ebligas uzon de perforto, la disputoj preparas pli teruran konflikton, kuntrenontan milionojn da viroj: militon.

Tiu lasta krizo tuŝas multnombrajn estulojn kutimantajn respekti la vivon kaj abomeni mortigon kiel malsanktaĵon. Subite nun ili devos mem buĉi aliajn homojn individue senkulpajn.

En la XX-a centjaro tia devigo turmentas multajn el la plej bravaj soldatoj. Tia farado naŭzas ilian kutiman etikon. Impresas ilin ĝia krimeco tiom, kiom ĝia flanko laŭleĝa, jam pli abstrakta.

Kvankam la publika juro pravigas la distingon inter puninda krimo kaj milita buĉado, kvankam eĉ as oficiala pastraro kaj ruinigas la propran instruadon etikan, tamen por multaj viroj la konflikto estas fortega.

Rezultas interna malekvilibro kun gravaj eblaj sekvoj.

Imagu vivlongan desegniston subite dungatan en buĉejo aŭ trankvilan instruiston devigatan anstataŭi la provincan ekzekutiston. Eĉ tiel vi ricevos ne sufiĉan impreson pri la interbatalo de kutimoj, kiu ŝiras interne patron de belaj infanoj, subite armitan per flamĵetilo kaj ordonitan mortigi aron da homoj, kaŝitaj en tranĉeo.

Post jaroj en lernejo kaj ĉe religia instruado, jen eniras la junulo en armeon. Li lernos tie la regularon pri korp-al-korpaj atakoj: »Per elstreĉo kaj sinturnoj la soldato sin ekzercu por longaj kaj fortaj batoj, li frapu per la pafilo la vizaĝon de l' kontraŭulo.

Kiam la bajoneto traboras la ventron de l' kontraŭulo, li ĝin eltiru kiel eble plej rapide... li tiru ĝin perforte per ambaŭ manoj kaj sin helpante, laŭbezone, puŝante per piedo metita sur la korpo de l' kontraŭulo, k. t. p.«[1])

Tian katekismon oni ne facilanime englutas. Post la mondmilito, iu krimulo estis kondamnita en unu el la pli malgrandaj svisaj kantonoj, kiuj ankoraŭ konservis la mortpunon. Depost la morto de maljuna oficinto, ne restis plu ekzekutisto en la lando. Tiam devis la ŝtato presigi anoncon por serĉi volontulon. Necesis plenumi la leĝon, »elpurigi la societon«.

Sin prezentis fervojisto. Tuj ekskludis lin el la unuiĝo liaj kolegoj. Eĉ tiom indignaj ili estis, ke ankaŭ la ŝtata fervoja direkcio devis interveni. Ĝi do rifuzis al la viro la kelkhoran forpermeson, kiun li petis por sia »tasko«. Tamen li havis por si la leĝon.

Jen du kontraŭaj moraloj. Tipa konflikto. Unuflanke sin defendas la socio kaj konservas mortpunon. Sed la sama sento, kiu igas la socion kondamni la mortigiston, ankaŭ igas ĝin elpuŝi el sia rondo la ekzekutiston.

La konflikto impresas ankaŭ en la senco kontraŭa. Vidu la sintenon de la militrifuzantoj. La angloj ilin nomas *conscientious objectors*, t. e. rifuzantoj pro konscienco. Tia esprimo difinas ilian honoreblan motivon.

Temas tie pri pensemaj civitanoj, nevolantaj konfesi du malajn etikojn samtempe. Ili sin tenas al la

[1]) Citita de Thureau kaj ankaŭ de V. Margueritte en *La Patrie Humaine* laŭ oficiala regularo.

sankta abomeno je mortigo kaj deziras vidi ĝin eĉ pli disvastigata. Ili kredas je la forto de l' ekzemplo kaj mem aplikas la konduton, kiun ili proponas por ĉiuj. Ili sekve kuraĝigas unu la alian, ambaŭflanke de landlimo, kaj rifuzas la militservon, ĉiu en sia patrujo.

Kreskas ilia nombro en ĉiuj landoj kaj plimultiĝas pro iliaj procesoj, ofte publikaj.

Ilin punas la ŝtato, kies leĝon kaj etikon ili malobeas je la nomo de la principoj aplikataj de ties leĝo kaj etiko al la rilatoj inter individuoj.

Ilin kondamnas la tribunaloj armeaj, eĉ ofte malrekonas al ili »la honoreblan motivon« por pliseverigi la punon. Sed ĉiam tiaj procesoj estas malagrablaj al juĝistoj kaj malĝojigaj al publika opinio. Ĉiu ja klare sentas, ke la malliberejoj ne estas destinitaj al konsciencaj homoj. Kiam ili pleniĝas je honestaj homoj, tiam ne plu normala fariĝis la situacio.

Tial la skandinavaj regnoj ŝanĝis sian leĝon por eviti tian konflikton. Krom la militservo, ili havas nemilitan servon, elekteblan. Por ekskludi la mallaboremulojn, ĝi daŭras pli longe ol la militista kaj estas pli peniga. Tie la »rifuzantoj pro konscienco« servas la ŝtaton per alispecaj publik-utilaj rimedoj sen ia rilato kun milito.

En multaj landoj ankoraŭ ne ekzistas tia nemilita servado, ĉar la publika opinio estas ankoraŭ tro dividita inter malsamaj reagoj pri la rifuzantoj. Se nur la leĝon ili malobeus, baldaŭ la ŝtato devus ĝin ŝanĝi. Sed ili malobeas ankaŭ la kutimon kaj la senton, kiuj formas la nacian moralon.

Sama indigno ara, sama kolero publika trafas la ŝtatiston, kiu oferas ian nacian avantaĝon al sia

deziro eviti militon aŭ al sia sento pri justeco al alia regno. Eble li havas tre altan vidpunkton, kiel la rifuzanto. Sed, se la popolamaso ne povas ĝin ekkompreni, kiel ĝi povus atenti pri ĝi?

Regnano kiu malkovras nepravaĵon de sia lando, verkisto, kiu ne konsentas mensogi por la patrujo, juĝanto el interno, kiu montras ambaŭ flankojn de problemo, ĉiuj ili riskas sian vivon je certa momento. La plej lojalaj vidiĝas kiel perfidantoj, la plej bravaj kiel malkuraĝuloj.

Komparu la du jenajn tekstojn:

1. »Kio estas justa, tio estas, kio utilas al nia nacio kaj kio estas maljusta, tio estas, kio malutilas al nia nacio.«

2. »Ne ekzistas justeco super la sekureco de nia nacio, ĉar nia nacio estas la plej alta esprimo de la juro. Ia justeco kontraŭanta la celojn de nia nacio, estas vana literaturo.«

En la originalaj tekstoj staras nomoj de du grandaj nacioj anstataŭ la esprimo »nia nacio«, uzata ĉi tie por ebligi senpasian observadon. Tiel parolis antaŭ nelonge jurista ministro kaj biografo de fama ĉefministro.

Patrujoj havas propran moralon. Ĝi malakceptas kontraŭdiron de ĉiu alia ordonvoĉo. Sur la plano kolektiva, la memlaŭdo, la sinpuŝo kaj la senkompato ne nur estas ofta realaĵo, sed eĉ parto de l' animo nacia kaj de ties morala kredo. Ĝi ne vidas tiujn agmanierojn kiel kulpojn, sed kiel virtojn por si.

## VI.
## *HOMAJ OFEROJ*

*Altaroj antikvaj — Oferoj de homoj kaj bestoj — Abomeno sankta — Milito kaj pronacia religio — Profetaĵo de Mickiewicz — Milita mistiko — Armeo ĉe svisoj — Ŝiparo ĉe angloj — Reynold pri svisa patriotismo — Alkonformigo de sentoj ĉe anglo-saksaj popoloj*

Krimo por la homo kaj devo por la regnano, jen la strangaj ecoj de la milito, kaj tamen estas ĝi, kiu pleje kunhelpas igi patriotismon sankta. La milito entenas teruran oferon. Ĝin oni povas postuli nur en la nomo de sento tre potenca.

Antikvaj religioj jam konis la homajn oferojn sur malpli granda skalo. Unuatempe la sento pri teruro kunhelpis al ilia prestiĝo. Pliposte ĝi sin turnis kontraŭ ilin pro morala evoluo.

Profetoj kondamnis tiujn hombuĉojn. Por ke la popolo ne forlasu la diojn kaj la pastraron, necesis ke tiuj fariĝu malpli sangavidaj.

Budho en Hindujo, Kristo en Palestino celis eĉ multe pli. Ili maltimis la koleron de la pastroj kaj hontigis ilin pri buĉado de bestoj. Ili atakis la pastran

ideon pri dieco kaj difinis ĝin per amo kaj helpsavo al vivantoj.

Nuntempe la sanga kutimo preskaŭ ĉie malaperis. En Hindujo la lastaj restaĵoj de bestofera kutimo estas kondamnataj de Tagore kaj Gandhi kiel skandalo.

Simile, en Okcidento, abomeno al milito sin turnas hodiaŭ kontraŭ la prinacia religio, kiu tro glorigis ĝin. Patriotismo devos rezigni la militojn, se ĝi ne volos vidi sin anstataŭata de alia mistiko.

En 1833 Adam Mickiewicz, la poeto de krucumita Polujo, skribis strangan profetaĵon:

»Kiel Kristo suferis pro la pekoj de la homoj, tiel Polujo disŝirita punpagas la pekojn de la ŝtatoj. Sed kiel Kristo ja venkis la tombon, tiel ankaŭ Polujo revivos por savi popolojn kaj ilian ligon sigeli por daŭra justeco. Kaj kiel sur tero ĉesis la sangaj oferoj post reviviĝo de Kristo, tiel same ĉesos militoj post reviviĝo de Polujo.«[1])

Tiu neordinara profetaĵo meritas re-citon post unu centjaro. Polujo reviviĝis. Ankaŭ Ligo ekstariĝis. La sangaj oferoj . . . estas almenaŭ diskutataj.

En sia batalado kontraŭ novaj sentoj, patriotismo videble suferas unu ĉefan malfortaĵon, t. e. la tro granda loko donita al la milito en sia malnova mistiko.

Malpli minacata ĝi estus en la koro de la popoloj, se ĝin regus poezieco de l' naskiĝa lando, religio de l' civita devo, reciproka interhelpo kaj ofero de l' maljustaj privilegioj.

Sed ĉiuj mistikaj fortoj, ĉiuj simboloj, monumentoj, relikvaĵoj, emblemoj, estas turnitaj al la

1) Adam Mickiewicz: *Libro de l' polaj pilgrimantoj.*

milito kaj al ties herooj. Kial? Ĉar al milito kaj ne al paco estis dediĉitaj ĝis nun la plej grandaj sinoferoj. Tro da tomboj ĝi fosis. Kiel la homoj povus ĝin forgesi? Al ĝi sin klinas la piaj memoroj.

Kia tento al perforto por revolucioj!

Se venas iam ondego forbalaonta tiun tutan mitologion kiel sangan abomenaĵon de l' pasintaj tempoj, kio restos al patriotismo kontraŭ la konkurencaj kredoj? La plej taŭge adaptataj al novaj kondiĉoj estos fine la plej fortaj.

Vidu konkretan ekzemplon: Svisujo, lando malgranda kaj tre patrujama. Dum centjaroj ĝi defendis siajn valojn kontraŭ iuj aŭ aliaj. Pro la militista sperto kaj la malmoleco de la grundo, ĝiaj plej sanaj viroj ekkutimis elmigri fremdlanden kaj dungiĝi kiel soldatoj en la servo de grandpotencoj.

Ambaŭ tradicioj kreis al ĝi popolanimon kaj nacian mistikon tre tipan. En ili la milita heroismo ludas grandan rolon, simile kiel la maro gravas al la angloj. Nun en Svisujo sidas la Ligo de Nacioj. Strangaj konfliktoj ektuŝas la kutimojn kaj la pensojn de la lando.

Edukado, naciaj kantoj, historio, legendaro, prapatra honoro kune donis al ĝi militan poezion tiom influan al spiritoj, kiom la majesto de l' grandiozaj pejzaĝoj.

Ĉe militservo en armeo la regnanoj renkontiĝas ĉiujare dum mallonga deviga periodo. Memoraĵojn kamaradecajn kaj malofte abomenajn ĝi postlasas al tri generacioj de viroj ne partoprenintaj mem en milito. Por multaj svisoj ĝi estas la tipa nacia organizo, kaj la ideo pri senarmigo ekŝajnas al ili kvazaŭ ia

funebro, doloriga, konfuzanta kaj kontraŭa al ĉiuj tradicioj plej sanktaj.

Malaperigu tiun armeon aŭ reduktu ĝin al dana formato kaj vi senigus tiel la svisan patriotismon de ĝia ĝisnuna koloro.

Estas do natura fakto, ke pluraj intelektuloj en Berno malkvietiĝas. Multaj el ili estas mem oficiroj kelkajn semajnojn ĉiujare.

Aŭskultu Gonzague de Reynold, la friburgan poeton de la Kantema Gloro: »Ne temas pri milito, li skribas, ankaŭ ne nur pri nia defendo, eĉ ne pri nia historia tasko: gardi la Alpojn. Temas pri nia spirito. Jam la grundo ĝin montris al ni: la armeo estas la sola formo de komuna eduko kaj de nacia disciplino, kiun tuta Svislando akceptas kaj kiu taŭgas al ĝi . . .«

Tro negative sonas tia priskribo. Se ĝi estus kompleta, Svisujo ne havus multajn ŝancojn de plua vivo.

Ekzistas por helvetismo alia bazo ankaŭ elĉerpita el la pasinteco, sed turnata al estonteco kaj sekve pli daŭra. Krom amo al la lando kaj al ties fidelaj montaroj, restas plie la fakto de paca kunekzisto kaj eĉ amikeco inter popoloj el malsamaj gentoj, lingvoj kaj eklezioj.

Tiun pacan kunvivon minacas la eŭropaj militoj pro la kultura sameco de parto de la svisoj kun unu najbaro kaj de alia parto kun lia kontraŭulo. Male ĝin plifortigas la paco kaj ĝi povas eĉ utili kiel eksperimento kaj simbolo por estonta federacio de popoloj. Tie kuŝas, por la svisa patrujamo, fonto de multe pli solida mistiko. Pli konforma al la estontaj bezonoj de

Svislando kaj de la najbaroj, ĝi estas malpli tuŝebla de eksteraj minacoj.

Sed el espero vivas nacia mistiko nur ĉe premataj popoloj. Ĉe liberaj nacioj ĉefe el rememoro ĝi vivas. La hodiaŭaj sanktaj formoj kaj sentoj respondas al hieraŭaj bezonoj, kaj la klopodoj por konformigo al novaj postuloj ŝajnas ankoraŭ daŭre blasfemaj.

Frapantan ekzemplon pri tio montras Anglujo. Necesas unue kompreni, kiom fortegaj estas tie la sentoj pri ŝiparo kaj rego de la maroj, konsiderata tie kiel bonfara polico. Ĉefministro ja diris: *Estas la maro ni.*

Tuŝi tiun ŝiparon aŭ ĝin aludi malfavore, klarigi al la publiko, ke aliaj nacioj ĝin konsideras kiel minacon al sia libereco, konsili, ke oni ĝin malgrandigu aŭ submetu al la servo de ia supera juro, anstataŭi la ideon de paco brita per ideo de paco tutmonda, ŝanĝi la »patran« imperialismon per enviciĝo en ĉies rangon, jen proponoj, kiuj povus ja ŝajni ankoraŭ multe pli blasfemaj al patrujamantoj de grandpotenco, kutimanta respektadi sian nacian dion kvazaŭ la reĝan leonon, kiu gardas la pordojn de l' mondo.

Tamen, kun rimarkinda konstatemo pri la faktoj, la publika opinio en Anglujo malpli ol la ceteraj konstraŭstaras la necesojn de l' alkonformiĝo. Ja konservante siajn eksterajn formojn, malnovajn kaj kolorplenajn, ĝi ŝanĝas iom post iom sian prinacian religion kaj ĝin tiel sekurigas kontraŭ detruaj ventegoj.

## VII.
## ŜTATO KONTRAŬ ŜTATO

*Milita moralo — Pactempa moralo — Sporto — Fair-play — Kristnasko en tranĉeoj — Batalo inter diplomatoj — Inter ĵurnalistoj — Kontraŭulo proksima kaj malproksima — Aliancanoj — Virtoj kaj malvirtoj al servo de la ŝtato — Rilatoj inter regnoj estas primitivaj — Mankas sinkritiko.*

Milito estas la sentema punkto, kie du moraloj interbatiĝas kun siaj du kontraŭaj kutim-potencoj. Ĉe la homoj kaj ĉe la homamasoj ekzistas instinktopotencoj, mem kontraŭaj al la ĉiutaga moralo.

Ne tute formortis la batalemo kaj, sub ardado de pasioj, povas revekiĝi la sanga brutaleco. En privata vivo foje aperas ekzemploj de tio. Mortigoj okazas tiam, kiam pasioj ege flamiĝis kaj ĵaluzo blindigas ĉion alian. Sekve, dum estas vere, ke milito renkontas kontraŭ si abomenon pri buĉado, ĝi ankaŭ profitas la fendaĵojn de la pactempa moralo. Rapide ĝi grandigas ilin por sia celo, kaj ĝia heroismo baldaŭ envicigas ankaŭ krimecon kaj brutalecon elĉenigitajn.

Ĝia leĝaro detruas alian kodon. Sufiĉe rapide superregas milito kaj elmoraligas la popolojn. Ĝia brulego formanĝas la fadenon, pacience teksitan de

lernejo kaj familio en eduka teksaĵo. Perforto reprenas sian malnovan lokon kaj poste serpentiĝas sian venenan buŝon tra la socia, seksa kaj politika vivo, kien ĝi reloĝigas morojn el pasinteco malproksima.

Fakte la moralmilito nutriĝas el la malvirtoj de l' nuntempo kaj el la virtoj de l' estinteco. Grandega estas la diferenco inter epoko, kiam la plej granda merito kuŝis en fizika forto, kaj alia tempo, kiam eĉ ofte mala estas la ordo.

Ankaŭ en tio la Anglo-Saksoj montras ekzemplon de progreso per alkonformiĝo. De ili venas la sporto kaj ties aparta moralo. La kulturadon de la fizika forto kaj de la fizika lerteco ili flankmetas en la kampon de arto kaj ludo. Tiel ĝi fariĝas senkulpa kaj eĉ utila al publika sano.

Plie ĝi trudas al si tiajn regulojn, ke ĝi kreas lernadon de sinkontrolo. Ĝi kreskigas la kapablon regi siajn pasiojn kaj respekti la kontraŭulon. Embrion de tio jam entenis la kavalireco mezepoka. La sporta moralo, fonto de l' angla fair-play, plivastigas sian influon al ceteraj kampoj de la vivo.

En 1914 ĝi troviĝis en konflikto kun la moroj de la milito. Oni ja vidis soldatojn batali sen malamo, decidi ripozhalton je kristnasko, trakti la kontraŭulojn kiel kamaradojn, interŝanĝi ĉokoladon kontraŭ cigaredoj kaj eĉ provi piedpilkan ludon inter tranĉeoj.

Pri tio maltrankviliĝis la staboj. Danĝera ĝi povus fariĝi. Okazis averto severa kaj absoluta malpermeso.

Kiam do konflikto inter regnoj kuntrenas la anojn al milito, tiam ĝi ektuŝas ilian akiritan moralecon, ekbatiĝas kontraŭ ĝin kaj emas ĝin detrui. Tion

ĝi sukcesas en larĝa proporcio, sed ion ĝi tamen survoje renkontas. Interfrapiĝas la nunaj kutimoj de pli milda humaneco kun la kutimoj de pli kruela estinteco[1]).

Iom rezistas do la privata moralo kontraŭ la ŝtata ĉe milito.

Dum pactempo, sub armita paco, daŭras la batalo inter regnoj sur la kampo ekonomia kaj politika, ne nur inter individuoj devigataj agi kiel soldatoj, sed ankaŭ inter ŝtatoj, defendataj de sia gazetaro kaj de anonima oficistaro.

En tiu ĉi batalo ne okazas interbatiĝo inter pli sovaĝa kolektiva moralo kaj malpli sovaĝa privata moralo. Sur la vojo de la nacia pasio tiam ne troviĝas ia familia moralo por rezisti, eĉ se malmulte.

El tiu ĉi kampo ĝi tute forestas, ĉar la ŝtatistoj, diplomatoj kaj ĵurnalistoj agas kiel servistoj kaj advokatoj de la nacia intereso. Ilia persona moraleco male incitas ilin ne perfidi ĝin.

Patrujo estas por ili la plej supera plafono: ne ekzistas alia devo super tiu.

Dum milito, la homo kiu devas enpuŝi bajoneton en la bruston de samkatastrofano, ricevas malgraŭ sia patriotismo tre ĉagrenan impreson, ĝis kiam tia brutaleco jam fariĝis kutima ĉe li. Certe li preferas pafi je longa distanco kaj ne vidi proksime la rezultojn sur homa karno. Nur per pingloj sur geografia

1) Cetere baldaŭ atingas la tekniko skalon pli kruelan ol antaŭe. Historiisto Ferrero insistas aparte pri la cifera diferenco inter la sumo de mortintoj aŭ vunditoj en la XX-a-centjara milito kaj en antaŭaj militoj. (Prelego ĉe la Universitato en Lausanne, februaro 1931.)

plano la staboj mezuras efikojn de l' pafo. Pro tio ili ŝajnas tiel cinikaj al la soldatoj mem.

Oficisto aŭ ĵurnalisto staras eĉ pli malproksime de la rezultatoj de sia porlanda agado. Preskaŭ nula estas la ribelemo de la individua moralo je tia distanco.

La fremdaj popoloj ja ne vidiĝas kiel aroj da homoj, kies sorto simpatie gravas. Ili figuras en kalkuloj kvazaŭ ŝakpecoj en ludo aŭ kvazaŭ rifoj en marvojaĝo.

Kiel iloj aŭ bariloj de la nacia politiko, ili estas taksataj laŭ tio, ĉu ili ĝin helpas aŭ malhelpas.

Kiel »subpremataj« estas rekonataj nur la popoloj sub la regado de kontraŭulo. Kiujn turmentas la patrujo mem aŭ ties aliancanoj, tiuj ne havas eĉ rajton al ekzisto aŭ al justeco.

Eĉ al aliancanoj la simpatio daŭras nur tiom longe, kiom ilia kunhelpo estas bezonata. Aŭskultu la paroladojn oficialajn. Sub la flataj vortoj apenaŭ kaŝiĝas en iuj la malŝato kaj, en aliaj, la humiliĝo senti sin grasigataj kiel aldona kanonviando.

Kiel la milito samtempe uzas la heroecon de l' bravulo kaj la brutalecon de l' krimulo, tiel same ĉion kune utiligas la nacia batalo dum pactempo. La sindono de l' oficisto lojala al sia regno, la takto de l' diplomato, la fido de l' patrujamanto, la fervoro de l' verkisto, ĉio ĉi kunvarbiĝas al ĝia servo kune kun la ruzeco, la sinpuŝo, la vanteco, la malklereco, la fiereco kaj la malamo de la plej difektitaj homoj, kies difektoj mem servas la nacian celon kune kun la noblaj ecoj de l' aliaj.

La naciaj dioj similas tiujn antikvajn idolojn,

kies adorado postulis samtempe sanktulojn, asketojn, oferantojn kaj templajn malĉastulinojn.

Super la nacia politiko ekzistas do nenia moralo kapabla instigi eĉ la plej etan reziston. Por ĉiu, la sankta plafono de l' patrujo ludas la rolon de plej supera ĉielo. Nu, tiuj malsamaj ĉieloj kondutas kiel nuboj. Ilin al tondro puŝas la vento kaj ekfalas la hajlo sur ĉiujn popolojn.

Por ke la blinda nacia fervoro trovu haltigan bremson sur la vojo al katastrofo, necesus ia interŝtata moralo, baranta la sinpuŝajn kaj brutalajn kutimojn per aliaj pli mildaj kaj pli saĝaj moroj, kiaj ekzistas ja inter la anoj de iu ajn aro. Unuvorte, necesus kuna tegmento super la naciaj plafonoj.

Ĉar kreis al si ĉiu popolo sian »animon», necesus altigi ĝin al la sento pri supera kuneco. Alie ĝi estas animo ne kompleta kaj netaŭga por vivo en socio.

Nek ideo nova, nek organizo nova sufiĉas por starigi realan moralecon. Necesas krome la kutimo kaj emocioj. Fakte, la rilatoj inter la ŝtatoj estas ankoraŭ multe malpli progresintaj ol la rilatoj inter la homoj. Sekve, ankoraŭ tre primitivaj estas la moroj kaj sentoj pri tiuj aferoj.

La rajto de eksterlandaj personoj staras multe pli progrese ol la internacia juro pri ŝtatoj, kaj la diplomata ĝentileco inter ambasadoraj sinjoroj multe pli alte ol la bonvolo inter iliaj nacioj.

Ĝis nun la naciaj aroj kutimis inter si konduti kiel inter si kondutas uloj sen ia ajn moraleco. Eĉ, la sento de l' amasoj malfruas rilate al la faktoj, ĉar aperis jam kelkaj ekkutimoj etikaj inter ŝtatoj, sed

ili ankoraŭ ne postlasis sian stampon en la popolaj emocioj.

La moralecon de l' individuoj faciligas, krom la kutimo, ankaŭ la kritiko pri si mem kaj la sento pri solidareco aŭ samsorta kuneco. Ĉu estas videblaj iaj ĝermoj de tio en la vivo de la homaj aroj inter si? Ĉu ekzistas ie fortoj moviĝantaj en tiu direkto?

## VIII.
## EKLEZIO KAJ ŜTATO

*Kiu kapablas observi patrujon — La vero pri gepatroj — Scienco kaj patrujo — Pornacia kredo kaj kontraŭ-pastra racionalismo — Eklezioj kaj sinkritiko — Sento pri pekoj individuaj, ne kolektivaj — Eklezio humiligata de ŝtato — La kosto de reamikiĝo — Encikliko de Pio XI — Patrujo super kristana religio — Mussolini pri »La nekonata sekteto« — Iama absoluteco — Moderna kompromiso.*

Kiu kapablas malfermi siajn okulojn? kiu kapablas observi la patrujon kaj ties konduton?

Ekonomiajn faktojn, diplomatajn avantaĝojn, ĉion pri la materia vivo de la ŝtato vi povas ja taksi kaj mezuri. Sed ĉion mistikan aŭ pasian, ĉion aman aŭ kredan, kiel esplori tion?

El ekstero unue. Vidu la patrujon de l' ceteraj homoj. Kian animon ili kreas al ĝi, kian nacian dion ili adoras, pri tio ni mem ofte parolas kaj ili reciproke pri la nia. Sed nian observadon malheligas la vualo de l' antaŭjuĝoj.

Ne multaj inteligentuloj emas imagi sin en la haŭton de la najbaro por kompreni lin pli bone. El

ekstere oni juĝas kaj malbone juĝas. El ekstere oni estas juĝata kaj estas malbone juĝata.

El interne observi ŝajnas ankoraŭ pli maldece. Ne estas eble rigardi malvarme tion, kion oni amas. »Sian patrinon oni ne juĝu.« Sed erare estas kredi, ke oni devus observi malvarme. Sen amo nenion oni povas ja kompreni.

La infanoj en la XX-a centjaro malpli timas ekscii la veron pri siaj gepatroj. Ili amas ilin eĉ ne kredante ilin perfektaj. Malpli timemaj, eble malpli silentaj ili estas, sed pli malkaŝemaj. Certe pli spontana estas ilia karesemo.

Por esti el interne observata, l' animo nacia bezonus la helpon de scienco. Sed kiom da scienculoj lasas en sia laborejo la sciencon kune kun la blanka surtuto! Mikroskopon ili prenis por ekzameni tiujn emociojn, kiujn ili ne partoprenas. Por rigardi patrujamon, ili formetas la ilon, ĉar ili mem estas kredantoj sur tiu kampo.

En la latinaj landoj iom post iom la kontraŭpastra racionalismo anstataŭis la katolikan kredon per la patriotisma kredo. Tiu ĉi lasta fariĝis la sola religio altigita super ĉiuj ceteraj kaj ĝuanta ĉiujn ŝtatrajtojn sen ia limigo al ĝi aŭ toleremo al ne samaj konvinkoj.

Kio fariĝas el animo nacia tiel lokita plej supren? Manke de scienco, ĉu troviĝas alia interna okulo por ĝin observadi, alia konscienco por ĝin kontroli?

Scienculoj mem konfesas, ke nura scienco ne povas forigi militon. Serĉado de venenaj gasoj sufiĉe montras sciencon envicigita por buĉado. Necesas etika vidpunkto.

Tian etikan internan okulon kie ni serĉu? La

kristanaj eklezioj instruas ja sinkritikon, sed plej ofte rezignas instigi al ekzameno de l' kolektiva *si* en formo nacia. La tutan homaron ili proklamas kulpa, sed nur la individuajn pekojn ili rekonas.

Eĉ sur tiu kampo humiliĝis ilin la monarkioj. La roma kaj lutera eklezioj, ambaŭ estis ofte devigataj fermi siajn okulojn, forviŝi aŭ eĉ pli-malpli rajtigi ĉe princo devojiĝojn ordinare kondamnitajn ĉe nura subulo. Inter tia kosto kaj la propra ekzisto ili devis elekti. Ankaŭ por ili la korpa vivo kaŭzas ian submetiĝon de l' spirito.

En la XX-a centjaro eĉ pli granda estas la humiliĝo, ĉar necesis en la ŝtato cedi la lokon al la prinacia religio. La alia, per si mem tutmonda, ricevas subtenon nur, se ĝi servas la pli malvastan.

Eŭropaj militoj devigas samekleziajn pastrojn preĝi en kontraŭaj sencoj. Oficiraj gazetoj ekzamenas la influon de l' armepastroj al la kuraĝo de l' soldatoj kaj al la venko ĝuste sammaniere kiel ili mezuras la efikecon de gaso aŭ nova pafmaŝino.

Se ribelus la eklezioj kontraŭ tia subigo, se ili ekjuĝus la nacian moralon de la ŝtato en la nomo de alia principo tutmonda, ili estus forigotaj de la publika vivo kaj persekutataj en sia instruado. La movado por seneklezia lernejo, kun apogo de nacia pasio, fariĝus ne rezistebla.

Post la mondmilito, ŝtato kaj eklezio fariĝis malpli malamikaj en Francujo. Sur patriotisma bazo realiĝis la repaciĝo. Anstataŭ esti bruligata, Johana de Arko estas nun komune festata. Dum enterigoj de marŝaloj en Parizo, piaj prelatoj kaj liberpensaj ŝtatistoj aperas kune anstataŭ sin eviti.

Sub servado al la prinacia religio de la ŝtatoj,

la Eklezio regajnis sur la kampo tera multon el la perdita grundo. Eĉ sur la kampo spirita, ĝiajn proprajn dogmojn la filozofoj malpli atakas, de kiam ĝi klinîĝis al tiu ekstera dogmo.

Relevi la kapon kaj de supre juĝi la prinaciajn religiojn de la ŝtatoj, tio estus ja komenci riskoplenan batalon. Jam la kondamno al la francaj rojalistoj[1]), tamen agrabla por la Respublika Ŝtato, kostis kare al la Katolika Eklezio en la vicoj de la nacianista junularo. Same en Germanujo la episkopa kritiko pri la rasista movado kaj en Italujo la papa protesto kontraŭ »pagana adorado de la ŝtato« jam en 1931. Jam ĉe surtroniĝo Pio XI deklaris en Enciklika *Urbi Arcano* la jenon:

»Ĉiuj popoloj, kiel partoj de la homa familio tutmonda, devas esti kunligitaj per frateca kutimo. La amo al patrujo kaj al raso fariĝas fonto de multaj maljustaĵoj kaj de malnoblaĵoj, kiam, transirante la limojn de la justo, ĝi defalas al troa amo je la nacio.«

Ĉe la Protestanta flanko, tute simila estas la risko. Eĉ aldoniĝas unu plia: la risko de l' interna disiĝo, kiun aŭtoritata eklezio kapablas eviti. Nura diskuto pri milito aŭ patrujo povas rompi la pacon de la ŝafaro, kaŭzi eksiĝojn, malkuraĝigi kotizantojn kaj inviti la polvon amasiĝi sur la sidbenkojn de l'ŝtataj kaj armeaj estraranoj, okupataj nur en la tagoj de naciaj festoj.

Mortis Kristo por ke vivu lia instruo. Ĉiam emas

[1]) anoj de reĝo anstataŭ respubliko, riproĉitaj de la Papo pro provo identigi sian movadon kun katolikismo.

eklezioj moderigi sian instruon por ke ili vivu mem. Ili ne vidas tion. Jam de longe enkorpiĝis la kutimo supermeti la patrujon super ilian moralan juĝkampon kaj agi same pri la klasaj privilegioj, ne kunigeblaj kun kristana frateco.

Voli por la ceteraj vivantoj tion, kion oni postulas por si mem, certigi por ĉiuj infanoj kaj ĉiuj maljunuloj tion, kion oni nepre havigas al sia familio, konsenti leĝojn kaj oferojn tiucele, konsideri la bezonojn de fremdaj nacioj, ami siajn kontraŭulojn kaj redoni bonon kontraŭ malbono, jen idealo sendube tre malfacile gardebla, kvankam eble ne pli ol tiu pri seksa disciplino, multe pli taksata de l' eklezioj.

Ĉiuokaze, tio estas la nepra instruo de la Prediko sur la Monto kaj tiu, kiu proklamis ĝin, preferis morti ol rezigni je ĝi. Nur por daŭri en la spaco la eklezioj evitas subigi la patrujojn al sama juĝo kiel la individuojn. Simila zorgo povas ŝanĝi ilian sintenon ankaŭ laŭ aliaj cirkonstancoj.

Multe malpli timemaj ili montras sin al la ŝtato, kiam tiu ĉi kontraŭdiras ilian komprenon pri edziĝo aŭ religia instruado.

Tiam ili ne hezitas tuj kontraŭbatali. Dum la XX-a jarcento la plej ofta *modus vivendi* inter ili kaj la ŝtato estas ia rega divido. La ŝtato fiksu la moralon de la patrujo, ili fiksu la moralon de la familio. Kaj se la unua formanĝas la duan, se milito igas la patron mortiginto, la edzinon vidvino kaj la gefilojn orfaj, se la klasa maljusteco forŝiras la patrinon el la hejmo por laborigi ŝin en fabriko, tiam al la eklezioj restas disponebla nur proponi al la homoj: rezignacio en ĉi tiu mondo. Tro malfrue alvenas ilia kompato.

Nesufiĉa kaj humiliga, tiel vidas almozhelpadon tiuj, kiuj sentas sin forlasitaj kaj riproĉas tion al eklezioj.

Nesama estis la sinteno de la eklezioj en la komenco. Antaŭ ol imperiestro Konstantino ĝin oficialigis, la kristana eklezio daŭris tri centjarojn sendepende. »Nura sekto nekonata ĝi estus restinta sen la subteno de la Roma Imperio«, eĉ respondis iam Mussolini al la papo en publika parolado.

Sed, dum tiu tempo de sendependeco ĝi restis »absoluta« pri ĉiuj punktoj. Militservon ĝi malpermesis al siaj anoj. Vi devis ĝin forlasi antaŭ ol vi rajtis ricevi komunion. Kiel martiroj de kristanismo estis honorataj tiuj, kiuj rifuzis militservon. La unuaj gvidantoj de l' Eklezio ja proklamis la neakordeblecon inter sia religia kredo kaj ĉia preparo de milito, eĉ pordefenda[1]).

Kiam la imperiestroj de la ekfaliĝanta imperio aneksis la Eklezion tondante ĝiajn principojn, ili komence renkontis iom da rezisto. Necesis atendi ĝis Sankta-Aŭgusteno por trovi faman teologon pretan varbi la kristanan fervorecon por la defendo de l' Imperio kaj de ĝia civilizo grave minacata. Spite je tiaj aliĝoj tamen ruiniĝis la Imperio malgraŭ pluraj armeaj venkoj.[2])

Ankaŭ pri socia egaleco la komenca kristanismo sin montris multe pli radikala ol la pli posta. Unuatempe la membroj de l' Eklezio realigis inter si komunismon en formo plej simpla. Tiom malproksime

[1]) Interalie Justeno Martiro kaj Origeno.

[2]) *Heering: De Zonderval van het Christendom* 1928. Angla traduko: de Thomson, London 1930. Franca traduko: *Dieu et César* 1933. *Harnack: Militia Christi*, Tubingen, 1905.

de tio ĝi staris en la deknaŭa centjaro, ke la kolektivistaj ideoj tiam kreskis eĉ kontraŭ la eklezioj kun ilia malbeno. Same okazis ankaŭ pri internaciismo preskaŭ ĝenerale.

Post la mondmilito de 1914 aperis iaj provoj al vekiĝo. Konstatinte la sukceson de laboristaj unuiĝoj, la Katolika Eklezio favoris la kreadon de kristan-socia movado por tiri la laboristojn el la influo de siaj kontraŭuloj. Tiuj novaj sindikatoj subtenis postulojn pri salajroj aŭ asekuroj, sed ne minacis la socian sistemon mem. Ilin kontraŭbatalis la ceteraj unuiĝoj kiel dividelementon en la klaso laborista. Evoluis la movado al partioj politikaj por eklezia defendo.

Ĉe la flanko protestanta kunvenis en Stokholmo en 1925 tutmonda kongreso, kiu principe rekonis, ke milito kaj socia maljusteco ne povas akordiĝi kun la kristana moralo.[3])

Internacian instituton por sociaj esploroj fondis en Ĝenevo la Federacio de Kristanaj Eklezioj, sed el tio ne rezultis ĝenerala movado de l' protestantismo kontraŭ la sistemo de privataj profitoj, ankaŭ ne kontraŭ la milita devigo. Pri tiuj punktoj la radikal-opiniaj pastroj formas malplimulton, kiu klopodas sin organizi.

Plej ofte ekster oficialaj kadroj esprimiĝas ia revekiĝo de kristanismo kaj reveno al ĝia pratempa necedemo kontraŭ la kolektivaj pekoj.

Ke la plimulto de l' oficiala pastraro ne aliĝas al tiu movado, tion oni klarigu ne nur per singard-

[3]) Vidu en ĉapitro XVII decidon de l' Anglikana Eklezio en 1930 pri rifuzo helpi militon.

emo, sed ankaŭ per la fakto, ke multaj ne kredas tiun ĉi mondon plibonigebla. Ili rezignas la provon igi ĝin paradizo kaj akceptas ĝiajn krimojn kaj maljustaĵojn kvazaŭ neeviteblajn sur la tero.

Tiamaniere ilia edukado de l' animoj kaj de la karakteroj preparas individuajn virtojn, kiuj poste servas kolektivajn malvirtojn anstataŭ ilin korekti. Estas vera tragedio.

## IX.
## *INTERNA MEMKONTROLO*

*Interna kritiko — Premata Klaso — Tagore kaj Lao-Ĉe pri mizero — Laborista ribelo — Ties tutmonda karaktero — Juĝantoj de patrujo — Pledo de Ch. Naine al milita tribunalo — Germanaj sindikatoj pri belga neŭtraleco — Jaŭres mortigata — Mac Donald are insultata — Anglaj laboristoj pri Generalo Dyer — Amritsara buĉado — Konflikto inter kontraŭaj fidelecoj — Kondiĉoj de unuforma konscio.*

Scienco konas nek bonon, nek malbonon. Eklezio konas preskaŭ nur individuajn pekojn. Por malkaŝi la kolektivajn, restas nur iliaj viktimoj. Nu, mortintoj ne parolas. Kiu do juĝos la patrujon kaj ties animon?

Tiun grandan blasfemon kontraŭ la nacia netuŝeblo kuraĝas la klaso laborista. La interna okulo konsistas el la forgesatoj de l' malsupro.

La amo al patrujo altigas la homon super si mem. Jen ĝia belaĵo. Sed ne super sia mono. Jen ĝia manko. Flegante la nacian korpon, la patrujamantoj malzorgis la krurojn kaj brakojn. Ili atentis tro ĉefe la lipojn.

Ilia ŝtato ne starigis justecon inter la stomako

kaj la membroj. Knaras la funkciado. Al tiu klaso, kiu penas en fabriko, mankas hejme la komforto. Ĝi ne ricevas la tutan frukton de sia penado. Ankaŭ la nacio ne ricevas ĝin. Tro belan parton forprenas la dungantoj.

Jam en la sesa centjaro antaŭ Jesu-Kristo konstatis la ĉina pensulo Lao-Ce, ke »mizeras la popolo, ĉar kiuj ricevas de ĝi, tiuj postulas pli ol estas al ili ŝuldate. Jen la kaŭzo de la mizero«.[1])

Pli moderna pensulo el Oriento, Rabindranath Tagore, poete priskribis tiun plimulton de homoj restantaj ĉe la malantaŭo de l' pentraĵo:

> »Estas ilia okupo surporti la ceterajn. Ne havantaj la tempon kulturi sin, bredataj per la forĵetaĵoj de l' nacia riĉo, malpli nutrataj, malpli vestitaj, malpli edukitaj, ili servas la ceterajn. Ilia laboro estas la plej malagrabla, ilia sorto la plej malbona. Tie ĉi kaj tie ili mortas pro malsano, pro malsato. Jam bele, kiam ili ne mortaĉas de la suferigoj kaj insultoj, kiujn la supruloj defaligas sur ilin malsupren. Sen la necesaĵoj aŭ sen la komfortoj ili devas vivi. Kvazaŭ lampoportiloj de l' civilizo ili staras, super la kapo tenas oleajn lampojn: La homoj supre ĝuas la lumon, ili malsupre ricevas la fanditan oleaĉon degutiĝantan sur iliajn kompatindajn korpojn.«[2])

Kiam lernas la lampoportiloj legi, kalkuli, pripensi kaj sin organizi, tiam ilia suferado naskas ekindignon. Kaj indigno blovas al ribelo. Reziston ĝi renkontas kaj batalo ekflamas.

[1]) Tao-Teh-king, LXXV.
[2]) *The Visva-Bharati Quartely, novembro* 1930. Letero de Tagore.

La konscio pri klaso estas foje tiom forta, kiom la konscio pri nacio. El malsupre tiu nova konscio ekrigardis la patrujamon kaj kuraĝis proponi demandojn al ĝi.

Ĉar simila situacio ekzistas alilande, ia solidareco naskiĝis. Internacia sento ekformiĝis el komunaj sopiroj al justeco kaj idealo.

Tiam la nacia animo ricevis juĝantojn enlandajn. Tiuj juĝantoj kulpigis la ŝtaton, ke ĝi ne estas organizata je la profito de ĉiuj, sed nur de iu malplimulto, ili riproĉis ankaŭ la ŝtaton, ke ĝi disponigas ĉies vivon por militoj, kies neceson ili dubas. Tiujn militojn ili vidas kiel atakon aŭ defendon de bieno, ne kolektiva, sed posedata de kelkaj.

Tion pensanta laboristo, rifuzinta militservon, aperis al tribunalo kiel juĝanto: juĝanto kontraŭ juĝantoj.

»Mi ne konas tiun ĉi patrujon. Estas nia tero amata, vi diras, sed el tiu ĉi grundo mi ne posedas eĉ unu kvadratan centimetron kaj al mi ĝi estas tiom fremda kiom tero ĉina aŭ perua. Vi diras »*nia* tero« kiam ni defendu ĝin, sed vi ne plu diras *nia,* kiam ni dividu ties fruktojn. Kial mi ĝin defendu?

»Patrujo, vi diras, konsistas el niaj vilaĝoj kaj urboj. Sed ankaŭ ili ne apartenas al mi pli ol la grundo, sur kiu ili kuŝas. Tie mi povas loĝi nur pagante pezan tributon al la posedanto, ĉu svisa, ĉu germana, ĉu franca.

Kial vi postulus, ke mi mortigu homojn sub tia preteksto? »Patrujo, vi aldonas, entenas miajn samlandanojn kaj, se mi ne havas bienojn defendotajn, almenaŭ mi prenu armilojn por protekti

tiujn, kiuj partoprenas la saman ekziston kiel mi. Certe mi komprenas tiun devon, multaj el miaj samlandanoj meritas esti defendataj... sed ankaŭ la malfeliĉuloj, la ekspluatatoj en aliaj landoj... Via divido inter samlandanoj kaj fremduloj ne akordiĝas kun mia situacio de laboristo...

»Patrujo, vi diras, estas ankaŭ mia edzino kaj la filinoj de l' popolo kaj mi prenu armilojn por ilin defendi. Plaĉu al ĉielo, ke neniam okazu tio, ĉar la malamikojn de mia edzino kaj de la filinoj de l' popolo vi ne serĉu trans la landlimo! Ili staras ja pli proksime sur la kamparo, en fabriko, en oficejo, en magazenoj kaj estas tiuj, kiuj lacigas iliajn malfortajn korpojn kaj igas ilin naski nur malfortajn idojn, antaŭdestinitajn fariĝi viktimoj de la vivbatalo!«

Tiaj sentoj estis jam tre disvastigitaj en 1914, sed malmultaj homoj kuraĝis rifuzi la uniformon kaj iri en malliberejon. La plej populara propono estis obei la mobilizon por renversi la pafilon aŭ pafi malantaŭen.

Ĝi plene malsukcesis en la faktoj malgraŭ la plej belaj kongresaj rezolucioj. Tiuj juĝantoj de la patrujo, kiuj ne volis iri en malliberejon, partoprenis en la milito kun tiom da heroeco kiom iliaj enlandaj kontraŭuloj. Ili tiam trovis ion defendindan: Liberecon, lingvon aŭ proprajn instititituciojn. Post kelkaj jaroj ili tamen ĉesigis la militon per revolucio en pluraj landoj. Tiam multaj el ili bedaŭris, ke ili ne tuj komencis per tio por eviti la tutan buĉadon.

Ili eksentis kvazaŭ oni trompis ilin amase kaj deposte malfidis la patrujaman pasion, kiu kuntrenis ilin. Kritikemaj ili fariĝis pri la konduto de sia propra

ŝtato. Volonte ili malkovris ties respondecojn anstataŭ kulpigi ĉiam aliajn. Foje eĉ ili malpravigis sian patrujon pro ties konduto al najbaro aŭ al kolonia popolo.

Nacian sinkritikon, nacian »senton pri peko«, kiun eklezioj ne kuraĝis veki sur tiu kolektiva kampo, tion ili kuraĝigis kaj eĉ igis kvazaŭ kutimo en siaj rondoj.

Se vi deziris, post la mondmilito, serĉi en Germanujo severajn juĝantojn pri la perforta trapaso tra Belgujo, tiujn vi trovis multope ĉe la laboristaj unuiĝoj.

Ja sento pri etiko internacia ekfondiĝis. Laboristaj reprezentantoj en Parlamentoj ekesprimis tion kvazaŭ voĉon de konscienco rilate al ekstero.

Ilin kompreneble rigardis tuj kiel perfidulojn tiuj enlandanoj, kies plej supera plafono estas nacio. Pro sama kaŭzo Jaurès en Parizo estis mortigita de pasia patrujamanto. Ĉar la granda oratoro postulis en Francujo, ke oni estu justa ankaŭ al Germanujo, li aspektis kiel agento de l' eksterlando.

Oni timis lian kritikon pri la patrujo, kiun li tamen amis profunde, sed ne blinde.

En Anglujo samjare Ramsay Mac Donald estis forpelita de societo, ĉar li rifuzis akcepti senrezerve la militdeklaron en 1914. Post kiam li fariĝis ĉefministro de laborista registaro dek jarojn pli poste, oni kulpigis lin en gazetoj, ke li perfidas la imperion akceptante la devigan submetiĝon de Britujo al supera »eksterlanda« tribunalo en Hago.

Ĝis tiam oni kutimis ripeti *Right or wrong, t' is my country* (Ĉu prava, ĉu malprava, mia lando antaŭ ĉio). Li respondis en Parlamento: *If we are wrong, we don't deserve to win*«. (Se ni estas malpravaj, ni

ne meritas gajni proceson). Tio estis ja nova moralo por granda Imperio.

En 1919 en Hindujo Generalo Dyer fajrigis maŝinpafilojn sur senarman popolamason, kunvenintan en Amritsar spite al lia malpermeso. La guberniestro jam estis proklaminta alarmstaton post ribelo kun dombruligo kaj mortigoj.

La oficiala buĉado faligis mil viktimojn, el tio kvarcent mortintojn.

En Londono laboristaj deputitoj kaj pluraj aliaj protestis en Westminster. Fine la Ĉambro de la komunumoj publike riproĉis la Generalon, revokotan hejmen de la registaro. En la Ĉambro de la Lordoj lin gratulis la plimulto de la nobelaj sinjoroj, ĉar li savgardis la ordon kaj la prestiĝon de la brita flago. Por ili Dyer estis nacia heroo maljuste kalumniata. Eĉ monkolekton al lia honoro malfermis la *Morning Post.*[1])

Nun serĉu la impreson faritan en Hindujo foliumante la tiutempan *Young India.*[2]) Legu ankaŭ la biografion de la Generalo, kiu estis brava soldato.[3]) Por li, angla oficiro, hindaj patrujamantoj, ĉu Patel, ĉu Gandhi, estas nur malŝatindaj incitantoj kaj la

[1]) Disvastiĝis tro da legendoj pri la voĉdonoj en tiu ĉi afero. Ĉe la Ĉambro de la Komunumoj la revoko de l' Generalo kun riproĉo estis aprobita per 230 voĉoj kontraŭ 129 la 8. Julio 1920. Ĉe la Ĉambro de la Lordoj tiu revoko estas bedaŭrata kiel maljustaĵo per 129 voĉoj kontraŭ 86, la 20. Julio 1920.

[2]) Angle *Young India,* kompleta eldono vol I. 1919—1921. France *La Jeune Inde* elektaĵoj tradukitaj. Stock. Paris 1924.

[3]) *Life of General Dyer* de John Colvin, London 1929.

kunveno en Amritsar nur amaso da danĝeraj malamikoj. Dyer amas sian patrujon kaj pro ĝi riskas sian vivon. Piede li venos al tiu kunveno kun kvardeko da homoj. Li savu la honoron de l' *Union Jack*, mokatan de perfiduloj! Por li sankta devo.

La kontraŭaj esprimoj estas tre malsamaj. Laŭ Gandhi[1]) la Generalo estas kompatinda homo, kiu ektimis kaj elnerviĝis. Li volonte flegus lin, se li estus vundita aŭ malsana, sed li proponas formalan malaprobon de la krimo kaj proklamas nacian funebron por ĝin postuli de la registaro.

Al la hinda popolamaso la Generalo aspektas monstro kun sangoplenaj ungegoj. Al la nacio kaj al Gandhi la viktimoj estas historiaj martiroj. Dum centjaroj oni respektos ilian memoron.

Ĉiuj sinceraj estas tiuj malsamaj vidpunktoj. Jen konflikto inter kontraŭaj moraloj. Ĝi do pripensigu. Kie staras la unuforma konscienco? Kredantaj homoj troviĝas en ambaŭ kampoj. Tiel estas en ĉiuj militoj.

Por ke unuforma konscienco ekzistu, ja necesus, ke ĉiuj kredu je unu komuna valoro, lokata super ĉiuj ceteraj ŝataĵoj kaj ankaŭ necesus, ke ili akordigu siajn raciojn por apliki ĝin en detaloj. Mezuru la amplekson de tia paŝo.

Kontraŭaj amoj ĉiutage interbatiĝas ekstere kaj interne de la homoj kaj de aroj homaj.

En la Dyer-afero, la vidpunkto de la britaj laboristoj troviĝas samforma kun tiu de la hindoj. Tute nature. Ekzistas simpatio inter malfeliĉuloj kaj komuna antipatio kontraŭ la sistemo, kiu suferigas ilin.

[1]) Al Gandhi ne estis eble alveni al Amritsar por kvietigi la popolon. Lian eniron en la provincon la guberniestro malpermesis.

Jen du sentoj formantaj en la nacia konscio eron de internacia konscio. Eble la internacia konfliktos kun la nacia aŭ ĝi kompletigos ĝin kvazaŭ nova ĉelo. Ĝi kreskas en senco negativa kaj en senco pozitiva. Unuflanke ĝi utilas al la nacio kiel elemento de sinkontrolo kaj sinkritiko.

Aliflanke ĝi helpas la nacion altiĝi super si mem kaj konstrui al si pli vastan amon, kvazaŭ patrujon de patrujoj.

En ambaŭ direktoj ĝi puŝas al novaj moralaj devigoj de kontrolo kaj agado. Ĉe individuoj la etiko nomas tiujn: *sento pri kulpo* kaj *servemo*. La sama traduko valoras ankaŭ por la popoloj en societo de nacioj.

## X.
## *KLASA KONSCIO*

*Klasa konscio supre kaj malsupre — Religiaj sentoj de la popolo — Franca Revolucio kaj patriotismo — Konscio pri klaso kaj pri nacio — Elmigrintoj kaj kamparanoj — Monarkistoj kaj Jakobenoj — La tiatempaj bolŝevistoj — Deklaro de Sievers en 1793 — Patriotismo soldata kaj revolucia — Napoleono — Fichte — Reago ĉe la ceteraj — Industrio kaj nacianismo — Defendo de kapitalismo — Financaj internacioj — Klasaj interesoj kaj patriotaj tradicioj.*

Esplorante la konscion pri klaso, ni trovis ties forton apud la konscio pri nacio. Tia forto ekzistas ĉe klasoj supraj same kiel ĉe malsupraj. Sed malsupre ĝi stariĝas ofte kontraŭ la nacia konscio por ĝin kritiki kaj konkurenci, dum ĉe supraj klasoj, ambaŭ sentoj ŝajnas unu kunmikse. Kial do estus malpli patrujama la laboristo kaj pli patrujama la monhavanto? Ĉu ne ekzistas ankaŭ financaj Internacioj batalantaj por defendi klasajn avantaĝojn? Sendube ekzistas tiaj, sed al ili mankas ĉia sento religia.

El malsupre kreskas la religiaj sentoj de l' popolamaso. Kristanismon kaj patrujamon ne eltrovis imperiestroj. Kiuj pli poste profitis el popolaj sentoj,

tiuj leĝigis ilin je propra avantaĝo por ĝui tian povon aŭ prestiĝon, kian tiuj kapablas havigi al gvidantoj.

Historio de l' antikvaj civilizoj montras pastraron profitantan el la popola pieco por starigi sian kastan komforton malantaŭ ŝirmilo de sankteco.

Kristanismo estis en la komenco radikale revolucia kaj estus povinta, jam antaŭ la Norduloj, detrui la Imperion, se Konstanteno kaj liaj posteuloj ne estus ĝin aneksintaj kaj modifintaj en senco moderiga.

La nacian mistikon de la ŝafgardistino lotringa juĝis tre danĝera la tiatempa eklezio, ĝin malbonvenigis ankaŭ la burĝoj kaj la kortego. Nur la militistoj komprenis ĝian valoron, kiel bonege montris Bernard Shaw en sia teatraĵo »Saint Joan«.

Kio igis patriotismon ĝenerala sento, en Francujo, ĝis la fundo de la kamparoj, tio estis la granda revolucio. Pro ĝi la regnano fariĝis soldato por defendi la teron forprenitan el la manoj de l' sinjoroj. Similan senton kreis la rusa revolucio batalanta kontraŭ la »blankaj« armeoj post la fordivido de la teroj kaj bruligo de kasteloj.

Klasa kaj nacia konscio samflanke fervoras ĉe la popolo, kiam ĝi kredas sin mastro de la tero kaj de la ŝtato. Kio tiam okazas ĉe la posedinta klaso nun detronigita?

Dum la franca revolucio, ĝi rifuĝas eksterlanden kaj incitas fremdajn potencojn almiliti la propran landon por rekapti la povon kaj posedon. Sekvas komprenebla ĝenerala kulpigo al tuta tiu klaso pro perfido al patrujo. Procesoj okazas, eĉ araj suspektoj, kondamnoj kaj buĉoj de kulpuloj kaj senkulpuloj. Ĉiuj elmigrintoj kaj ties parencoj, amikoj aŭ ielaj kunuloj ricevas senkompatan punon. Aresto egalas morton.

Klasa kaj nacia konscioj ne plu kuniras, kiam oni perdis la bienon, la monon kaj la povon. Oni vidas la Jakobanojn[1] kiel bandon da buĉistoj, ilian registaron kiel aron da friponoj. Oni deziras, ke venu milito kaj venku la eksterlando kontraŭ la propra nacio. Oni fariĝas »malvenkisto« aŭ »defetisto«, tio estas sopiranto al malvenko de la patrujo.

La celo estas ja liberigi la patrujon el la Jakobana tiraneco. Simile la malvenkistoj en 1917 kaj 1918 deziris ĝin liberigi el imperiestra tiraneco.

Komparu la senton de la sovjetaj laboristoj kaj de la rusaj elmigrintoj post la mondmilito.

Ne troviĝas pli taŭgaj atestantoj ol la vortoj de la gepatra lingvo. Legu la gazetojn de la franca revolucio. La vorto *Patrujo* entenis la revolucion. Ties adeptoj nomiĝis *Patriotoj*. La kanto *Marseillaise* en 1795 egalis *La Internacion* en 1920.

Kaj kiuj kantis ĝin kun Rouget de l' Isle en tiu tempo, ne ĝuis eksterlande pli belan famon ol la bolŝevikoj post unu centjaro kaj kvarono: »Ili klopodas enkonduki en la Respublikon[1] tiujn inferajn instruojn, kiujn sekto malpia, blasfema kaj freneza eltrovis por detrui ĉiajn religiajn, civilajn kaj politikajn principojn. Jam fondiĝis en la ĉefurbo kaj en pluraj provincoj de Polujo kluboj fratiĝantaj kun la Parizaj Jakobanoj. Tien ili sekrete disvastigas sian venenon, ĝin blovas en la mensojn kaj lasas ĝin fermenti. La starigo de fajrejo tiom danĝera por ĉiuj Potencoj, kies regnoj najbaras la landlimon de la Respubliko,

[1] Nomo donita al la ekstremuloj de la Franca Revolucio, ĉar ili kunvenis en malnova ĉambrego jakobana.
[2] La Serenissima Respubliko (Polujo).

tute nature kaj devige ekvekis ilian atenton; ili kune interkonsentiĝis pri la rimedoj por haltigi la malbonon tuj ĉe naskiĝo kaj malproksimigi de siaj landlimoj tiun danĝeran venenon . . .«[1])

Tiun revolucian kaj soldatan patriotismon uzis Napoleono Bonaparte por starigi sian militan imperion. Kiam li poste falis kaj la francaj reĝoj restariĝis sur tronon, ilin malutilis du gravaj faktoj en la okuloj de l' popolo: unue, ke de fremda interveno ili ricevis la kronon kaj due, ke ili provis malfari la revolucion ankaŭ socie.

La postaj reĝimoj estis devigataj alianci kun patriotismo por vivokapabli. La naskiĝinta grandindustrio utiliĝos al milito kaj al nacia defendo. En 1870 la trian respublikon naskis en Parizo la malvenko sendube, sed ankaŭ la rezistemo.[2]) De la franca revolucio la tria respubliko certe perdis la vulkanan forton, ĉar la politika celo estis atingita, sed ĝi konservis sian soldatan patriotismon rigardante al venkinta Germanujo. Tiu sento gajnos la revenkon en 1918.

En Germanujo tian popolan patrujamon vekis la malvenko sub Napoleono Ia. Ĝia fervora filozofo estis Fichte[1]) kaj ĝin profitis la Hohenzollernaj

[1]) Deklaro de la rusa ambasadoro Jacques de Sievers anoncanta la sendon de regimentoj al Polujo kaj la duan dividon de tiu lando (29 Marto -9 Aprilo 1793).

[2]) En Januaro 1931, kiam mortis marŝalo Joffre, la francaj plej ekstremaj socialistoj kiel Paul Faure insistis en sia gazeto *Populaire* pri tio, ke ili kun Jules Guedes kontraŭstaris la forlason de Parizo en 1914 kaj ke la generalstabo devis ĝin defendi pro minaco de popola ribelo.

[1]) J. G. Fichte: *Reden an die Deutsche Nation*, 1813.

princoj. Ili ĝin organizis poste kun helpo de la grand-industrio, kiu ludas ĉefan rolon, ĉar la sango de la soldatoj ne kostas tiom kare.

Se la laboristoj forlasas la patrujaman bazon por alia idealo, tiam la grandindustrio troviĝas al ili en duobla konflikto: interbatalo klasa kaj interbatalo religia inter la nacio sankta kaj la internacio blasfema.

Profitanta el patriotismo kaj mastro de ĝiaj rimedoj, la reganta klaso gvidas tiun senton kaj en ĝin enprofundiĝas. Sed se socia revolucio triumfas kaj forigas la industrion el la manoj de la ĝisnunaj posedantoj, kiom longe ili restas ankoraŭ patriotaj en ŝtato kiu forigis ilin? Tion decidas la religia forteco de ilia propra sento, la eduko, la kutimoj, la hejma moralo ricevita kaj nun ofendata.

Antaŭ ol ĝi troviĝos en tia situacio, la privata industrio sin defendas. Ankaŭ trans la landlimoj ĝi organizas reziston. Ne malpli fervora ol la laborista estas ĝia klasa konscio. Pro logiko ĝi ja devas ankaŭ labori sur tutmonda plano.

Sed malfavore al ĝi ekzistas unu diferenco fundamenta. Ke la laborista klaso kreskigis ian novan religian senton pri tutmonda patrujaro kaj pri egaleca socio, tion ĝi kapablis fari, ĉar ĝi enkalkulas ja nombran amason.

Sed la financistoj kun siaj aferistaj internacioj ne povas disvastigi mistikon pri siaj karteloj. Ne troviĝus publiko por akcepti tion. Ili konsistas el eta malplimulto, kiu perdas la tradician ŝirmilon, se la popolamaso forlasas la prinacian kredon.

Unuflanke ili subtenas la nacian mistikon, al kiu ligas ilin ankaŭ la familiaj sentoj kutimaj. Aliflanke klopodas ilia klaso por sin organizi trans la landlimoj.

Tia internaciismo estas ja pure aferista kaj vidas sin atakata el du flankoj samtempe: de la klaso laborista sur la tutmonda bazo kaj de la popola nacianismo de la mezaj klasoj, kriantaj »mortu hebreoj! mortu kosmopolitaj financistoj!« Tie vi trovos la klarigon de certaj ecoj en faŝistaj aŭ naci-socialistaj movadoj, kiuj timigas iujn riĉajn helpintojn.

Nacia konscio kaj klasa konscio povas naski diversajn kunmetaĵojn. Ili kontraŭstaras aŭ kuniĝas en strangaj interkruciĝoj.

Ankaŭ tre grava diferenco tempa montriĝas. Ĝis la XX-a ceentjaro la profitgajno bazis sur libera konkurado. La komerca sistemo igis la financistojn kontraŭuloj inter si. Nun ilia klaskonscio devigas ilin unuiĝi por rezisti al laboristaj postuloj. Ankaŭ la racio proksimigas ilin per ŝanĝi teknikon. Ilia ekinterkonsento trans la landlimoj malfruas je duoncentjaro kompare kun la internaciemo de laboristoj kaj ankoraŭ regas ĉe ili la konkuremo.

Ne nur al armilfabrikantoj utilas naciismo, sed ankaŭ al ĉiuj industrioj povantaj vivi nur per ŝirmo de doganaj muroj. Se laboristoj minacas la muron, ilin punas senlaboreco, se ili toleras ĝin, ilin frapas multekosta vivo.

Eĉ plie. Se la nacia tradicio fariĝas malutila al iu financa intereso, se la inteligento montras alian rimedon internacian, tiuj supraj klasoj, kiuj oficialigis la patrujamon kiel sian religion, de nun trovos tiun senton survoje kiel baron. Ĝi regas en moroj, en mensoj, en koroj, unuvorte en la aero nacia, kiun ili spiras hejme kaj publike. Ĝin oni pridiskutas nur en rondoj malamikaj al privata kapitalo.

Dum ĝi restas la ĉefa religio de l' supraj kaj de

l' mezaj klasoj, estas tre danĝere agi kontraŭ. Tion oni povas fari malantaŭ kurtenoj ĉe banko aŭ en oficejo. Sed se la kontraŭeco iam malkaŝiĝas al la strato, ĝi tuj estas fimontrata kiel hipokritaĵo. Indignas la popolo kontraŭ financisto, publike patriota kaj aferiste internacia.

Same kiel ĉe scienco, vi konstatas malkonsenton inter la kora kredo kaj la malvarma racio.

## XI.
## *MILITO KAJ REVOLUCIO*

*Sentoj kaj racio — Demokratio juĝata de Mussolini — La Mastroj de gazetaro — Fabrikado de publika opinio — En Okcidento — En Ruslando — Rusaj lernantoj kaj okcidentaj skoltoj — Kredoj novaj — Sovjeta Federacio — Soifas dioj — Revolucia ekscitiĝo — Suspektemo — Fremdaj potencoj kontraŭ Franca Revolucio — Kolektivaj pasioj — Kruelaĵoj de l' malamiko — Maloportunuloj — La Kvakeroj pri kontraŭreligia propagando — Tagore en Moskvo.*

Neniu klaso monopolas malakordon inter sentoj kaj racio. Sed eble la malsupra klaso malpli emas al tio. Ĝi ne komprenas harsplitadon. — Ion klaran ĝi pli ŝatas.

La Franca Revolucio estis klopodo por akordigi ambaŭ. La regnanoj estu egalaj en rajto politika. Oni amu tion, kio estas racia: Egalecon, Liberecon, Fratecon.

En la XIX-a centjaro, ĝenerala voĉdonrajto kaj parlamento simbolas ĉie demokration laŭ anglosaksa modelo. Ĝi restas politika. Estas nepra klapo ebliganta la plendojn, sed ĝi ne estas rimedo sufiĉa kontraŭ la malbonaĵoj.

Kiu nenion posedas, tiu estas nek pli egala, nek pli libera kaj, kiu posedas ion, tiu estas ne pli fratiĝema pro la ekzisto de Parlamento. Limigite je politiko, la demokratio restas malkompleta kaj parola. Ekonomia libereco sen kooperativa egaleco mortigas fratecon.

Jen kiel juĝis Benito Mussolini la demokration en 1930: »La demokratio estas regado, kiu donas aŭ provas doni al la popoloj la *iluzion* pri ilia mastreco. La iloj por krei la iluzion estis diversaj laŭ epokoj aŭ nacioj, sed fundamente kaj cele restis samaj. Jen mia neta opinio.«[1])

Logika konkludo ne signifas, ke fatale necesas nuligi la garantiojn de kontrolo demokrata. Se ili estas parte iluziaj: nova tasko estas ilin igi realaj. Sed por kompletigi sistemon ian ajn, vi ja devas unue konstati la mankojn.

Nu, ĉiu ja bone scias, ke la publikan opinion oni fabrikas per gazetaro. En antaŭaj centjaroj la portantoj de krono decidis mem pri publikaj aferoj. En la XX-a centjaro, granda reĝo de mona kapitalo estas devigata utiligi la malrektan vojon de ĝenerala voĉdono kaj parlamenta vivo. Necesas fabriki voĉdonon kaj opinion de milionoj da homoj. Nura korupto ne sufiĉas. Necesas la presmaŝino.

Ĝi laboras je duobla profito. Ĝi produktas dividendojn kaj opiniojn. Rekta kaj malrekta rikolto. La maŝinon kaptis la diktatoraj sistemoj en Italujo, en Ruslando, k. t. p.

Anstataŭ esti en la manoj de privata grandindu-

[1]) Respondo de Mussolini al Dro Gustave Lebon: *Bases scientifiques d' une philosophie de l' histoire*, Paris 1931.

strio kaj servi por konverti la popolamasojn al ties vidpunkto, la rusa gazetaro pasis en la manojn de doktrinaj marksistoj, kiuj varbadas la publikon al sia filozofio.

Ĝi proklamas sin sendia kaj senpatruja. Fakte ĝi kreskigas alian dion kaj alian patrujon per vortoj novaj. Oni forgesas ĉiam, ke la »sans-culottes«[1]) de la Franca Revolucio ne marŝis kun nudaj femuroj. Ili nur anstataŭis la ĝisgenuajn pantalonetojn per longaj pantalonoj, ankoraŭ uzataj de ni mem.

La religio de Sovjeta Ruslando, kie la portreto de Lenin estas pie respektegata, estas penado por akordigi la fervoran senton kaj la racion en ekonomia mondo. Ĝi estas kvazaŭ nova eklezio pozitivista.

En la lernejo, la rusaj infanoj lernas malami »la superstiĉojn de Okcidento, ĝiajn idolojn kaj tiranojn.« Ili kredas ekzemple, ke »la burĝaj skoltoj emas nur al rekompenco kaj militaj honoroj, ke ili volas ĉion por si mem individue, ne por ĉies bono. Ni, ruĝaj pioniroj, ni volas nenion por ni mem. Kiun bonon ni faras por ĉiuj, tiun ankaŭ ni mem profitas. Al vilaĝoj ni iras por instrui la kamparanojn kiel vivi pure kaj kiel atingi tion. Ni ludas por ili teatraĵojn, k. t. p.« [2])

La dio de tiuj knaboj estas absoluta egaleco ekonomia kaj servado al la komuno. Nomi tion »patrujo« estus abomene por ili. Iliaj »senpatrujaj« patroj aŭ pliaĝaj fratoj defendis sovjetan Ruslandon kun ardo nevenkebla kontraŭ armeoj »blankaj« aŭ fremdaj kaj

[1]) »Senpantalonetuloj«, nomaĉo donita moke al malnobeluloj, kiuj ne portis la kutiman pantaloneton ĝisgenuan kun ŝtrumpoj kaj palaca ŝueto.

[2]) Respondo de rusa knabo al Rabindranath Tagore, *The visva-Bharati Quarterly. Nov. 1930.*

fine favoris la nacian revekiĝon de dudek nacioj, kiun carismo provis rusigi. Ili kreis respublikojn armenan, tartaran, kirgizan, ukrajnan, k. t. p. kie iliaj reprezentantoj devis oficialigi kaj mem lerni lingvojn, kiuj pli frue rajtis nur silenti antaŭ la rusa.

Kio ankaŭ impresis eksterulon post la revolucio, tio estis malapero de luksaĵoj, ĝeneraligo de malriĉaj vestoj, deviga laboro, egaleco en penado, vastaj kuracejoj, akuŝejoj, kooperativaj magazenoj, kluboj, bibliotekoj, grandegaj ŝtatentreprenoj. Impresis ankaŭ timo pri atako, suspektemo, malamo al kontraŭuloj, persekuto de dubuloj, kondamnoj severaj, k. t. p. Relegu la novelon de Anatole France »soifas dioj« por iom kompreni similan atmosferon.

Pli ol unu revolucio komenciĝas en bonkora entuziasmo. Sed kiam alvenas rezisto aŭ kontraŭatako, tiam okazas milito kaj stariĝas la stato de sieĝo. Obstino, malmildeco, malfidemo fariĝas virtoj civitaj. Minacata revolucio streĉas la nervojn de la popolo en duobla defendo. Se klasa kaj nacia konscioj kuniĝas, ilia kuna potenco fariĝas ega, ĉar la popolamaso defendas tiam sian akiron kaj bienon.

Revolucia streĉo ofendas la pli fruajn kutimojn de politika mildeco tie, kie ili ekzistis antaŭe. Nu, la popolo konis en Francujo la Bastillan fortikaĵon, en Ruslando malliberejon, ekzilejon, pendigejon kaj venĝajn bombojn. Tiam surloke la nova streĉo ne tiom impresis. Ĝi pli frapis eksterulon, se li kutimis je pli milda stato.

Ju pli daŭras minaco kaj timo, despli enprofundiĝas la sieĝa sinteno en la kolektivan animon. Malamo kaj milito fariĝas partoj de la nova religio. Nova speco de patrujamo naskiĝis: militema kaj vulkana.

Kiuj timas ĝin, provokas ĝin. Kiuj atakas ĝin, fortigas ĝin. Vera konkurado je pasiaj armadoj aldoniĝas al la jama konkurado je materiaj armiloj.

Provante detrui la Francan Revolucion, la eŭropaj potencoj nur forĝis ties glavon. Kaj ĝi venkis ilin. Siavice la venkitaj nacioj devis elektriĝi poste por fine forigi Napoleonon.

Kiom da pasioj leviĝis! Kiom da sango verŝiĝis en tiuj frapoj kaj kontraŭfrapoj, similaj al montaj eĥoj, ripetataj kaj resendataj! Vane avertis la princojn kelkaj saĝuloj en Anglujo kaj Germanujo: Ne tiklu la ruĝan ĉapon. Ĝi fariĝos dukorna!

Nek utilas instruoj, nek aŭskultas pasio la trankvilan saĝon.

Cetere la perforto ofendas pli multe, kiam ĝin uzas la najbaro. Mem uzi ĝin por sia celo, tion oni trovas pli natura. Se la kontraŭulo faras tion, oni komprenenble indignas. Rigardu batalon de du knaboj per pugnobatoj. Al neniu el ambaŭ ja venus la ideo ekhalti unuavice, sed ambaŭ ja krias: »La alia komencis«!

Tia kulpigo reciproka entenas juĝon etikan, eĉ se ĝi turniĝas al malprava adreso. Ĉe militoj, oni ĉiam deziras pezigi la respondecon pri la komenco sur la dorson de l' malamiko. Kontraŭ li oni multobligas ĉiajn rakontojn pri kruelaĵoj eblaj aŭ neeblaj.

Okazas stranga miksaĵo de moralo kaj malmoralo. Unuaflanke la homa sento pruviĝas kontraŭa je militaj agoj. Aliflanke enmiksiĝas ia gusto pri certaj abomenaĵoj. Tion facile klarigas la psikanalizo. Brutalaj emoj, speciale seksa perforto, manifestiĝas unue tiel, ke oni imagas la konduton de la kontraŭuloj. Poste oni tro-

grandiĝas ĝin en senkonscia furiozo. El tio devenas la revenĝoj.

En la grandaj araj ekflamiĝoj kompreneble la plej pasiaj tipoj fariĝas gvidantoj. Ili harmonias kun la fluo. Kaj rapide la fluo mem aperigas proprajn ecojn. Ili ne konsistas el la sumo de l' individuaj emoj, sed el nova kunfandaĵo kun propraj ecoj. Oni komparis ĝin al bronzo, kies propraĵoj estas malsamaj ol tiuj de kupro kaj stano.[1])

Se kontraŭ la kolektivaj fluoj stariĝas trankvilaj aŭ kritikaj juĝoj, ili aspektas kiel maloportunaĵoj aŭ kiel ruĝa tuko al virbovo. La torentaj ondoj forrulas la rokon aŭ reŝprucas en ŝaŭma kaskado.

En sia verko *La perfido de l' kleruloj* Julien Benda mencias la sorton de ribelantoj. Li citas la ekzemplon de Romain Rolland, sola kontraŭ ĉiuj en sia lando kaj spitanta la ventegon de l' insultoj.[2])

Kiam oni vidas, kian koleron ili senĉeniĝas, kvazaŭ freneza ŝajnas ilia interveno kontraŭ tia subakviĝo. Kiel teni spegulon antaŭ leono, dum ĝi faras saltegon? Kiel proponi al blekanta nacio, ke ĝi turnu kontraŭ sin mem sian moralan kritikon kun ĝia mordo kaj acido? Ĝi pli emas vidi kiel serpenton malamikan iun ajn kuraciston kun tia medicino.

Kaj tamen agas la serumo. Ĝi pripensiĝas kelkajn homojn. Kiam la ventego jam forpasis, ilia nombro milobliĝas. La operacio ŝajnas malpli doloriga poste. Kio suferiĝas, tio estas la tro kruda kontrasto.

Kiam la indignanta rusa revolucio ekbatalis kontraŭ religio por delogi la popolon de la malnova car-

1) Vidu la Regulojn de sociologia metodo de *Durkheim*, Alcan, Paris.

2) Vidu la konkludan ĉapitron de tiu ĉi libro.

eklezio, ĝi vipadis sendistinge. Eĉ la fremdaj kvakeroj (Societo de l' amikoj) devis submetiĝi al la malpermesoj pri lernejo, kvankam ili tiom faris por helpi rusajn infanojn dum la malsatego.

Eksterlande multobliĝis la protestoj ekleziaj per publikaj kunvenegoj, manifestoj, gazetincitoj, predikoj en preĝejoj kaj eĉ minacoj de interveno. Eĉ militon oni rajtis timi.

Jen kiel esprimiĝas pri tio la rezolucio de la jarkunveno de l' kvakera Societo de l' Amikoj, kunvokita en Londono dum Majo 1930:

»Pri Ruslando ni penu kompreni la senton, sur kiu bazas ĝia revolucio, tiun fidan kredon, kiu inspiras grandan nombron el ĝiaj regnanoj, konvinkitaj, ke ili trovis novan vivregulon. Eĉ tion ni devas ekkompreni, ke, atakante religion, ili intencas batali kontraŭ nerealo kaj superstiĉo kun la espero liberigi tiujn, kiuj ankoraŭ estas malliberaj. Ni atentu, ke nin ne blindigu niaj antaŭjuĝoj aŭ eraroj... La emo, kiun bezonas la mondo, estas la frata komprenemo de Jesuo. Ĉu ni bone scias, kion signifas esti liaj amikoj?«[1])

Tia dokumento de religia kongreso kontrastis en impresa maniero kun ĉiaj koleraj deklaroj de la grandaj kristanaj eklezioj en Okcidento. Eĉ nekredebla ĝi aspektis al multaj legantoj.

Samepoke la hinda poeto Tagore vizitis Moskvon. Jen la konkludo de lia adiaŭa parolado[2]) post danko kaj laŭdo pri la klopodoj popoledukaj:

[1]) Kunveno de 22 ĝis 28 Majo 1930. *L' Echo des Amis*, 1930.

[2]) Presita de *Isvestja*, represita de *Manchester Guardian Weekly*, 17 Oktobro 1930 kaj de *Visva Bharati Quarterly* Nov. 1930.

»Unu demandon mi faros al vi: Ĉu vi vere utilas al via celo veki en la menso de viaj edukatoj la koleron, la klasan malamon kaj la senton de venĝemo kontraŭ tiuj, kiujn vi konsideras kiel malamikojn? Certe vi devas kontraŭbatali terurajn malamikojn, vi devas venki la nescion, la malkomprenon kaj ĉiam akran kontraŭstaron. Sed ne limiĝas via rolo al via sola nacio aŭ al sola partio; ĝi celas ne malpli ol plijustigi la tutan homaron laŭ viaj ideoj.

»Nu, ĉu la homaro ne entenas ankaŭ tiujn, kiuj ne konsentas kun viaj intencoj? Tute same kiel vi provas al tiuj vilaĝanoj, kiuj diversopinias de vi pri religio aŭ ekonomio, helpi ne kolerante kontraŭ ili, sed instruante ilin kaj pacience montrante al ili, kie kaŝiĝas la malbono, ĉu ne tiel same vi devas plenumi vian rolon al la ceteraj popoloj havantaj ne samajn idealojn kiel vi?

»Perforto naskas perforton kaj blindan malspritecon. Necesas libereco spirita por ebligi akcepton de kredo. Teruro ĝin mortigas senapelacie. Bruton ne povas subigi bruto. Nur homo kapablas tion. Tio estas vero ĉiutage konfirmita de nia homa historio...«

Rezolucio de la kvakeroj en Anglujo, adiaŭo de Tagore al Ruslando, jen du klopodoj por veki al sinkritiko la konscion de popolo dum religia kaj politika pasio. Unu devenis el interno, l' alia de amiko simpatia. Nemulte malsamas la reagoj en ambaŭ okazoj.

## XII.
## *POPOLA KONDUTO EN HINDUJO*

*Memoroj pri Budho — Reĝo Aŝoka — Greka atesto — Gandhi — Novaj rimedoj — Malnovaj celoj — William James pri sperto — Lord Irwin pri Gandhi — Danĝeroj de perforto — Hindoj kaj mahometanoj — Rezisto sen perforto — Batalo pro la salo en 1930 — Gandhi pri politikaj mortigoj — Disciplimo de Satjagrahistoj — Buĉado en Peŝavar — Malobeo — Senarma heroeco — Batalhalto en 1931 — Valoro de la eksperimento*

Ke faman Hindon kiel Tagore priokupas la senfina rondo de perforto, nenio estas pli natura. Ĝuste tie kuŝas la plej alta kultura tradicio de lia lando. En la sesa centjaro antaŭ Jesu-Kristo jam insistis Budho pri tio tra urboj kaj vilaĝoj de Hindujo, kvankam ne nova estis la ideo, eĉ liatempe. Jam en antikvaj vedaskriboj ĝi troviĝas.

Al siaj sekvantoj Budho klarigis kiamaniere ĉiuj vibroj eĥas kaj refortiĝas.

»Neniam per malamo ĉesas malamo, nur per amo ĝi ĉesas, jen antikva sperto[1])... Koleron venku per

[1]) Dhammapada I. 5.

bonvolo, malbonon per bono, ĵaluzon per malavaro, mensogon per vero[1]).«

En la tria centjaro antaŭ Jesu-Kristo la reĝo Aŝoka, konvertita al budhismo, pli profunde akceptas ĝian sencon ol imperiestro Konstanteno komprenos la sencon de l' kristanismo.

Tion atestas la kariero de Aŝoka kaj la retrovitaj surskribaĵoj.

Tra tuta Hindujo staras ankoraŭ multaj el liaj kolonegoj kun reĝaj alvokoj al la popolo.

Publike li bedaŭras la militajn buĉojn. Eĉ pentas li pri tiom da bestoj antaŭe buĉitaj por lia tablo. Post sia konverto li decidas, ne nur ĉesigi mortigojn, sed kuracigi malsanajn homojn kaj bestojn kaj plantigi medicinajn arbojn por sia regno kaj por la najbaraj landoj.

La kvara dekreto, surskribita sur la roko en Girnar, laŭde konstatas »la ĉesigon de mortigo kaj kruelo al vivantaj estaĵoj« kiel gratulinde kreskintajn virtojn.[2])

En 302 antaŭ J. K., Megasteno, greka sendito de Seleŭcido al la kortego de reĝo Ĉandragupta, jam duoncentjaron antaŭ Aŝoka, raportas, ke la hindoj en la valo Ganĝa ne posedas sklavojn, ke tie la edzinoj estas ĉastaj, la pordoj senseruraj, la paroloj senmensogaj kaj la procesoj tre maloftaj. Feliĉa lando.

Sed malproksime de ni staras la spertoj de budhismo en Hindujo, eĉ pli malproksime tiuj de Iĥnaton en Egipto.

Ke moderna hinda poeto same rigardas la per-

[1]) Dhammapada XVII. 223. *Sacred Books of the East.* Angla traduko de Max Müller.

[2]) Barthélémy *Saint-Hilaire: Le Bouddha et sa religion* Paris, 1862.

forton kiel Budho jam faris, tio malmulte gravas al okuloj de la realistoj. En la nuboj loĝas la filozofoj. Kiuj brave tenas la manojn en la koto de l' agado, kiuj havas la ĉiutagan zorgon pri tuta popolo kaj tujan devon pri venko aŭ defendo, kion ili ja povas fari krom ridi kaj skueti la ŝultrojn pri tiaj belaĵoj: »Vi revas, dum ni agas.«

Ĉiu nacia defendo, ĉiu revolucio memorigas la filozofojn, ke ĝi protektas ilian vivon kaj laboras por ili. Se ili ne konfesas tion, ĝi malliberigas aŭ mortigas ilin por tion pruvi.

Sed se realisto mem, ŝtatisto aŭ gvidanto de revolucio, interesiĝas pri tiu senfina rondo de perforto kaj ekzorgas pri la problemo anstataŭ ĝin malatenti, jen okazo multe pli frapa.

En mondo malfermita al scienco, la nuraj ideoj ne plu impresas. Nur gravas la sperto ĉe praktika racio. Ni ne plendu pri tio. Kian faktan valoron havas eĉ la plej bela evangelio parola, se neniu vivo pruvas, ke ĝi estas realigebla?

Gandhi ne legis William James, la pragmatiston. Sed same li serĉis la veron kiel li, ĉe la flanko de la sperto kaj provo.

Atenton vekas la rusa revolucio pro sia teknika provo, la hinda pro sia etika eksperimento. Fakte montriĝas noveco teknika en ambaŭ. Kio estas nova en Ruslando, tio estas la celo. En Hindujo la rimedo.

Vastega nacio batalanta por liberiĝi el fremda rego? Jam aliajn oni vidis. Unu plia naciismo. Neevitebla ĝi estis. Kio la mondon interesas pli, tio estas ribelo gvidata laŭ metodoj ĝis nun malofte provitaj.

Okazu kio ajn poste, la eksperimento de Gandhi restas akiraĵo de Historio.

La celo estas gajni venkon ne kaŭzante revenĝon. Gvidi batalon ne verŝigante la sangon de l' kontraŭulo. Flamigi nombregan popolon ne donante al ĝi kutimojn de perforto. Tia estas la ideo de la gvidanto. Ne nur religia konvinko lin instigas, sed konkludo deduktita el antaŭaj spertoj privataj kaj publikaj.

Ĉe la grandaj etikaj iniciatuloj, religio ne estas blinda fervoro kiel ĉe la popolamaso. Ĝi pli konsistas el saĝo, proponema nur post observado, pripenso kaj elkonkludo. Eĉ oni rajtas demandi sin, ĉu la sama vorto taŭgas por nomi ambaŭ aferojn. Ĉe tiaj homoj la religia elemento estas amo, kiu vidas la adorindaĵon en la ceteraj vivantoj.

Antaŭ ol forlasi Hindujon kaj antaŭ ol diskuti batalhalton kun Gandhi, la vic-reĝo Lord Irwin alparolis la konsilantaron en Delhi. La reganto malaprobas la civilan malobeon »kiu detruas la respekton al la leĝoj«, sed la homo ne povas ne admiri ĉe Gandhi »tiun moralan forton, kiu instigas lin rigardi nenian oferon tro granda por tio, kion li kredas bono por sia amata Hindujo.«

Tian respekton oni povas ja esprimi al ĉiuj absolute malavaraj patrujamantoj. Sed jen la diferenco: Por multaj el ili la plej supera bono kuŝas en la sendependeco de la patrujo. Por Gandhi ĝi kuŝas en la konduto de tiu patrujo. Li deziras por sia lando la samon, al kio sopiris la pensulo Vinet por la homo: Ke li estu mastro de si mem por kapabli vivi libere. Gandhi konsentas ataki la leĝon el ekstere truditan nur tiom, kiom akceptas la popolo internan mem-disciplinon, pli firman ol tiu leĝo.

Se Hindujo ribelus per armiloj, jen daŭrus la senfina rondo. Ĝi signifus ne nur sangan repremon,

venĝon kaj revenĝon; sed ĝi ankaŭ signifus Hindujon mem venenita, kun armiloj turnotaj kontraŭ si mem, inter hinduanoj kaj islamanoj, en okazo de disputo.

Sed, antaŭ ĉio, ĝi signifus, ke ĝia patrujamo simple aldoniĝus al ĉiuj ceteraj naciismoj naskitaj en milito kaj konservantaj sur lipoj ian guston de tiu malsaniga lakto.

Je kio utilas ja regno libera, korpo memstara, se l' animo de la nacio malprogresis al bruteco? Je kio utilas unu plia tigro en la societo de la popoloj, eĉ se temas pri propra patrujo?

»Vi promesis ne uzi perforton, memorigas Gandhi al popolamaso en Delhi. La vivon de ĉiu anglo kaj anglino ni devas protekti eĉ je risko de la nia. Prefere estus aĉeti ilian ŝtofon kaj morti ĉiuj pro malsato ol permesi unu solan mankon en la paca disciplino de nia bojkoto. Kiuj ne kapablas plenumi promeson, tiuj estas maturaj nur por sklaveco.«[1])

La celo estas venki potencan imperion ne eligante la glavon kaj ne humiligante la kontraŭulon. La rimedo estas impresi por ke li akceptu egalecon, ne frakason. »Malfacile kredas nia publika opinio, ke iam la angloj faros al ni sinceran proponon.

Mi ne same opinias. La britoj estas praktika raso. Ili ŝatas liberecon por si. Ĝin ami ankaŭ por la ceteraj, tio estas nur unu paŝo plue.«[2])

Por instigi la kontraŭulon, ke li ja paŝu tian paŝon plue, Gandhi organizis, ne la *senreziston,* kiel oni tute malprave diras, sed male la *reziston* en formo

1) Alparolo de Gandhi al popolamaso en Delhi dum la traktado kun la Vic-Reĝo, februaro 1931.

2) Deklaroj al korespondanto de *Times* en Delhi, 6 Marto 1931.

de civila malobeo sen armiloj kaj sen perforto. Estas ja la principo de laborhaltoj, bojkotoj aŭ rifuzoj de l' imposto.

Pluraj similaj rimedoj estis jam konataj, sed ne grandskale kiel iloj de nacia ribelo.

En 1930 Gandhi elektis la sal-imposton kiel simbolon de l' fremdula regado. Por pruvi al Anglujo, ke ĝi ne povos daŭrigi kontraŭ ili sian monopolon de la salo, la hindoj ekspitis ĝin amase. En urboj oni samtempe bojkotadis anglajn komercaĵojn; viroj kaj virinoj en procesio tra la stratoj malobeadis ordonojn de la polico; sur la ŝultrojn ekpluvis jam batoj; la hindoj nur faldis la brakojn.

En vilaĝoj la kamparanoj rifuzadis imposton. Kampoj kaj domaĉoj estis forprenataj, ankaŭ la brutaro. Ekmigris la homoj.

Ĉe bordoj de l' maro ili kolektis salon. Sur sian sakon ili eksidis, kiam alvenis la polico por ĝin preni. La provizon ili ne liveris, ĝis ili falis sub la batoj. Al flegejoj ruliĝadis ambulancoj, al malliberejoj la motorvagonoj, plenaj de kaptitoj.

La budĝeto de Brita Hindujo baldaŭ montris egan deficiton. Ankaŭ la anglaj importoj falis al duono kaj eĉ suben. Policestroj laciĝis baldaŭ. Ankaŭ la guberniestroj.

Malaperis aŭtoritato kaj obeo. La plej honestaj homoj sin lasis kondamni sen respondo al la juĝisto. Ili rifuzis lin rekoni kaj ekelektis proprajn arbitraciantojn pri siaj aferoj en vilaĝoj.

Impresite de la faktoj, fine rekonas la konferenco Londona la rajton de Hindujo al memregado. Federacion oni starigos kun ministraroj respondecaj al provincaj parlamentoj kaj ankaŭ centran registaron

duone respondecan al elektitoj de l' popolo. Gandhi estas ellasata el malliberejo.

Li ekzamenas la projekton. Li esploras la singardojn kaj limigojn de la rajtoj. Tamen aperas antaŭenpaŝo. Hodiaŭ oni ekkonsentas pri tio, kion oni hieraŭ ne volis ja cedi. Venu kaj diskutu kun ni! ekkrias la vic-reĝo en parolado. Vere havus la plej nobla parto de la hinda junularo ion pli taŭgan por fari ol putri en malliberejo.

Ankaŭ pri tio pensas Gandhi. Nenia ribelo povas senhalte daŭri. Sinsekvas tempoj de fervoro kaj tempoj de laciĝo. La malalta vireto en blanka tolaĵo, vestita kiel ĉiuj hindoj malriĉaj, supreniras la ŝtupojn al imperia palaco. Dum du semajnoj enfermiĝas la vicreĝo kun li ĉiutage dum la posttagmezo, la vesperon kaj eĉ foje la nokton ĝis la dua matene. Ili traktadas.

Nekredeble! En la Ĉambro de la Lordoj, en la kolonelaj kluboj, oni ekskuas la kapon kvazaŭ la mondo proksimiĝus al sia fino. Vi devas kompreni, kion signifas prestiĝo centjara kaj tiu pompa soleno, kiu ĉirkaŭas la reprezentanton de la Reĝo-Imperiestro. Ĵus li inaŭguris sian novan palacon, kostintan milionojn. Necesas, ke lia eksteraĵo estu pli grandioza ol tiu de la reĝoj kaj maharaĝoj regantaj la kelkcent regnetojn disajn inter la vasta teritorio de Brita Hindujo.[1]) Necesas impresi la Orientanojn, asertas koloneloj.

Sed iom pli penis Lord Irwin ol ili por ekkompreni l' animon de la lando. Li ja scias bone, ke tiu tempo jam pasis. Pli facile ol Poncio-Pilato, li

[1]) Inter la Brita Teritorio administrata de britaj provincestroj kaj la teritorio de la reĝlandoj estas proporcio de du trionoj kontraŭ unu. Proporcio de la loĝantaro 4/5 kontraŭ 1/5.

ekvidis, kiu nun estas la vera reĝo de la koroj kaj la espero de l' popoloj.

Li do pacience diskutas kun la vireto ĝojema, apud kiu estas neeble mensogi. »La tutan tempon mi sentis, diris poste la vic-reĝo, ke mi povas absolute fidi lian vorton.« Siaflanke kiel amikon traktas Gandhi sian persekutinton.

Ili interparolas. Unu tagon Gandhi ne revenas por vespermanĝo. Ĉar li nenion plu manĝas post la subiro de l' suno, sekvantino Miraben alportas kapran lakton kaj daktilojn.

Fine, je la dua matene, li revenas kaj vekas siajn kunulojn. La interkonsento estas preta. Ili aprobas ĝin kaj postan tagon ĝi estas subskribita.

La civila malobeo estas interrompita. Malfermiĝas la pordoj de l' malliberejoj. Tridek mil viroj kaj virinoj elflugas en ĝojaj abelaroj. Brutaro, kampoj kaj kabanoj estas redonotaj al la vilaĝanoj. De nun la marbordanoj rajtos kolekti kaj vendi la salon de l' naturo. Rajtos ankaŭ virinoj daŭrigi la kontrolstaradon apud ŝtofbutikoj kaj drinkvendejoj por influi la publikon per pacaj alvokoj. La polico ĉesos ilin persekuti.

Interŝanĝe Gandhi rezignas postuli enketon pri la pasintaj brutalaĵoj. La kontraŭulon li ne deziras humiligi, sed konvinki.

Tuj poste malfermiĝis la granda Kongreso nacia por sendependeco. Tie pledas Gandhi ke oni konsentu diskuti rekte kun Anglujo pri starigo de konstitucio kaj traktado inter egaluloj. Sudafriko estas ja memstara ŝtato, kaj Hindujo malakceptos esti nura kolonio, kies budĝeton povos rifuzi fremda vic-reĝo.

Grava restas la financa problemo, ĉar Anglujo timas, ke oni ne repagos la ŝtatan ŝuldon.

»Ni ja pagos, diras Gandhi, sed arbitracintoj unue juĝu la veran ŝuldon kaj apartigu la elspezojn faritajn por Hindujo kaj Anglujo.«

Kio ajn poste okazis, tiu halto interkonsenta estis venko de la paco. Unuafoje en Historio, nacia revolucio grandskale pruvis la potencon de nova batalmetodo sen armiloj kaj sen perforto. Tio estis granda sukceso.

Gandhi kompreneble havas hindajn kontraŭulojn, kiuj nomas lin naiva kaj preferas ĵeti bombojn. Kelkcentojn da junuloj en Bengalo.[1])

Kiam ili riskas mem sian vivon, Gandhi ne neas ilian kuraĝecon, sed abomenas ilian metodon. Pro ĝi suferas li kaj la afero. Al tiuj, kies koro surdiĝis pro pasio politika, li parolas per logiko: »Se vi mortigis homon, kiu vin ĝenis, eble vi sentas malveran sekurecon. Ĝi ne daŭros: Ĉar vi ne estos mortiginta la realan kaŭzon. Venos aliaj homoj kaj ekstaros por bari siavice vian vojon. Via tasko do ne estas ilin mortigi, sed ja trovi la kaŭzon de ilia kontraŭstaro kaj pri tio zorgi.«[2])

Same li parolas al tiuj, kiuj uzas minacon anstataŭ konvinko en striko aŭ bojkoto: »Kiu cedas al perforto aŭ timigo, konservas en si venĝemon kaj nur atendas favoran okazon por reveni al sia pli frua konduto. Li revenĝos kiel eble plej baldaŭ . . .

[1]) Angla oficialulo konstatis en *The Times* en 1933, ke la sumo de tiuj anoj de mortiga metodo atingas maksimume trimil por tuta Hindujo kun 350 milionoj da loĝantoj.

[2]) *Young India*, 26 Februaro 1931.

Ĉia formo de perforto fine malutilas kaj, el pasintaj suferoj, ni povos profiti nur la rezultatojn atingitajn sen perforto per memvola sufero«[1])

Du semajnojn poste, Gandhi memorigas siajn samlandanojn ke: »ĉe la hinda flanko estu por ni honordevo rigardi la vivon kaj honoron de britoj egale respektindaj kiom la niajn. Tio ne signifas kaj ne bezonas signifi la nuligon de angla komerco aŭ anglaj interesoj[2]). Kion oni trafu, tio estas egaleco por ĉiuj.«

[1]) *Young India*, 9 Marto 1931. Vidu ankaŭ la promesojn subskribitajn de la volontuloj (Satjagrahi) en la movado por civila malobeo. Represis ilin la *Indian Events*, 30 Januaro 1931. La vorto *satja* signifas verecon kaj *graha* efikon:

1. Satjagrahisto ne koleru.
2. Li elportu la koleron de kontraŭulo.
3. En tia sinteno li ricevu la atakon de kontraŭulo, neniam uzante revenĝon, sed al nenia kolera ordono li submetiĝu pro timo je puno aŭ pro simila kaŭzo.
4. Se iu reprezentanto de l' registaro provas lin aresti, Satjagrahisto memvole akceptu la malliberigon kaj ne kontraŭstaru la forprenon de liaj bienoj, se la registaro volas ilin konfiski.
5. Se Satjagrahisto havas ion al li konfiditan, li rifuzu ĝin liveri, eĉ se li devos perdi la vivon pro tiu defendo. Sed li tamen ne uzu perforton kontraŭ perforto.
6. Nenia revenĝo, sekve neniaj blasfemoj aŭ malbenoj.
7. Sekve Satjagrahisto neniam insultu kontraŭulon kaj uzu neniun el la ĵus eltrovitaj kriaĵoj kontraŭaj al la senco de ne-perforto.
8. Satjagrahisto ne salutu la *Union Jack* flagon, sed ankaŭ ne insultu ĝin kaj ankaŭ ne la oficialulojn, ĉu anglajn, ĉu hindajn.
9. Dum paca batalo, se iu ajn insultos aŭ atakos oficialulon, Satjagrahisto protektu la insultitan aŭ atakitan, eĉ riskante sian propran vivon.

[2]) *Young India*, 23 Marto 1931.

Daŭre rakontos la Historio de Hindujo pri la okazintaĵoj en aprilo 1930.

Anglaj ĵurnalistoj, alte sur tegmento starantaj, rigardis en la stratoj la senfinajn procesiojn, haltigitajn de polico kaj rifuzantajn cedi: dekmilojn da viroj kaj virinoj amase eksidantajn surtere kaj barantajn la trafikon, ĝis oni fine lasis ilin ekmarŝi antaŭen.

La 16. Aprilo, apud Patna, procesio de l' volontuloj pasigas la tutan tagon kaj nokton sur strato sen manĝo kaj trinko. La polico fortranĉas eblecojn de komunikado.

Matene la sieĝo daŭras. Alvenas kavalerio kun ambulanco. Nova minacordono. Neniu moviĝas. Lasta minacordono. Ĉiuj kuŝiĝas sur la strato. Ataku: Ekkuras la kavalerio, sed haltas la ĉevaloj antaŭ la kuŝantoj en impresa rango.

En Peŝavar du taĉmentoj de soldatoj eĉ rifuzis pafi kaj iris al milita juĝejo. La 23. Aprilo 1930. motorvagono transportadis arestitojn. Krevis pneumatiko rada. La kaptitoj honorparole daŭrigis la vojon piede. Ĝis la pordo de l' malliberejo ilin ovacias la popolo.

Kiam l'amaso revenas urben, ĝi renkontas tankojn. Unu bruliĝas. Akcidente, diras hindoj. Venĝe, diras angloj. Ĉiuokaze pafas angla kompanio fronte sur amason. Falas unu rango kun infanoj kaj virinoj. Tiam antaŭpaŝas dua rango, malkovras la brustojn kaj sin proponas al buĉo. Ripetiĝas la sceno je mirego de l' anglaj gazetoj en Lahore.

Por algvidi la homojn ĝis tia heroeco, necesas en ili veki la saman oferpovon kiel por milito, sed ja sen la brutala kaj mortiga kontraŭparto. Male. Ne-

cesas esti preta je morto sed samtempe kapabla ne mortigi, nek vundi, nek insulti.

Tia heroismo akordiĝas kun la civila moralo, ĉar la militvirtoj aldoniĝas al la pacvirtoj, sed ne kontraŭas ilin.

Antaŭe certigi, ke tion ne kapablus popolo, tio signifas juĝi nacion pli brutala ol brava. Tion ne pruvis militoj laŭ atesto de la plej fervoraj patriotoj.

Ĉiuokaze la okazintaĵoj en Hindujo montris la tiean popolon pli brava ol brutala. Ankaŭ la virinoj partoprenis la movadon kaj la paca batalo en 1930 sukcesis ja multe pli bone ol tiu en 1920, malpli vasta kaj malpli daŭra.

Nur pripensu, kiom da milionoj da mortintoj necesus por devigi per milito Britujon, ke ĝi subskribu batalhalton kun tiaj kondiĉoj, kiom cedis Lord Irwin al Gandhi en Marto 1931.

Sendube suferis sesdek mil Hindoj en malliberejo kaj miloj da viroj kaj virinoj estis vunditaj de batoj. Sed relative malmultaj mortoj okazis. Ne cedus la angloj pri la salimposto, se ne estus laca la polico bati per ferumitaj stangoj senarmajn popolamasojn de la Nordo ĝis la Sudo. Kaj same laca estas la angla popolo mem, kiam ĝi aŭdas pri tiaj aferoj.

Sed kiel respektis la pacan disciplinon la hindaj amasoj dum jarlonga batalado? Sian promeson plenumis la volontuloj de *satiagraha*. Ili ja subskribe deklaris, ke ili ne redonos la batojn. Plej ofte respektis ankaŭ la popolamaso ilian alvokon al ne-perforto. Sed la publiko ja nenion subskribis.

En iuj aŭ aliaj lokoj, indignantaj ĉeestantoj ekĵetis ŝtonojn kaj polico pafis.

En Bombaj la popolo krie hontigis tiujn, kiuj

levis ŝtonojn. Okazis ankaŭ iuj atencoj de la junula terorista partio kontraŭa al Gandhi,[1]) sed la proporcio estas malgrandega kompare kun Eŭropo. Entute regis tra la tuta lando rimarkinda disciplino.

Ankaŭ terurajn buĉadojn oni antaŭdiris inter hinduanoj kaj musulmanoj. En 1930 ili preskaŭ ĉie kunmarŝis harmonie. La sola iom grava interbatiĝo okazis post la batalhalto, kiam la registaro ekzekutis politikan atencinton.

»Tamen estas ludo per fajro tiu tuta afero!« ekkrias tiuj Okcidentanoj, kiuj ne timas mem amasigi maŝinpafilojn en la proprajn armilejojn. Ili forgesas tion, ke ne Gandhi eltrovis la hindan sopiron al liberiĝo.

La ribelo estis neevitebla kaj preta iaforme eksplodi post la granda seniluziiĝo de 1919. Ĝis tiam oni konis nur la kruelan militribelon de 1857 kaj poste la teroristan metodon por hinda revolucio. En siaj palacoj, anglaj oficistoj devis timi atencojn en ĉiuj koridoroj.

Kiam okazis la buĉego en Amritsar kontraŭ senarma kunveno, venĝa ondego povus dronigi en sango kelkmilojn da angloj, disperditaj en marego de tricent milionoj da ofenditoj. Ilin protektis la ne-perforto.

Patrujama Hindujo venigis Gandhi, laborintan dum dudek jaroj en Sudafriko por helpi siajn samlandanojn tie persekutitajn pro la kolorbaro.

La hinda publiko ja legis pri liaj provoj en laborstrikoj per absoluta neperforto tie. Lian senmakulan humanecon oni konis. Tion li ne volis rezigni.

[1]) Gandhi nomis la Chittagong-atakon kontraŭ policejo »perforto tiom riproĉinda, kiom tiu de la registaro« (*Young India.* 24. Aprilo 1931.)

Sian helpon li konsentis nur se ĉoni samtempe akceptas lian metodon. Pliposte dum pluraj jaroj li retiriĝis for, kiam la Kongreso preferis alian vojon.

Gandhi ne eltrovis la hindan vekiĝon, sed li kreis ĝian formon en 1920 kaj ĝian forton en 1930. Lia plej granda merito laŭ Tagore estas, ke li sukcesis liberigi sian popolon de timo.[1])

Ne ian ajn Hindujon li deziras, sed puran, sentiman, senkriman kaj senmensogan Hindujon. Sciante, ke daŭras la rimedoj kaj forkuras la celoj, li volas, ke la rimedoj fariĝu lernejo por la popolo kaj ke ties animo estu formata per kutimoj helpontaj la homojn al kunvivo, ne al sindetruo.

Ankoraŭ longe la homaj aroj devos batali por justeco kaj libereco. Ne mankos okazoj de konfliktoj. Se l' abomeno pri la milito kaj la ekzemplo de Hindujo iom post iom gvidus ilin al malsama kutimo kaj al alia metodo ol milito, ĉu ili ne estus lernintaj unu el la plej grandaj instruoj de historio kaj prahistorio? Ĝi estus trovaĵo ne malpli grava ol la lerno pri fajro.[2])

Ĉiuj ni kredas je la graveco de niaj celoj. Tamen ili ŝanĝiĝas de centjaro al centjaro. Sed la militrimedo estas miljara multoble. Ŝanĝi la procedon signifus egan renverson.

Nia inteligento ĵus eltrovis novan teknikon por mortigi tutajn loĝantarojn amase per unu frapo. Estus ja normale, se ĝi sufiĉe frue malkovrus, kiel eviti nun tiun finon de la homa gento. Unu geniulo provas gasojn, alia ne-perforton. Ĉiu laŭ sia prefero.

[1]) Vd. E. Privat: Aux Indes Avec Gandhi. Paris, Attinger, 1933.

[2]) Krom alia batalmetodo, gravas ankaŭ apelacioj al interŝtata tribunalo. Pri tio pli poste en ĉapitro XV.

## XIII.
## *NEPERFORTO EN POLUJO*

*Historia antaŭajo en 1861 — Buĉado en Varsovio — Nacia funebro — Embaraso de Gorĉakof — Disciplino de popolamaso — Ne-perforto — Malakcepto de armiloj — Alvoko de Adam Ĉartoriski — Poeto Krasinski — Impreso eksterlande — Kanoniko Deguerry en Parizo — Rusaj cedoj — Aleksandro II-a pri kamparanoj — Novaj buĉadoj — Perforta ribelo en 1863 — Revenĝoj — Protesto vatikana.*

Al Hindujo apertenas tio, ke ĝi eltrovis organizon kaj praktikadon de nacia batalo sen armiloj sur tre vasta kampo. Sed, antaŭ ĝi, jam aliaj popoloj provis iafoje. Hungaroj uzis bojkotadon de ŝtataj monopoloj kontraŭ la aŭstria regado post 1848.

Polujo mem konis de ne-perforto la ekzemplon kaj la poeton unufoje en sia historio. Ĝi okazis en 1861 en la tempo plej kruela de rusa premado sub reĝimo cara.

Dum tiu vintro, la varsovia loĝantaro festis la datrevonon de la revolucio de 1831 kaj kutimis kanti la nacian himnon *Boze cos Polske* (Dio savu Polujon) grandamase sur la stratoj.

Tio tre malkvietigis la tiaman rusan guberni-

estron princon Gorĉakof, kiu antaŭsentis eksplodon. Li petis el Petersburgo instrukciojn kaj soldatojn. La 25 Februaro, la kozakoj alrajdis kaj disrompis per sabrobatoj grandan procesion de Poloj. Du tagojn poste, la popolamaso sekvis la ĉerkon de mortinto. Infanterio pafas. Mil buŝoj respondas per kantado de la himno.

La viktimojn akompanis la duan fojon pli ol cent mil personoj al tombejo. Tra tuta lando proklamiĝis tiam nacia funebro: virinoj vestiĝis nur nigre, teatroj fermiĝis, dancoj malpermesiĝis per la nura potenco de l' popola sento.

Tiama korespondanto de la granda londona gazeto The Times citis sekretan cirkuleron, rondirantan de loko al loko:

»En ĉiuj partoj de la eks-Polujo regu funebro; virinoj povos meti blankan veston je sia edziniĝtago. Ni elportu fiere nian centjaran malfeliĉon kaj niajn vundojn. Ni provu per konkordo, ke ni estas la nacio de l' ofero. La dornkrono, jen nia emblemo . . . ĝi signifas paciencon en doloro, oferon, liberiĝon kaj pardonon. Ni invitas ĉiun polon el kiu ajn religio disvastigi tiun parolon ĝis plej malproksimaj regionoj.«

La 8 Aprilo 1861, en Varsovio, la popolamaso preterpasis la palacon de l' imperia guberniestro revenante el tombejo. Ĝi kantis la himnon:

»Redonu al ni la patrujon,
»Ho Sinjoro, redonu al ni liberecon.«

Denove pafis la soldatoj. Falis kvindek homoj. Daŭris la kantado. La oficiro avertis kaj ordonis dis-

iron. Neniu moviĝis. Male. La popolo surgenuiĝis, eĉ interplektis la manojn por sin kuraĝigi reciproke.

Pafis la soldatoj duan fojon. Falis la unuaj rangoj. Plilaŭtiĝis la kanto. Ŝanceliĝis la soldatoj. Tiam la oficiroj haltigis la pafadon. Estis venko de la ne-perforto.

Tra tuta Eŭropo tiuj varsoviaĵoj kaŭzis grandegan impreson. La mirindan kvietecon de la popolo ankaŭ fremdaj realistoj rekonis kaj admiris.

Oni rakontis ĉie pri virino mortvundita sub kozaka ĉevalo. Ŝi jetis sian infanon al la soldato kriante: »Ci volas mortigi polojn. Jen unu.« Oni parolis pri policano, kies sabro falis teren. Junulo tuj kaptis ĝin, sed virino ĝin prenis de li kaj redonis al la policano dirante al la studento: »Vi forgesas, ke ne tiaj estas niaj nunaj armiloj«.

Tian sintenadon rekomendis al poloj konata poeto kaj respektataj ĉefoj. Al princo Gorĉakof eĉ Andreo Zamojski donis sian honorpromeson, ke nenia perforto okazos flanke de la loĝantaro, se li permesos la procesiojn.

Kiel Prezidanto de la Kultura Societo, Zamojski konsentis prizorgi plenan ordon kun helpo de senarmaj junuloj. Sian promeson li plenumis. Kolere la guberniestro diris jam al li: »Ĉar mi havas soldatojn, necesos ja ke ni batalu!«

— Ne, respondis Zamojski, ni ne batalos, ĉar ni estas senarmaj. Vi povos nur buĉi nin.

— Ĉu vi do volas armilojn? Mi donos ilin al vi, — respondis la generalo. Li ja estis la heroa defendinto de Sebastopol kaj ne komprenis tian militmetodon.

— Ni ne bezonas armilojn! nia rajto kaj morala forto sufiĉas al ni.

— Do kion fari? demandis la guberniestro finfine.

— Foriri. La saman respondon spontane kriis la popolamaso, kiam la generalo provis konvinki la publikon kaj rondrajdis de grupo al grupo kun sia stabo dirante ĉie: »Iru hejmen! Nu! Iru hejmen! Ĉiu restu hejme.«

— Ni ja estas hejme, oni kriis. Nur vi ne estas. Reiru mem hejmen, en Rusujon!

El Parizo la maljuna ekzilito Adam Ĉartoriski same kuraĝigis tiun tendencon de ne-perforto ĉe siaj samlandanoj. Estante naŭdekdu-jara, li volis ankoraŭ foje tion esprimi al siaj kunrifuĝintoj, kiuj respektis liajn blankajn harojn. La 3. Majo 1861, ĉe la jarkunveno de la Pola Historia Societo en Parizo, li diris:

»Ne malsupreniru, ho mia nacio, de tiu alteco, sur kiu la popoloj kaj la potenculoj estas devigataj Vin respekti ... Eĉ meze de Viaj kruelaj suferoj kaj de la malespero, eĉ sub indigno pri perfido kaj perforto, forpuŝu la tentojn de kolero, ne malaltiĝu al bataloj nedignaj .... Memoru, ke necesas pli granda heroeco por iri al morto malkovrante sian bruston ol por defendi sian vivon per glavo.«

La saman tendencon jam en 1845 prikantis la poeto Sigismond Krasinski en siaj »Psalmoj de l'estonteco«, kies versojn oni ripetis de buŝo al buŝo dum la postaj jaroj:

»Ho Dio! Ne la esperon ni petas, ĉar kiel pluvo da floroj ĝi ja falas al ni. Ankaŭ ne la morton de l' malamikoj: ĉar sur morgaŭaj nuboj ĝi estas enskrib-

ita. Eĉ ne armilojn, ĉar vi metis ilin en animojn niajn. Tion ni preĝas: ke Vi metu en niajn korojn intencon puran . . .

Ĉu do necesas esti mortigisto kun mortigistoj, krimulo kun krimuloj? Ĉu necesas mensogi, buĉi, blasfemi? Al ni la mondo vokas: »Je tiu kosto la povon kaj la liberecon. Alie nenion!«

Ne, animo mia, ne per tiaj armiloj. Nur la pezo de l' ofero povos siavice dispremegi la sorton pezantan sur ni . . .

Ho, mia patrujo! Estu prefere pacienco, instruanta kiel oni rekonstruas domon, ŝtonon per ŝtono. Estu nefleksebla volo kaj humiliga preĝo, preparantaj estontan venkon. Estu trankvilo dum ventego. Estu harmonio super malamaj blekoj. Estu eterna belo, meze de malbelaĵoj.

Estu por malkuraĝuloj kaj malsinceruloj la silento malaproba. Estu por malfortuloj la forto al kuraĝo! Estu espero por malesperantoj!

En via batalo kontraŭ la infero de tiu-ĉi mondo, staranta kontraŭ vi, estu tiu forto de kvieto kaj amo, kontraŭ tiuj eĉ tuta infero ĉiam staros senpova.«[1])

La gazetinformoj pri tia buĉado en Varsovio kaŭzis eksterlande tian abomenon, ke la imperia registaro juĝis necesa ian publikan anoncon per siaj diplomatoj pri reformprojekto de pollanda regado. Tion oni rigardis kiel venkon de la senarma heroeco de la poloj kaj, en Parizo, la fama predikanto, kanoniko Deguerry, ekkriis el la katedro de la Madeleine:

»Jen martiroj, jen ankaŭ venkintoj, ĉar martiro

[1]) Se pola poeto mem esperantigus tiujn versojn el originalo, tiam ili brilus multoble pli brile ol tra malriĉa prozo de fremdulo.

signifas venkinton. Ho, noblaj viktimoj, kies morton ni honorigas, ja fluis sango, ja falis homoj, sed vi venkis . . . Vi devigis la kontraŭulon rigardi vin kun ia kliniĝo al via rolo. Li ekkomprenis, ke li devas cedi, ke necesas ia interkonsento kun vi, kaj tiel vi estas venkintoj.

Nu, se vi estus provintaj armeon kontraŭ armeo, fervoron kontraŭ fervoro, glavon kontraŭ glavo, pafmaterialon kontraŭ pafmaterialo, materian potencon kontraŭ materia potenco kaj estus malsukcesintaj pro la nombro, ĉu vi estus gajnintaj saman venkon kiel nun?«

Cetere tiu venko de la poloj ne daŭris pli longe ol ilia momenta ne-perforto. Eĉ nova lernejaro kaj rajto je urbaj estraroj ne povis ilin kontentigi. Siaflanke Aleksandro II-a celis ilin dividi per apartigo inter vilaĝanoj kaj posedantoj. Tiu kalkulo ne estis tute fremda al lia dekreto pri forigo de servuteco.

Novaj buĉoj okazis kaj la gvidon ekprenis la ruĝa partio. Ĝi tiam organizis la ribelon de 1863. eĉ pli kruele subpremotan ol tiu de 1831.[1])

Kontraŭ la sanga revenĝo de l' Caro publike protestis papo Pio IX kaj eĉ montris la pordon al rusa ambasadoro dum vizito, poste fama ĉe Vatikano.

Nenio certigas, ke Hindujo ne spertos revenon al uzo de perforto kiel en 1856. Nova moro ne en unu fojo povas anstataŭi kelkmiljaran kutimon. Sed unu sperto sekvigas aliajn. Ĝi lasas profundajn postsignojn. Ĝi estas poste imitata, ripetata, novigata. El tio konsistas ja vivo kaj kresko.

[1]) Pri tio pli detale en E. Privat: »L' Europe et la Pologne aŭ XIXème siècle«. Paris Fischbacher 1918, ĉapítroj XXI ĝis XXIV.

## XIV.
## *MESIANISMOJ*

*Agado sen armiloj — Anglaj »suffragettes« — Laborista striko kontraŭ von Kapp — Ciwila helpservo de Pierre Ceresole — Helpo al fremdaj nacioj — Polaj elmigrintoj en 1848 — Ilia mesianismo — Naciaj taskoj aŭ »misioj« — Eksterlanda malfido pri tiuj »misioj« — Krucaj militoj kaj koloniaj entreprenoj.*

Al libera lando ne prezentiĝas samaj okazoj kiel al mallibera nacio por ekprovi reziston aŭ batalon sen armiloj. Sur la kampo socia, plej konata provo estas la striko. Sur la kampo de politiko proviĝis diversfoje la rifuzado pagi la impostojn. Tion amase faris anglaj virinoj, kiam ili batalis por la voĉdonrajto antaŭ la mondmilito de 1914. En malliberejoj ili provis ankaŭ la rifuzon manĝi kaj la minacon morti pro malsato.

Pluraj anglinoj oferis sian vivon dum la batalo de la »suffragettes«. Eĉ unu sin ĵetis sub ĉevalon, por devigi la reĝon legi petskribon. Post la mondmilito, kiam generalo von Kapp provis nuligi la Respublikon en Germanujo, la Berlina laboristaro sukcesis haltigi komplete la ekonomian vivon de la ĉefurbo per ĝenerala striko. Senpotenca kun armea forto, li devis rezigni.

Sed tie temas ja pri bataloj hejmaj. Sur la kampo internacia ne ekzistas, krom milito, multaj provoj menciindaj. Gandhi zorgas pri l' animo de sia popolo. Lia metodo havigis al Hindujo patriotismon ja heroan, sed ne militkoloran. Ĉu aliloke troviĝas io simila?

Jes, sed nur malgrandskale. Viro kiel Pierre Ceresole ekzemple preferas la Svislandon de la Ruĝa Kruco al la Svisujo de la dungsoldatoj ĉe la fremdaj reĝoj en antaŭaj centjaroj. Inter la du tradicioj, unu militista kaj unu samaritana, li elektis la duan por eduki sian generacion.

La Ĝeneva Ruĝa Kruco aplikis kompaton en la tempoj de milito. Kion organizis li, tio funkcias en la tempoj de paco. Per ĝi li kutimigis junularon defendi sian landon alimaniere ol per milito.

Se katastrofo aŭ subakviĝo ruinigis en iu lando vilaĝon, tiam en ĝoja kolegaro tien veturas la volontuloj de la Helpservo kaj alportas al suferanta loĝantaro la necesan kunlaboron de siaj brakoj.

En 1928 ili rebonigis al la vilaĝanoj de la ŝtateto Lichtenstein la kampojn kovritajn de ŝtonoj per elbordiĝo de l' Rejno. En 1930 ili purigis la regionon de Lagarde en Suda Francujo post la terura subakviĝo. Serioza kaj efika estis tiu laborego de centoj da junuloj el deko da diversaj landoj. Inĝenieroj ĝin kontrolis kaj publike laŭdis. Jarojn poste, loĝantaroj danke festis la datrevenon de tiu senpaga frata manhelpo. Eĉ monumentoj ĝin memorigas.

Sekve ne la sian, sed aliajn landojn ili defendis en okazo de malfeliĉo. Tamen ankaŭ la sian ili servis tiel, ĉar ili kaŭzis al ĝi multajn amikojn.

Iuj el ili, ne ĉiuj, estis rifuzantoj de militservo.

Ili malkonsentis prepari buĉadon kontraŭ najbara popolo, eĉ iris pro tio en malliberejon. Pli bone defendi sian patrujon ili kredis irante helpi la najbaron en malfacilo, ŝvitante kun li sur la kampo de katastrofo, partoprenante lian suferon kaj vivante senkomforte kaj soldate sen alia salajro ol lia miro amika.

Tiel ili kreskigis, same ĉe si kaj ĉe li, aliajn sentojn ol malfidon kaj sindefendon, nure negativajn. Ili helpas kunformi alispecan animon popolan.

Germanoj, skandinavoj, francoj, angloj, romanoj kaj slavoj aliĝis al tiuj entreprenoj de peniga laborado. Frateco de la fosilo anstataŭis la fratecon de l' pafilo. Tie kuniĝis oficistoj, studentoj, laboristoj, militrifuzantoj kaj armeoficiroj, kiuj preferas tiaspecan militon al la sanga.[1])

La volontuloj de tiu helpservo proponas al ĉiuj popoloj sian metodon kaj predikas ĝin nur per apliko. Nur tiel oni kreas kutimojn. Ne sufiĉas ilin revi.

De 1830 ĝis 1848, Eŭropo vidis polojn sin miksantaj al ĉiuj klopodoj de iu ajn nacio penanta liberigi sin de fremda premo. Tiuj elmigrintoj el malfeliĉa lando flugadis al Italujo, al Francujo, al Hungarujo, al Germanujo por proponi sian helpon al frataj popoloj kun pafilo en la mano. Tia estis ilia mesianismo antaŭ la tempo de Krasinski: ie ajn militi por la rajto de popoloj kaj por Polujo, la simbolo kaj martiro.

Jen *misio* de patrujo, tasko de nacio. Ne nova estis la penso pri sankta rolo de unu popolo aparte elektita. Ĉiu lando ja konas la saman ideon kaj, en

[1]) Vidu *l' Armée des hommes sans haine,* de Alexis Danan, Paris, Attinger, 1929.

1848 la eŭropa romantismo kulturis tiun dogmon. Ĝi estas eĉ formo de prinacia religio. Sed pli multe por milito ol por paco jam utilis tiaj mesianismoj.[1])

Al milito ĝi estis plej ofte turnita. Granda popolo ĉiam havas ian sanktan taskon aŭ mision en iu aŭ alia epoko. Ĝi kutime konsistas devigi la plej malfortajn suferi ĝian superregon kompreneble »por ilia propra profito«.

Ili »nescias fari«. Ili »ne kapablas regi sin mem«. Ili ne posedas internan ordon. Ili eraras. Nur la pli forta scias ĉion. Nur li rajtas instrui vin kaj li sulkas egan brovon, se vi kuraĝas, kiel Gandhi, respondi al li: »Estas nia plena rajto memregi nin, eĉ malbone, laŭ nia plaĉo.«

En Hindujo *Pax britannica*, en Azio paco rusa, en Mezeŭropo pangermanismo, en Afriko franca civilizado, en Amerikoj hispana grandeco, en latinaj respublikoj usona protekto, kaj en Mezepoko la Krucaj militiroj, jen belegaj religioj por tiuj nacioj, kiuj predikis ilin, sed al la ceteraj popoloj ili plej ofte aspektis kiel teruraj minacoj pro la ŝiparoj aŭ armeoj videblaj malantaŭ la bela ideo.

Mesianismo armita nur per fosiloj kaj flegiloj prezentiĝas pli simpatie. Al Francujo en Sirio kaŭzis plimultajn amikojn ĝiaj lernejoj antaŭ la mondmilito ol ĝiaj regimentoj poste.

Esti bonvenigata sen malfido, tion sukcesas nur tiu mesianismo, kiu montras oferon de la predikantoj, ne tiu, kiu riĉigas ilin je la kosto de l' aŭdantoj. Pri tio malofte pensis la plej grandaj nacioj. Inter ili ĉiu

[1]) Mesianismo estas vorto derivata el *mesio* = elektito por savi, Misio signifas sanktan apartan taskon.

rigardis abomene la sanktan *mision* de la najbaro kaj samtempe imagis naive, ke ĝia propra nepre aspektas noblega al ĉies okuloj.

Tute alie aspektas la *misio*, kiam ĝi malgrandigas propran armeon de la lando anstataŭ ĝin pligrandigi. Kiam Danujon priokupis la ideo grandskale redukti la tutan militan aparaton, tiam temis pri speco de *mesianismo* sendanĝera por la najbaroj. Al tiu skandinava ŝtato ĝi tiam kaŭzis multopajn simpatiojn. Nur unu timon ĝi vekis: la timon al ekzemplo imitinda.

## XV.
## ŜTATOJ EN SOCIETO

*Provoj je paca konduto inter ŝtatoj — Ligo de Nacioj — Wilson kaj Clemenceau — Kompromiso inter ideo nova kaj sistemo malnova — Spertoj — Novaj kutimoj — Kontrastoj — Eksteraj premoj — Apostoloj — Nansen, Cecil, Arfa — Hipokritaĵoj — Laborista kritiko — Popolkontrolo en Britujo — Ordonoj al delegitoj — Rolo de oficistoj — Regnoj grandaj kaj malgrandaj — Ĉe la konsilantaro — Streseman kaj Briand — Similaj spertoj de ambaŭ*

Etikaj iniciatoj de homoj, kiel Gandhi en Hindujo kaj Cérésole en Eŭropo, kreskigas ĉe popoloj novajn sentojn kaj kutimojn. Unu grandskale provis, alia malpli vaste, sed la fenomeno estas tute samspeca. L' animon nacian ili trafas per maniero de ara konduto alia ol la ĝisnuna.

Ĉu ekzistas ia provo simila sur la kampo de interŝtataj moroj?

Ĉu internacia juro jam enskribis aliajn kutimojn ol la uzon de perforto? Ĉu diplomatio konas ion alian ol la utiligon de ruzo? Ĉu ekzistas novaj spertoj etikaj sur tiu ĉi kampo?

Ĉiu kompreneble tuj pensas je la provo de

Ligo de Nacioj, je ties Internacia Juĝejo, je la promesoj pri rezigno je milito, je la kontraktoj pri arbitracio. La iniciato de Prezidanto Wilson estis ja etika interveno. Ĝin sendube naskis la ĝenerala naŭzo pri la milito kiel metodo por solvi konfliktojn.

Ĝia jura formo estis kompromiso. Profeta ideo pri la rilatoj inter ŝtatoj; ĵusa realaĵo pri venkintoj kaj malvenkintoj. Jen ĝiaj gepatroj. Fido de unu, malfido de ceteraj, jen la baptopatroj. »Ĉu vi kredas al tiu Ligo de Nacioj?« mokridis famulo en 1919.

La ironio de la sprita Clémenceau prezidis ĉe la bapto, dum la kredanto Wilson ploris pri honto. Por akceptigi sian tekston, li devis ĝin enmeti en packontrakton komplete kontraŭan al sia ideo, kiu celis ja pacon sen venkintoj kaj sen malvenkintoj, por egaleca kunlaboro.

Pro tiu neregula naskiĝo, la ideo suferis jam de l' infaneco. Ne deziris ĝin la patrino, kaj mortis la patro sen usona rekono al la bubo. Eĉ pli gravaj sin montris la malfacilaĵoj de kreskado.

Kutime la juro konfirmas la morojn. Male, antaŭis ilin la Kontrakto de la Ligo. Alia baro: vastan etikan movadon, kiel la gandhistan en Hindujo, vivigas la entuziasmo de la agantoj mem. Dume la Ligon subtenis nur ekstera fervoro de esperema publiko. Sed la aktoroj mem estis skeptikaj. Nu, kiam eklaciĝas mem la teatraĵo, la ĉeestantoj baldaŭ ĉesas aplaŭdi. Jam ili mokmovas la ŝultrojn, kiel Clémenceau leginte la manuskripton.

Malgraŭ tiom de kontraŭaĵoj, tamen kreiĝis iaj kutimoj kaj iom da sperto. Ekfunkciis uzebla maŝinaro. Ĝin utiligi nepre deziras la malgrandaj ŝtatoj,

iafoje ankaŭ iu granda, kiam hejme regas tiuj, kiuj kuraĝas kritiki eĉ la propran nacian konduton.

Dudeko da konfliktoj ricevis solvon. Kelkaj rompoj estis evititaj. Unu militon la Ligo haltigis en Balkano kaj kvin aliloke malebligis. Estas jam io. En tri okazoj. invaditaj teritorioj estis liberigataj pro Liga interveno. En du aliaj ĝi malsukcesis.

Al eksplodoj de ara malamo ĝi donis tempon iom kvietiĝi. Al popolamaso furioza, svinganta la patrujan flagon sub la palacaj fenestroj, ŝtatisto povis respondi: »Jes, ni tuj ekmilitus, se nia subskribo ne malebligus tion. La nacia honoro devigas nin atendi enketon. Vivu la patrujo, sed estu fidelaj al ties promeso!« Post unu monato ĉiuj estis jam trankvilaj.

Unu evitita buĉo, eĉ tio estas granda gajno. Sed la tuta sistemo funkciis nur por la pli malgrandaj. Kiam temis pri la pli grandaj, tiam ekhaltis la radoj. Kaj tamen kalkulindaj estas la malgrandaj. Iliaj disputoj kuntiras la ceterajn.

Kiom el la francaj kaj germanaj soldatoj, frakasitaj en Argonaj arbaroj, ion sciis pri panserbismo aŭ pri malproksima studento mortiginta princon ie en Balkano? Malgrandaj militoj rapide fariĝas grandaj, se diplomatio kuraĝigas ilin anstataŭ malebligi.

Ne tute vana estis la sperto en Ĝenevo. Akiritaj kutimoj povas plivastiĝi. Kiam graviĝis ia konflikto, jam fariĝis pli nature pensi pri arbitracio aŭ pri plendo ĉe la Ligo antaŭ ol tuj mobilizi armeon.

Ĉirkaŭ la tablo kreiĝis ia tradicio instigema al paciĝo. Ĉe la Generalaj kunvenoj, pli multnombraj, kreskis la influo de la malgrandaj ŝtatoj. Ekregis atmosfero severa kontraŭ malpaculoj. Pli kaj pli oni malŝatis tie la brutalajn agmanierojn.

Minacon oni ekkutimis malaprobi. Ankaŭ ofendemon. Eĉ troan obstinon: »Nu, cedu iom. Estu komprenema. Aŭskultu la kontraŭulon. Ankaŭ lia popolo havas bezonojn.« Same kiel en ĉiu societo, la bonaj manieroj havas proprajn postulojn kaj sankciojn. Amaso da ĵurnalistoj el ĉiuj anguloj de la mondo svarmas por observi ĉian intervenon, ĉian parolon, ĉian voĉdonon.

En sia ĉefurbo, ŝtatisto ja timas ofendi la nacian opinion. En Ĝenevo li havas kontraŭ si du rokojn dangerajn al ŝipoj: Se pro pacamo li cedos iom, lia regno lin kulpigos pri malforteco. La postenon li riskas perdi, kiam li revenos. Se kontraŭe li nenion cedos, tiam lian patrujon oni ĉie montros per fingro en la tutmonda gazetaro kiel kulpulon.

En Ĝenevo, kiel en ĉia societo, regas la timo pri onidiro. La flankon de la paco sendube iom premas la internacia popol-opinio.

Kiel aŭdantaron, antaŭ ol ekzistis la Ligo, la glavludantoj de mondpolitiko havis nur la nacian publikon, ĉiu en la propra lando. »Venku!« ĝi kriadis.

Per la Ligo la cirko fariĝis multe pli tutmonda kaj la plimulto de la ĉeestantoj male aklamas la plej cedeman kaj paceman. La individua malvenkisto fariĝas virtulo sur la kolektiva kampo. La popolaro dankas al la kavaliro, kiu remetas la spadon en la ingon. Ne plu ĝojigas tie la dueloj. Ekflaras la ŝafaro la odoron de la buĉejo, kien ies disputo riskas tiri ĉiujn kune.

La guston pri sportludo certe ne perdis la publiko. Ĉiam heroojn ĝi deziras. Ĉe la kunvenoj en Ĝenevo la plej amataj kavaliroj estis baldaŭ la viroj, kiuj rezistis al naciaj egoismoj kaj batalis por la komuna intereso.

Vidu la gloron de Nansen aŭ de Lord Cecil, pioniroj de senarmigo, ĉiam prokrastita. Notu la faman obstinon de Princo Arfa, delegito en Persujo, kiam li sola per historia voĉdono malebligis la ruinigon de l' artikolo X kaj poste ricevis la gratulojn de la malgrandaj ŝtatoj, devigitaj al sindeteno pro timo al la grandaj.[1])

Kiuj rifuzis cedi pri Ligaj principoj, tiuj estis honorataj. Sur tiu kampo gratuliĝis la obstino kaj ekŝajnis hontinda ĉia kompromiso. En tiu direkto sendube sentiĝis etika premo kontraŭ la diplomata.

Antaŭ ol detrui malvirton, ĉia kolektiva moralo kaŭzas hipokritaĵojn. Tiun konatan fenomenon abunde spertis la Ligo. Jen, fidelaj al sia nacia egoismo, kvindek ŝtatoj kunvenis en societo fondita por detronigi tiun egoismon. Antaŭ ol rezigni ĝin, ili kaŝvestos ĝin. Neeviteble.

Apud apostoloj, vi do vidas la blufistojn. Ĉiun negativan voĉdonon superkovras amaso de florbukedoj enterigaj. Ĉaroj plenaj de funebraj kronoj kun elokventaj vortoj ĉiam sekvas belan principon, kiun oni rifuzas apliki. Tio estas la fama saluto de l' malvirto al la virto. Ĝi naŭzas ege.... sed samtempe ankaŭ disvastigas ideojn.

Reveninte hejmen, ĉiu penas sin savi el pretaj kritikoj. Malsame oni parolas tie ol en Ĝenevo. Por kvietigi la nacian opinion, necesas insisti pri la rifuzoj. La florojn oni forŝovelas. Urĝas montri, kiom firme oni defendis la interesojn de l' patrolando.

[1]) Laŭ artikolo X de la Liga Kontrakto, la membroj-ŝtatoj promesas helpi sin reciproke por defendi sian sendependecon kaj teritorian netuŝeblecon kontraŭ atako.

La interesoj de la Ligo ne havas multajn advoatojn. Ilin oni konsideras nur, se la politika plimulto on prizorgas.

Al laboristaj kritikantoj foje ekvenis la penso olekti la ĵetitajn florojn. Ili memorigas pri bela rincipo forĵetinton. Elstaris la vastigitaj ideoj kvazaŭ ɔzoj kun propraj dornoj. Ili kelkfoje ĝenis registron.

Sed plej ofte nura naŭzo regas ĉe malriĉulo. La ıalsincereco de diplomatoj kaŝas al li eĉ la progreson e ideoj. Ekmuĝas lia kolero. Nenion plu scii li volas, ıj ĉion en saman sakon li enmetas per severa juĝo. a tuta sistemo naŭzas lin, inkluzive la ĝenevaj kulisoj.

Tiamaniere lia kontrolo jam ne estas timinda. ura naŭzo ja ne kapablas anstataŭi detalan observıdon de la nacia konduto per enlandaj okuloj. La ecesa ekzameno tiam neglektiĝas.

Kie ĝi ne laciĝis, pli timinda ĝi fariĝis. Al blinda ɡoismo nacia ĝi kontraŭstarigis ne surdan kapdoloɔn, sed konscion novan kun la lumo al trafa direkto. orta premo tiam ekvilibras la alian.

En Anglujo tiu popola kontrolado estas memrganizita. Dum la milito, laboristaj gvidantoj fondis nuiĝon por demokrata Kontrolo. Malliberejon ili skis. Tien iris Morel. Postmilite, konservativa Lord ecil kaj liberala Gilbert Murray starigis la vastan Unuiĝon por la Ligo de Nacioj«. En 1930 ĝi jam ıvis duonmilionon da membroj. Intertempe, sub prezo de konservativa regnano, ĝi publike riproĉis samɔloran registaron en afero de interŝtata konduto.

Atente ĝi ekzamenas la raportojn de la britaj legitoj al Ĝenevo. Laŭnecese ĝi turnas sin al vasta ıbliko. Entute ĝi ludas rolon de nacia konscienco pri

devoj interŝtataj. Ne mankas indignigitaj gazetoj en Londono por kulpigi tian organizon pri perfido al patrujo, dum eksterlandaj ĵurnaloj admiras ĝian pledon por justeco al ceteraj popoloj. Nur hejme sonas bele: »Nia lando super ĉio, ĉu prava, ĉu malprava«. Eksterlande ĝi ofendas.

Kiam eksidis al povo registaro laborista, ĝi komprenebIe puŝis al sama direkto kaj progresigis la Ligan superecon kontraŭ la nur brita supereco. Tiam subskribis Anglujo la devigan submeton de konfliktoj al interŝtata juĝado kaj la ŝiparan egalecon kun aliaj.

»Tiu fiera Imperio, ĝis hodiaŭ neniam klininta la kapon antaŭ iu ajn, devos de nun kliniĝi antaŭ fremdaj juĝistoj en Hago, iuj kontinentaj sinjoroj nenion sciantaj pri l' regado de la maroj.« Pronacia gazetaro plendas kaj protestas. Ĝi ploras pri estinta grandeco. Kontraŭe la geniaj verkistoj, de Wells ĝis Bernard Shaw, kiel la francaj poetoj en 1848, de Lamartine ĝis Victor Hugo, bonvenigas la novan grandecon, turnatan al paco per propra ekzemplo.

En Ĝenevo du moraloj renkontiĝas interbate. Internacia estas la celo, sed naciaj la ordonoj de registaroj al delegitoj.

Por naŭ ŝtatoj el dek, antaŭ ĉio staras la propra kaj aparta profito. La reprezentanto devas labori por sia regno, eĉ se li parolos pri ĉiuj. Kiam oni konsentas pri avantaĝo komuna, eĉ tiam li devas tre zorgi pri la nacia vanteco. Ĉu temas pri ĝenerala utilo? Bone, sed nur per propono de nia lando, ne de alia. Ĝuste same ĉe ia klubo de fanfaronaj knaboj.

Kaj plie, kiom da intrigoj pri prezidoj, de kunvenoj, vic-prezidoj de komisionoj aŭ sidlokoj en la konsilantaro! Faru statistikon pri la telegramoj de

registaroj al delegitoj. Kiom da ili por la prestiĝo de unu ŝtato? Kiom por ĉies bono?

Malsukcesa elekto ŝajnas katastrofo. Eĉ pri tiaj bagateloj oni eksiĝas aŭ minacas eksiĝi. Ŝovinista gazetaro blekas: »Ne timu! Estu firma! Temas pri nia honoro!« Feliĉe militon ne kaŭzas tiaj aferoj. Iom post iom tamen agas la sento pri ridindeco.

Ĉe la Sekretariaro, same kiel en Hago, necesas dungi senpartiulojn. Tute ne! ekkrias la ŝtataj gazetoj. Internacia oficisto estu morala viro. Ĝuste. Sed kiel vi komprenas tion? »Nu, *morala* signifas *pornacia*. Antaŭ ĉio li estu fidela al sia lando.« Laŭnecese li devos do perfidi la oficen taskon, se tion postulas avantaĝo patruja. Li tiam fariĝos en Ĝenevo spiono kaj advokato por la propra ŝtato.

Male — asertas kritiko, — ĉe taŭga ligo de nacioj, *morala* signifu *internacia!* Honesta oficisto estas tiu, kiu servas la komunan tuton, eĉ okaze kontraŭ sia patrujo, se ĝi estus malprava. Oni ne postulu, ke li perfidu ĝin, sed repacigu ĝin. Li ne rajtu servi ĝian egoismon. Li montru al ĝi la juran devon.

Ĉe la konsilantaro, la reprezentantoj ne povas agi libere. Ordonoj ligas ilin. Kiel Britujo, Francujo, Italujo, Finlando aŭ Kolombio ili parolas, ne kiel homoj aŭ homaranoj.

Jen eksidas du plendantoj en konflikto, ambaŭ invititaj al la tablo. La celo estas ilin repacigi. Kian sintenon mi havu? demandas sian registaron ambasadoro de neŭtrala ŝtato. Konstante same sonas la respondo. Parkere ĝin konas la telegrafistoj: »Kiom eble subtenu la rajton de la pli malforta, ĉar ĝi estas ankaŭ nia rajto, sed ne malamikigu nin kun la pli forta por

ne malhelpi la komercan kontrakton, baldaŭ renovigotan kun ĝi.«

Alie dirite: Staru la tutan matenon sur unu kruro, sed ne falu! Ne deziras riskon ankaŭ la ambasadoro mem, se ĝuste li loĝas en la ĉefurbo de la pli forta. Tiamaniere la Konsilantaro taŭgas por repacigo, sed ne por justeco. Pli certa estas arbitracio.

Dum la milito de Nordo kontraŭ Sudo, tion provis Usono kun Anglujo. De tiu tempo la kutimo plivastiĝis. La ideon diskonigis kaj la praktikon plioftigis la Ligo de Nacioj. La nura fakto, ke ĝi ekzistas, devigas organizon aŭ agi, aŭ morti. Ĝia rutino estas mem kreanto de kutimoj. Oni tie renkontiĝas, oni diskutas, oni kunvivas ĉiujare kelkajn semajnojn en kolektiva atmosfero. Ŝtatistoj kaj ĵurnalistoj retroviĝas sub komuna tegmento malsama je siaj naciaj plafonoj. Dumtempe ili anstataŭas monologojn per interparolo.

Se ili nenion mirindan atingas, almenaŭ ili mezuras la haltojn, la progresojn aŭ la malprogresojn. Reciproka kompato kreas amikojn pli multajn ol oni supozas. Ĉiu pli bone komprenas la malfacilaĵojn de la ceteraj, preskaŭ ĉiam samajn kiel la propraj.

Ĉe tagmanĝo en apuda vilaĝo, Stresemann povis rakonti al kolego siajn batalojn kun la gazetaro, la malamajn kriojn en la strato, la suspekton en Parlamento. Tion Briand povis kompreni, eĉ sen la scio de la germana lingvo. Li ja konis mem la tutan maŝinaron kaj la binoklon je ambaŭ flankoj.

## XVI.
## *KONTROLO KAJ PROTEKTO*

*Nacia konduto en kolonioj — Kruelaĵoj kontraŭ enlanduloj — Kaŭĉuko en Kongolando — Klasbatalo en Sudafriko — Koloniaj mandatoj — Internacia kontrolo — Ekatentas la publiko — Sekvoj ĉe aliaj kolonioj — La problemo pri malplimultoj — Timo je kontrolo — Venkintoj kaj venkitoj — Ĉu paco, ĉu justeco? Kio unue — Kontrolo pri armado — Sento pri sekureco — Relativa senpotenco de polico.*

Dum egoista sin montras la konduto nacia sur la kampo diplomata, tre ofte kruela ĝi montriĝas en kolonioj. Ne por faciligi la vivon al enlanduloj oni alportas tien la grandajn progresojn de tekniko, sed por akceli la profitilojn de la blankuloj.

Malmulte gravas la sentoj de la ceteraj homoj, kiam ili havas nigran haŭton. Estas ja konata la sovaĝa sinteno de blankaj popolamasoj kontraŭ arestitaj nigruloj en Suda Usono.

Por havigi al si laboristojn en Afriko, la grandaj kompanioj pri Kaŭĉuko provis ĉion, eĉ turmentadon. La edzinojn oni forprenis, la virojn oni batis, la rifuzantojn oni punis per fortranĉo de korpaj membroj. Tiajn procedojn permesis koloniaj administracioj kiel

la estraro de Kongolando sub Leopoldo II-a[1]) kaj eĉ nigrula ŝtato kiel Liberia.[2])

En Sudafriko, blankaj laboristoj aplikas renverse la klasbatalon kaj ligiĝas kun boeraj naciistoj kontraŭ enlanda loĝantaro senigita je regnanaj rajtoj.

La plej rimarkinda novaĵo iniciatita per la Ligo de Nacioj estas la sistemo de koloniaj mandatoj, ebliganta publikan kontrolon pri la nacia konduto de l' venkintoj, almenaŭ en tiuj teritorioj.

Ĝis tiam ne ekzistis alia kontrolo tie ol soleca voĉo de iu kuraĝa misiisto aŭ de konscienca vojaĝanto, pretaj riski sian vivon por atesta rakonto.

De tempo al tempo, iu deputito trovis okazon turni publikan demandon al la ministro de kolonioj en la hejma Parlamento; sed neeviteble li ĉiam estis tuj riproĉata pri trograndigo, kulpigo sen pruvoj, misfamigo de la patrujo kaj eĉ perfido kontraŭ ĝia honoro. Por sukcese lin silentigi, aŭ indigne lin respondi per elokventaj vortoj, aparte zorgis tiu registara fako, nomita de Dickens »la Ŝtatoficejo por ĉirkaŭparolado.«

Nu, la mandatsistemo alportis la diskuton sur internacian forumon. Senkoloniaj ŝtatoj de nun rajtis ion diri. Tiamaniere sidis en la komisiono pri Mandatoj unu svedino, kiu foje reprezentis sian landon ĉe la Kunveno de la Ligo de Nacioj. Ŝi gvidis en Stockholmo higienan movadon de virinoj kontraŭ tuberkulozo kaj drinkado.

1) Vidu René Claparède: *L' Evolution d' un Etat philantropique,* Atar, Genève 1909 kaj E. D. Morel: *Red Rubber,* London 1919.

2) Vidu la enketon de la Ligo de Nacioj pri sklaveco en Liberia, Genève 1930.

La koloniajn guberniestrojn, unu post la alia vokitajn al la Komisiona tablo kvazaŭ al Tribunalo, ŝi sprite demandadis pri la maniero, laŭ kiu ili permesis al senskrupulaj komercistoj veneni la nigrulojn, aŭ pri la impresaj diferencoj inter malgranda monpuno al blankulo, mortiginta nigrulon, kaj dujara malliberigo al nigrulo, ŝtelinta manĝaĵon de blankulo.

Kiu konis iom la kutiman atmosferon de la koloniaj ŝtatpalacoj kun ĝiaj imponaj marmorŝtuparoj, al tiu ekŝajnis la nova sceno kvazaŭ iom el mondo renversita.

Usono malpermesis al siaj kunliganoj de l' mondmilito aneksi senplie la eksgermanajn koloniojn kaj la disrestaĵojn de l' Turka Imperio.

En la Kontrakton de la Ligo de Nacioj Prezidanto Wilson enmetigis la artikolon 22-an, laŭ kiu »la prospero kaj progreso de tiuj popoloj formas sanktan taskon de la civilizo« kaj ili devas esti helpataj ĝis ili atingos maturecon.

Tiaj teritorioj estis konfidataj al protekto de unu aŭ alia mandatita ŝtato, kiu raportu ĉiujare al la Ligo pri sia regado tie.

La raportojn ekzamenas sinsekve la Komisiono pri Mandatoj kaj tiucele ĝi venigas reprezentanton de la koncerna potenco, foje la guberniestron mem.

Kutimiĝintaj al la belsonaj frazoj de antaŭparoloj al Kontrakto, la unuaj subskribintoj ne tro serioze konsideris la kondiĉojn laŭliterajn. Kiam en niaj manoj kuŝas la teritorioj, venu kaj rekaptu ilin, se vi kapablas! Ili rigardis la tutan aferon kiel kaŝvestitan aneksadon kun plaĉa bukedo el piaj vortfloroj por kvietigi la skrupulojn de usona puritano.

Fakte la afero ne marŝis tiel ronde. La publikan

scivolemon tiklis kaj vekis tiu Komisiono. Tiuj ĉiopovaj Moŝtoj el kolonioj, devigataj sin prezenti, kvazaŭ ekzamenaj kandidatoj, antaŭ juĝantaro kun paperujoj plenaj je demandoj, jen sufiĉe pika spektaklo!

Montriĝis homa sento ĉe kelkaj el la juĝantoj, ĉar ilin la Ligo elektis ja kiel spertajn individuojn, ne kiel oficialajn delegitojn de apartaj regnoj. Sed eĉ pli grave efikis la ĵaluzo inter la diversaj potencoj kaj kritikemo de tiuj, kiuj ne ricevis sian parton de la kuko aŭ perdis ĝin pro la malvenko. Tiuj elementoj sufiĉis por malebligi, ke la afero fariĝu nura teatraĵo, kiel esperis iuj en la komenco.

Certe ne paradizoj sur tero estas la teritorioj sub mandato. Demandu mem enlandanon. Sed almenaŭ fariĝis neeble, kaŝi la tuton sub kovra mantelo. Unu, el ili, la Iraka reĝlando, jam ekflugis per propraj flugiloj post ellaso el la brita kolombejo. Novaj kutimoj ekformiĝis per la ĵusa funkciado.

La publikan opinion ektuŝis la ideo, ke raportoj estas ŝuldataj kaj ia kontrolo devigata. Jen ekpaŝo. Koloniema gazetaro jam timis, ke la mandatsistemo baldaŭ vekos la orelojn de la enlanduloj mem. Tiam ne nur tie suferos la reganta potenco limigon de sia povo, sed iom post iom ankaŭ la ceterajn koloniojn ekpenetros tiu »febro al kontrolo«.

Ĝuste tiel okazis. La blankrasista registaro Sudafrika proteste plendis en 1924 pri cirkulero de l' angla ministro por kolonioj, kvankam la dokumento neniel koncernis la teritorion de tiu Dominiona Ŝtato. Ĝi rilatis al Kenja kaj al Okcidentafriko.[1]) Estis ordono al la Guberniestroj, ke ili akceptu novan bazon

[1]) Vidu *Kenya White Paper,* julio 1923.

por estontaj decidoj. Kiam okazos konflikto inter intereso de la blankaj kolonianoj kaj avantaĝo de la enlandaj popoloj, de nun la dua ricevu la preferan konsideron. »Tiel vi rekte nin kondukos al respubliko de nigruloj kaj restos al ni nur pretigi la valizojn!« ekkriis la rasistoj de Cape kaj Pretoria, timante la infekton.

Tre simila timo malebligis, ke la Ligo de Nacioj serioze kontrolu la nacian konduton al gentaj kaj lingvaj malplimultoj en Eŭropo. Ili ja posedas ian plendrajton, sed ekzistas nenia juĝantaro simila je la Komisiono pri Mandatoj. Por ke plendo estu efike atentata, necesas, ke iu ŝtato prenu mem la aferon en manon kaj pledu ĉe la konsilantaro aŭ ĉe la ĝenerala kunveno. Malfacile tion atingis la naciaj malplimultoj, kaj tial plejofte dormis iliaj petskriboj en la fundo de tirkestoj.

Ĉiaj kontroloj el ekstero limigas la suverenecon de la regnoj kaj pro tio renkontas egan reziston. Same okazos pri senarmigo. La specialajn kontraktojn pri naciaj malplimultoj aŭ »minoritatoj« oni trudis nur al la venkitoj kaj al la regnoj novaj aŭ renovigitaj pro la venko.

En tiuj landoj de Orienta Eŭropo, limoj absolute justaj estas neeblaĵo. Restos ĉiam intermiksoj, ĉu vilaĝoj polaj ĉirkaŭ urbo germana, ĉu vilaĝoj ukrajnaj ĉirkaŭ urbo pola. En la urboj mem vi trovas du aŭ tri kvartalojn kun lingvo kaj religio malsamaj: luteranaj germanoj, katolikaj litovoj, ortodoksaj blankrusoj, grekuniaj ukrajnanoj, judlingvaj hebreoj ktp. En suda Balkano konataj estas la miksoj en Makedonio. Eĉ al kunsalato de diversaj legomoj tiu malfeliĉa lando pruntedonis la nomon.

Nepre necesas ia garantio por moderigi la ĉikanojn, la batalojn kaj la venĝojn, ĉar ankaŭ ili enskribiĝas en la naciajn animojn kaj helpas nutri malamon kaj pligrandigi la riskojn al milito.

Sed la venkintaj potencoj restas ekster kaj super la propra leĝaro, kiun ili mem dekretis. Se ili tro severe ĝin aplikus al ceteraj landoj, tiam ankaŭ al iliaj regnoj ĝi alvenus kiel ondo novkutima.

Tion ili maldeziras, ĉar ankaŭ ĉe ili ekzistas kelkaj lingvaj minoritatoj ne ĉiam tute kontentaj.

Ke oni venu rigardi tion el ekstero kaj per maldiskreta nazo flaru en ilia kuirejo, tion ili nepre kaj energie malkonsentas. Jen kial la protekto de la Ligo de Nacioj ne ricevis permeson ekfunkcii normale sur tiu ĉi kontrolkampo.

Ankaŭ en alia senco ĝi estas »brulanta« problemo. Oficiala celo de la ĝenevaj kunvenoj estas ja konservi la pacon. Se ĉiumomente la membroj alvenas kun plendoj, tiam rapide la Konsilantaro fariĝas lavejo de malpuraj ĉemizoj kaj akra disputejo. Difektiĝas atmosfero. Malaperas ĝentileco. Pugnobatoj eksonas sur la blua tablo.

Certa tradicio formiĝis en la Ligo ĉe la Konsilantaro: paco antaŭ justeco. Laŭ nura ŝajno, ĝi estas ja saĝa kutimo. Sed laŭ sperto praktika, ĝi repuŝas tro da nesolvitaj disputoj, kiuj surloke pligraviĝas kaj baldaŭ infektas tutajn naciojn.

Trovita solvo, eĉ post neagrabla diskuto, male evitas amason da suferoj tuje kaj militon estonte. Neniu mortis pro la diskuto pri lernejoj en Silezio. Kontraŭe ĝi forigis utile kelkajn nubojn.

Anstataŭ ekzameni tiajn abscesojn mem, oni dum jaroj diskutadis la demandon, ĉu ilin esplori aŭ ne.

Klara estis la rezultato: unuflanke pligraviĝis kaj inflamiĝis la danĝeroj surloke kaj aliflanke tamen plivastiĝis la timata ideo pri la kontrolo, post tiom da parola batalado pri ĝi antaŭ la tutmonda publiko.

Temas ĉi tie ne pri estonta doktrino, sed pri spertoj jam faritaj. Tial ne estas multe direbla pri la internacia kontrolado de l' armiloj. Ĉefe ĝi gravas en sia rilato al la popolaj sentoj pri sekureco aŭ timo je danĝeroj.

Malfido estas detruilo por ĉiu societo. En ordinara vivo, sur la stratoj iradas grandega plimulto de homoj sen ia armilo en la poŝo. Ĉar ili ne kunportas mem revolverojn, ili ne imagas, ke la ceteraj pasantoj agas malsame, almenaŭ ne multaj. Ankaŭ oni ne vidas armilvendejojn en ĉiu stratangulo, kiom cigarbutikojn aŭ kafejojn. Kiam ekzistis tiom multaj, tiam oni ne havis tiun senton pri relativa sekureco, kiu nun ekzistas iom.

Inter nacioj male, tre ampleksaj kaj tre videblaj estas armilaroj. Kaj, se ili ne estas publike videblaj, eĉ pli timindaj imagas ilin la malfido de l' najbaroj, emaj suspekti kaŝon. Nur kontrolaj eblecoj kaj kontrola kutimo sukcesos iam malkreskigi la malfidon sur tiu ĉi kampo. Senarmigo, sen kontrolo reciproka, nur instigas al suspektoj en la komenco.

El kio konsistas la sento pri sekureco en loka vivado dum paco? El la konvinko pri senarmeco sufiĉe ĝenerala, el la malofteco de krimoj, el la kutimo iri al juĝejo anstataŭ uzi perforton. Impresas ankaŭ la ekzisto de garda polico, sed ne tiom, kiom oni kredas

Unue la polico estas nombre malgranda. Plie ĝi ne malebligas krimojn. Nur aresti la krimulon ĝi

kapablas. Plej kompleta sekureco ja troviĝas en vilaĝo, kaj tie ekzistas nur unu ĝendarmo, eble eĉ ne unu.[1])

Pli sentebla timo pri danĝeroj ekzistas en la urbegoj, kie polico estas pli videbla, kaj en ties ĉirkaŭkvartaloj, kie krimoj estas pli oftaj. En Rusland la imperiestroj tenis ĉirkaŭ si multegan policaron. Tamen unu post alia caro falis mortigite. Ĉie oni vidis uniformojn tie. Tamen ne trankvilaj sin sentis la vizitantoj.

Vidu la strangan najbaron en apuda kampardomo. Nokte li dormas kun pretaj pafiletoj sur ambaŭ tabletoj. Lian sintenon observas psikologo. Supraĵe vi klarigos per timo lian armitecon. Profunde vi trovos ankaŭ ĝuste la malon. Liaj propraj armiloj kaŭzas parte lian timon.

Internacia sekureco, en formo de popola sento, kreskas nur el kutimiĝo al solvo de konfliktoj per tribunalo, el sperto pri militoj evititaj, el konfido kaj kontrolebla senarmigo. Ĉia malfunkcio, ĉia malfido, ĉia minaco, ĉia ultimato, ĉia paniko refortigas la malan senton pri danĝero, ankoraŭ la pli fortan sur tiu interŝtata kampo.

Antaŭ ĉio necesas la konvinko de la popolamasoj kaj tion disponas reĝe la gazetaro presa kaj parola.

1) En Eŭropo la sento pri sendanĝereco estas pli forta ĉe malgrandegaj ŝtatetoj kiel Lichtenstein aŭ Andora Respubliko ol ĉe la plej grandaj, mem superarmitaj.

## XVII.
## *AKIRITAJ KUTIMOJ*

*Skriba rezigno je milito — Defendaj armeoj — Gasoj — Rimedoj por milito — Rimedoj por paco — Germanujo pri Ruhr-invado — Francujo kaj Bismarck en 1875 — Adoro al antikvaj rimedoj — Adoro al novaj — Konflikto inter malaj adoroj — Haga Tribunalo — La juĝoj — Publika malaprobo kiel haltigilo — Pastraro pri packontraktoj — Decido de l' Anglikana Eklezio — Rezisto al nacia leĝo — Lord Ponsonby — Korfu — Formiĝo de kutimoj — Sento federala — Flagoj — Patriotismo regiona kaj federala — Naciaj kaj religiaj festoj — Kristnasko kaj festo pri Mithra — Mikso kaj supermeto de kutimoj.*

Iaj kutimoj stariĝis per la Ligo de Nacioj. Tiu ekkerno de Ligo kreskigis propran moralon unue supraĵe. Militon oni rezignis per publika kontrakto. Ĉiuj regnoj de la mondo subskribis ankaŭ la solenan Kelloggan promeson kun Usono. Surpapere la milito fariĝis krimo, sed ĉu konvinkiĝis are la naciaj animoj? Ankoraŭ ne. Nur al propra bonfido kredas ĉiu. La bonfidon de la ceteraj oni pridubas. Kontraŭ la novaj kutimoj staras la malnovaj kun pli longa sperto. Kontraŭ la pacrimedoj pli perfektiĝas la militrimedoj. Unu

milionon vi elspezas por la pacigiloj kaj unu miliardon por la batalilоj, ofte la miloblon. Jen la barometro pri la malfido.

Apartenas al militflanko ĉio teatra kaj pompa en la publika vivo. Fierajn flagojn, viran muzikon ŝatas la popolamasoj. Tion havigas nek Ligo de Nacioj, nek Haga Tribunalo, nek Kellogga Kontrakto. Sed armeo ja. Per uniformoj, paradoj, ceremonioj, funebroj kaj manovroj, ĝi plezurigas tiun emon de l' publiko. Simbolon kaj koloron de l' patrujo ĝi preskaŭ monopolas. Al la balkono vi kuras por ĝin rigardi, kiam eksonas trumpetoj.

Nu, kiel tio malutilus? iu demandas. Ĉiu patrujo ja subskribis la Kontrakton pri rezigno je milito. Ĉiu estas netuŝebla. Ĉiu armeo nur defenda. Dume ĉiu prepariĝas por batalo, en okazo de atako.

Antaŭe la soldato, kun la piedoj en neĝo sur la landlimo, defendis ja la hejmon kaj familion. Nun mankas eĉ tiu konsolo. Se lia brava lando kontraŭstaros la invadon, tiam la edzino kaj infanoj eĉ pli riskos ol li mem. Dumnokte falos el alta ĉielo gasbomboj sur la urbojn kaj vilaĝojn. Mortigaj nuboj disfluos ĝis la fundo de rifuĝaj keloj.

Siajn bruligitajn pulmojn elvomos knabinetoj en la brakoj de l' sufokita patrino.

Kompreneble ĉiu armeo povas revenĝi kaj ekflugi kun bomboj por buĉi la familiojn de l' kontraŭa lando. Sed ne aperas la maskoj en la belaj paradoj. Ne prikantas la muziko la raŭkajn ĝemojn de la brulvunditoj. Fiere flirtas la standardoj, noble paŝas la ĉevaloj kaj al la fenestroj miljara kutimo logas la popolon.

Ke la militrimedoj malhelpas al la pacrimedoj,

pri tio pensas neniu. Ke malfido kreskas pro armeoj kaj armiloj, tion kalkulas neniu. Ke la viaj instigis la najbaron konservi la siajn, tion vi ne rimarkis. Kia juĝejo, kia tribunalo sufiĉus certigi nian sekurecon en urbo, kie diversaj partioj estus ege armitaj?

Aliaj rimedoj ol milito jam estis uzataj por defendi nacion. Kiam francaj regimentoj invadis la Ruhran distrikton post la mondmilito, Germanujo ne batalis per pafiloj. Francujo mem devis baldaŭ revoki hejmen siajn soldatojn pro publika malaprobo ekstera kaj hejma.

Ankaŭ Francujo rifuzis batali en 1875, kiam Bismarck minacis je invado. Al princo von Hohenhole, germana ambasadoro, la duko de Decazes, tiama ministro de eksteraj aferoj, deklaris fiere, ke Francujo ne respondos al tiu atako, se ĝi okazos, kaj lasos al la invadontoj la tutan kulpon pri ĝi: »Mi konsilos al nia marŝalo retiriĝi kun armeo kaj registaro malantaŭ la riveron Loire kaj atendi tie, sen pafo, ĝis vin juĝos Eŭropo aŭ Dio...«[1])

Ne ekzistis tiam eĉ Ligo de Nacioj. Tamen ne okazis la atako, parte pro la timo je rusa interveno post diplomataj avertoj.

Jen du ekzemploj de senmilita defendo sukcesintaj. Neniu regno estas devigata mem kondamni siajn urbojn kaj vilaĝojn al detruo por havi la rajton plendi al tribunalo. Lia rajto restas entuta, se ĝi rifuzis militi. Tiam ankaŭ ebliĝas nenia dubo pri la kulpo de l' atakinto.

[1]) Letero al la franca ambasadoro en Berlino 29 Aprilo 1875. Vidu Hanotaux: *Histoire de la France contemporaine* kaj specialan numeron de la franca revuo *Paix par le Droit*. Februaro 1931, kun dokumentoj.

Kompreneble kuŝas tie granda risko. Ĉu la risko estas malpli granda ĉe l' alia metodo? ĉu venkinte, ĉu venkite, ruinigita lando tamen devas pledi poste. Luksemburgo kaj Belgujo, ambaŭ retrovis memstarecon post la mondmilito. Unu batalis,[1]) alia ne. Ĉinujo perdis Manĝurion malgraŭ provoj je batalo.

La plej ofta juĝilo pri tiaj aferoj ne apartenas tiom al malvarma kampo de la faktaj rezultatoj, kiom al la varma kampo de la sentoj pri honoro kaj braveco. Pli ofte ne pripensas la homoj, sed ja *sentas*.

Nu, pri sentoj kaj etika juĝo en tiaj okazoj vi devas konstati vere du malsamajn religiojn kun du moraloj:

La malnova etiko turniĝas al la estinteco. La nova al la estonteco. Kiuj rimedoj estis dum jarmilo necesaj, tiuj fariĝis ja sanktaj. Sekve sanktaj ili restas por tiuj, kiuj ne ŝanĝis la kredon. Kiuj ŝanĝis, tiuj fidas je rimedoj novaj. Kaj se la malnovaj iloj malhelpas la novajn, tiam ili fariĝas eĉ abomenaj al la novkreduloj.

Jen du samurbaj familioj, ambaŭ kun patro honesta oficisto: En unu hejmo la infanoj ricevas ludilojn el milituniformoj aŭ plumbsoldatoj. Tie li vorto *antimilitaristo* estas kvazaŭ sinonima kun *malmorala*. Ĝi vekas senton malplaĉan kaj juĝon severan. Pro hejma kutimo ĝin klasigos samfake la gefiloj kun la vortoj *ŝtelisto* aŭ *danĝerulo*, minimume kun *frenezulo*.

En la dua familio aspektas militludilo kiel sovaĝa barbaraĵo, bataloj kiel buĉegoj, la vorto militisto kva-

[1]) Belgujo ne batalis nur pro si mem, sed ankaŭ pro sia promeso malebligi trapason de sia teritorio por ataki alian najbaron. Lojaleco ne permesus alian sintenon sen sufiĉa antaŭ-averto pri l' rezigno je la promeso.

zaŭ insulto. Malsama etika tradicio nun staras kontraŭ la alia. Tie vi troviĝas antaŭ du malaj religioj, eble sub la sama nomo, ĉar ekzistas ekzemple tipoj de Kristanismo respondantaj al ambaŭ modeloj.

Unu estas adoro al la ĝisnuna plej ofta formo de sindefendo, alia signifas adoron al nova formo sopirita kaj bonvenigata. Ili reprezentas du religiojn kun amo al akceptita kadro, ŝatata pro kutimo aŭ ŝatata pro espero.

Ambaŭ havas sian netuŝeblon, ambaŭ sian fanatikecon. La plej profunda realo estas tamen nur unu sama: potenca instinkto pri memgardo. La malnovaj iloj de sekureco fariĝis sanktaj por tiuj, kiujn ili savis. Ili fariĝas abomenaj al tiuj, kiujn ili ne plu ŝirmas. La respekton gajnos la novaj rimedoj laŭ la kresko de ilia kapablo savi aŭ protekti.

Ŝato al utilo antaŭen aŭ malantaŭen. Rigardu malfeliĉajn vespojn, dum ili rondflugadas ankoraŭ daŭre super tablo, kie ja estis, sed jam ne estas, fruktokonfitaĵo. Tiel persistas kaj zumadas plue la homa logo al la malnova sistemo de nacia defendo; kaj eblan pikvundon ĉiuj timas.

Dum la malnovaj rimedoj restas ligitaj al kutimo, la novaj kreskigas iajn sentojn pozitivajn. Antaŭ ol starigi fidon, ili faciligas juĝojn. Tribunalo nun ekzistas en Hago. Ĝi jam juĝis plurajn aferojn. Eĉ grandaj regnoj pledis tie. Preskaŭ ĉiuj akceptis la devigon iri tien. Se alia subskribinto tion postulas, ili devas ĉeesti.

Kiu malkonsentas, tiu malbonfamiĝas. Ne la detaloj mem interesas la publikon, ekster la du regnoj. Pri tio la gazetaro ne multe parolas. Kio impresas,

tio estas la sinturno al juĝado anstataŭ al milito. Jen la frapanta novaĵo.

Se iu regno mobilizas kaj rifuzas arbitracion aŭ repaciĝon, ĝi rompas jam du kontraktojn, la Ligan kaj la Kellogan, sed antaŭ ĉio ĝi ofendas la ceterajn popolojn. Tion enkalkulis la usona senatano Kellog kiel solan sankcion. Generala malaprobo ja influas la individuojn per morala premo. Ĉu ankaŭ al la nacioj ĝi povas efiki? Ĉio dependas de la gazetaro kaj de ties eblecoj paroli sendepende.

La malsukceson de la Ligo pri la manĝuria konflikto klarigas parte la granda malproksimeco inter Eŭropo kaj Estrem-Oriento, sed ankaŭ la izoleco de la japana popolo per unuflankaj informoj. Cetere la samon rimarkis la japanoj renverse.

En Okcidento la publiko nur interesiĝis pri tio, kio frapis ĝin kiel rompo de solena promeso. En Japanujo regis nur la detaloj pri la surloka situacio kaj indigno pri la malkompreno de la Okcidento.

Tiamaniere la ilo de »tutmonda opinio« ne funkciis en tiu ĉi okazo kaj male la japana popolo ricevis eĉ impreson, ke la Okcidenta juĝo estas maljusta kaj iom hipokrita, ĉar multfoje la Eŭropaj potencoj agis ja simile por defendi siajn interesojn antaŭ la subskribo de la novaj kontraktoj.

Tia izoleco de unu nacia opinio kaj akra kontraŭeco inter enlanda kaj ekstera vidpunktoj povas ekzisti ankaŭ interne de iu ajn kontinento, kiam krizo aŭ danĝero kunigas tutan popolon kvazaŭ fervoran ŝafaron ĉirkaŭ amataj gvidantoj.

Sendube la radioparoladoj penetras nun ĉien kaj ebligas ian komparon kaj kontrolon, sed la lingva

diverseco kaj la nacia atmosfero en kolera momento starigas sufiĉajn murojn el psika materialo.

Malgraŭ tiuj baroj, tamen ideojn kaj ekkomprenojn disvastigis la kontraŭmilitaj kontraktoj, eĉ se la tekstoj mem estas nekonataj de la vasta publiko. La difino pri atako fariĝis jam pli preciza. Komenci militon antaŭ ol plendi al juĝisto aspektas kiel krimo, almenaŭ el ekstero.

Ne montrinte la vojon, iuj ŝtataj pastraroj eksekvis tamen la movadon, kvankam timeme. Inter ili, kelkaj predikistoj kuraĝis defendi militrifuzantojn. Eĉ ili fondis internacian asocion tiucele.

Tro timemaj por ilin aprobi, tro ŝtatdependaj por reveni, antaŭ ol la publiko mem, al la krista absoluteco kontraŭ venĝo kaj mortigo, tamen eklezioj profitis la okazon de tiuj kontraktoj por ekmarŝi unu paŝon antaŭen.

Ni jam citis la severan Encliklikon de la Papo *Urbi arcano* kontraŭ egoismo nacia.[1]) En 1925 la Stockholma Kongreso kunigis la ceterajn kristanajn ekleziojn. Iagrada *mea culpa* estis konfesata tie. Fondiĝis universala Alianco por paciĝo per eklezioj. Ĝi poste disvastigis tiun ideon, ke la ŝtatoj havas devon eviti militon.

En 1930, en sia regula Konferenco ĉe Lambeth Palaco en Londono, la anglikana Eklezio decidis oficialigi por si la konkludojn de tiu Alianco.

Por rezolucio 22-a la Ŝtateklezia Konferenco »deklaras, ke milito, kiel rimedo por solvi konfliktojn inter nacioj, estas neakordebla kun la ekzemplo kaj instruo de Kristo.«

[1]) En ĉapitro VII pri Eklezio kaj Ŝtato.

La rezolucio 23-a »opinias unue, ke paco ne estos atingita antaŭ ol la internaciaj rilatoj estos reg-ataj de religiaj kaj etikaj principoj, kaj due, ke la morala juĝo de la homaro devas esti varbata al la flanko de la paco.«

Rezolucio 27-a dekretas, ke »post kiam nacioj solene sin ligis per kontrakto aŭ interkonsento pri paca solvo de internaciaj disputoj, la kristana eklezio en ĉiu el tiuj landoj devos rifuzi sian konsenton al iu ajn milito, se la registaro de ĝia propra regno ne deklaris sin preta submeti la kaŭzon de la konflikto al arbitracio aŭ pacigo.«

Tio estas ja malsama ol la ĝisnuna kutimo beni armeojn ambaŭflanke. La nova decido devigus la Eklezion kontraŭstari eĉ nacian defendon, se la ŝtato rifuzis iri al Ĝenevo aŭ Hago. Sed la demando restas, kiamaniere la ŝtato provos informi la Eklezion kaj la publikon pri sia diplomata agado en tia danĝera momento. Tie kuŝas la dubo.

Tial daŭre proponas kelkaj pastroj de la mal-plimulto la puran kaj simplan rifuzon al ĉia milita partopreno kiel neakordeblan kun la ekzemplo kaj instruo de Kristo, ankaŭ ne kun la tradicio de l' unua-tempa Eklezio.

Doktrina kaj fakta estas la diferenco. Principe ankaŭ la plimulto, per la citita decido, jam forlasis la laŭleĝan grundon por ekpaŝi al malobeo, almenaŭ en unu difinita ebleco. Ĉu ĝi plene komprenis tion, ne estas tute certe.

Proklami devon rezisti al la nacia leĝo de la ŝtato, se ĝi malobeis la internacian regulon, tio estas enlande kontraŭleĝa kaj ribela minaco, eĉ se nur teorie.

Se iam laŭlitere ĝi estus aplikata, tia decido ris-

kus enŝlosigi en malliberejon eĉ arkepiskopon de Canterbury kaj memorigi pri la tempo de Vilhelmo-la-Venkinto. Sed ankaŭ tio estus kontraŭleĝa.

Sama spado teorie pendas super la kapo de Lord Ponsonby kaj de la centmiloj da kulpuloj subskribintaj lian faman deklaron. Senkondiĉe la dokumento ligas ilin per promeso rifuzi ĉian servon al milito en ĉiu ajn okazo. Ili ne vidas alian rimedon por forigi militon kaj opinias la buĉadon malmorala eĉ por sin defendi, kiam ekzistas juĝejo. Eĉ se nur du procentoj el ĉiuj homoj promesus la samon, ili diras, ne ekzistus sufiĉe da malliberejoj kaj milito fariĝus neebla.

Pri la etika flanko, jen ilia vidpunkto: Ĉu vi rajtas pafi najbaron enirintan vian ĝardenon por ŝteli viajn posedaĵojn? Hezitas la leĝo. Ankaŭ la Eklezio. Anglaj kvakeroj respondas *ne*. La hereditan moralon oni ne plu akceptas sendiskute. Formiĝas aliaj sentoj. Alloĝas novaj rimedoj. Eknaŭzis la malnovaj. Sammaniere malaperis dueloj iom post iom.

Tipa estis la grek-itala konflikto. Ĉe greka landlimo krimuloj ie mortigis en 1923 italajn membrojn de limfiksa komisiono. Tuj Italujo sendis ŝiparon kaj okupis la insulon Korfu. Grekujo ne pafis, ne deklaris militon. Ĝi sin turnis al la Ligo kaj al la Konferenco de l' ambasadoroj, la du internaciaj ekzistantaj ebloj.

En Ĝenevo kunsidis la Konsilantaro kaj proponis formon de paciĝo. Ĝin akceptis la Konferenco. Konsentis Grekujo. Forlasis Korfuon Italujo kaj ekspiris la insulanoj. Kio estus rezultinta en okazo de rezisto milita? Amasoj da kadavroj ne faciligas poste la reciprokajn cedojn.

Ĉiu teritorio senmilite liberigita, ĉiu invado pace repuŝita kreas antaŭaĵon.

De l' antaŭaĵo al kutimo. De kutimo al konfido. De konfido al moralo. Jen la progresado laŭ ĉina priskribo.

Iam la juro povos malpermesi eĉ defendan militon, kiam sperto kapablos ĝin anstataŭi sukcese per paca protekto.

Inter usonaj ŝtatoj aŭ svisaj kantonoj jam ne ekzistas la demando. Kvazaŭ religie potenca fariĝis la forto de la sento federacia aŭ *federala*.

Verdire ĉe la homoj ĉiam ekzistas religiaj emoj al fortegaj araj sentoj. Nur la formon ili ŝanĝas. En Moskvo, post la mondmilito, laboristaj amasoj salutis jam la restaĵojn de Lenin kun sama fervoro kiel, antaŭ la milito, la popolo salutis eklezian sanktaĵon.

Inter burĝaj skeptikuloj en Okcidento la patruja flago aŭ nacia himno kortuŝas eĉ la plej malmolajn. En Sovjeta Ruslando tion sukcesas la flago ruĝa kaj la kanto de l' *Internacio*. En ambaŭ lokoj kaj en ambaŭ okazoj iu regnano, kiu ne forprenus respekte la ĉapon aŭ ne partoprenus la kutiman saluton, riskus insulton aŭ baton tute same kiel pro blasfemo.

Tion memorigi nepre necesas por ekkompreni ĉion entenatan en konflikto inter du moraloj, subtenataj de du malsamaj »religioj« aŭ adoroj. Tiu sento nova, kiu disvastiĝis en Okcidento grandskale post la mondmilito, ne plu rigardis la nuran patrujon kiel plej superan plafonon, sed la homaron, alie dirite jam ne la eron, sed la tuton.

La svisa respublikaro mem konis interne tiun saman evoluon de patrujamo tra sia historio. Ĝiaj kantonoj kutimiĝis al aparta vivo de diverslingvaj ŝtatetoj, ja kunligitaj, sed fiere memstaraj, eĉ sendependaj. Por ĉiu el ili la vorto *nacio* dumlonge signifis

la popolon de unu landeto, la propra »respubliko kaj kantono« fervore amata.

Ankoraŭ nun ĉiu kantono ĵaluze konservas ne nur sian apartan registaron kaj propran parlamenton, sed ankaŭ sian himnon kaj flagon kun propraj koloroj.

Tian karan simbolon vi tute ne povus kompari kun la ŝildo de ia urbo aŭ provinco.

Male ĝi estas vera standardo de la patrujo kaj, jam de centjaroj, ĝuas religian respektegon, kiu daŭras apud la respekto al la federala svisa flago, poste oficialigita dum la XIX-a centjaro.[1])

Antaŭ ne tiom longe rezignis la svisaj respublikoj pri siaj apartaj armeoj kaj, ne de tiom longe, la komuna standardo estas ĉie salutata emocie apud la malnova kantona flago, ankoraŭ pli multobla ĉe la fenestroj dum publikaj festoj.

Avoj de la nunaj ĝenevanoj diris »veturi Svisujon« por vojaĝi al Lausanne. Iliaj aŭtomobilistaj nepoj ankoraŭ nomas la straton inter ambaŭ urboj la »strato al Svisujo«.

Jam de longe Francujo konis internan unuecon, kiam ankoraŭ bataleme la naciistoj de Ĝenevo aŭ Friburgo defendis sian patriotismon kontraŭ la nova mentaleco »federala«, kiu al ili ŝajnis tiom danĝera kaj kontraŭnacia, kiom la nuna internaciismo. Por ili la *patrujo* signifis la propran ŝtateton. Ne pli longe ol de tri generacioj ĝeneraliĝis en la svisaj lernejoj la egaleco inter la du patrujamoj. Estas facile organizi demandarojn laŭ usona enketemo. Al la nomo »patrujo«, nun-

[1]) Vidu ankaŭ William Martin: *Histoire de la Suisse*, Paris, Payot 1924.

tempaj lernantoj respondus, iuj per sia kantono, iuj per Svisujo, iuj per ambaŭ apude.

Eĉ la vorto *federala* ŝanĝis la signifon post kvindek jaroj. Tion atestas la lingvoj mem. Antaŭe ĝia senco estis simila al nuna federalista: partiano de federacio. Hodiaŭ usonangle aŭ svisfrance la vorto simple rilatas al ĉio koncernanta la centran registaron. Eluziĝis la vorto.

Vidu la evoluon de la vorto *patrujo, patruja, patriota,* k. t. p. Hieraŭ en Svisujo ĝi rilatis nur al unu respubliko, ĉu Berna kantono, ĉu Tiĉino, ĉu Ĝenevo. Hodiaŭ ĝi entenas ankaŭ la ideon pri tuta Svislando kaj cedas al ĝi ĉiam pli da loko.

Antaŭ unu centjaro, en 1830, la tutsvisaj patriotaj societoj renkontis ĝuste la saman kontraŭstaron kiel en 1930 la porpacaj asocioj. Ili ŝajnis kontraŭnaciaj kaj antipatriotaj, ĉar ili klopodis amigi pli vastan patrujon ol la ĝisnunan, la lokan respublikon.

Similan batalon oni konstatis pri ĉiu plifortigo de la centra povo. Unue neniu kantono volis cedi eĉ iom de sia absoluta suvereneco. Poste ĉiuj ekkomprenis iom post iom, ke tio estas neevitebla por la komuna bono.

Interne la diversaj kantonaj institucioj ankoraŭ malsamas en pluraj detaloj. Ankaŭ antikvaj ĵaluzoj, preferoj, simpatioj aŭ malsimpatioj ne tute malaperis, sed ĉar jam ne ekzistas kantonaj armeoj, sed nur kantonaj policoj, tiuj sentoj esprimiĝas nur per kantoj, ŝercoj aŭ karikaturoj, malpli danĝeraj ol milito.

Sed, kiam okazas ia datreveno, tiam la sento pri la plivasta komunlando regas apud la malnova patrujamo. Ambaŭ himnojn oni kantas, la federalan kaj la kantonan.

Ne estus mirinde, se la Eŭropaj regnoj iam spertus tute similan evoluon. Cetere ĝi jam komenciĝis. Du paŝojn antaŭen, unu malantaŭen, tri pluajn, du revenen, tiel progresas ĉiu societo.

Dum homoj batalas, ili volonte kredas je dilemo inter ĉio aŭ nenio. Iuj vidas la malnovan adoron absolute forigota kaj la novan adoron sendiskute akceptota, aŭ male la novan venke repuŝota kaj la malnovan glore konservota. Tio estas kontraŭa al sperto historia. Ĝenerale ia geedziĝo fine stariĝas inter ambaŭ sentoj.

Fiksante daton por Kristnasko, la papo Liberius elektis la sunfeston de la Mithra religio, kies ĝojigan kutimon ŝatis la popolo. Tiel ĉiuj estis pacigitaj en fakta interkonsento kaj la moderna kristnaskfesto entenas ankoraŭ la paganajn manĝegojn samvespere kun la meso noktomeza. Neniel inspira ekzemplo ĝi estas, sed notinda realaĵo.

En Svisujo la nacia festo havas propran daton[1]) en alia monato ol la Berna Festo aŭ la Geneva Eskalado, kiam oni kantas la kantonan himnon[2]).

Post kvincentjara sinsekvo de kunligoj, ĵaluzoj, interbataloj kaj repaciĝoj, la svisaj respublikoj fine formis solidan ligon kun forta komuna sento inter egalrajtaj diverslingvanoj. Ke same okazos iam inter pli grandaj kaj pli kleraj nacioj, tio estas supozebla kaj nenio malhelpus tiam, ke, unu tagon en la jaro, ĉiuj nacioj en la mondo sonorigu samtempe la sonorilojn de siaj urboj kaj vilaĝoj por soleni sian sopiron al paca kunvivado.

1) 1 Augusto, datreveno de la unua Kontrakto inter svisaj kantonoj en 1291.

2) 12 Decembro, datreveno de la ĝeneva batalo kontraŭ Savojo en 1602.

## XVIII.
## *NOVAJ MISTIKOJ*

*Senmistika Ligo de Nacioj — La Internacioj — Lerneja instruado pri Ligo — Ĝia senvarmeco — Mistiko per naciaj lingvoj — Grandpotencaj nacilingvoj — Eksperimento pri internacia lingvo — Liga enketo pri Esperanto — Psikologio de esperantista mistiko — Neŭtralismo — Ties malsameco je laborista internaciismo. — Potenco de lingvo servanta senton — Angla lingvo kaj hindi en Hindujo — Zamenhof en Litva lando — Miksaj regnoj — Ties oficialaj nomoj — Esprimo de la sento pri unueco — Plaĉo de diverseco — Japana atestinto: Inazo Nitobe — Rolo de kolektivaj emocioj.*

Al Ligo de Nacioj mankas ia mistiko. Por ke ĝi fariĝu komuna patrujo laŭ la usona bildo de Unuigitaj ŝtatoj, necesus ia propra patriotismo, ia kredo, ia lingvo, ia religio aŭ adoro por subteni ĝian moralon. Nur statuton ĝi posedas. Tro seka ĝi estas.

Ĉiu regno havas patrujamon por sin helpi. Tro juna estas la Ligo por esti amata aŭ adorata. Ankaŭ tro malegaleca. Ties gvidantoj mem pliamas sian hejman patrujon. Dumlonge la svisa respublikaro spertis la samon. Iom post iom komuna sindefendo, kun-

batalo, armeo kaj tutlandaj pafkonkursoj fariĝis la plej forta ligilo. Pro tio multaj intelektuloj tiom ŝatis armeon. Ke ekzistas alia ligilo multe pli solida, tion ili nur poste komprenis.

Militan religion la Ligo ne povis krei al si, ĉar ja por forigi militon ĝi estis fondita.

El kolektiva bezono je paco ĝi vivas. El popolaj sopiroj al konkordo ĝi sin nutras. Aranĝitan katekismon pri siaj celoj ĝi klopodis instruigi en la lernejoj. Sed la Statuto de la Haga Tribunalo aŭ la Liga Kontrakto de Wilson nek kortuŝas geknabojn, nek entuziasmigas junularon, se ne vivigas ilin escepte fervora instruisto.

Jura dokumento, diplomata organizo, burokrataj oficejoj, jen pano por pripenso, sed ne lakto por la koro. Kompare, la naciaj patrujoj sidas pli avantaĝe. Ili havas propran flagon, lingvon aŭ tradicion, poezion kaj muzikon, glorajn memoraĵojn, brilkoloran historion, unuvorte senton, emocion.

Ĉio simila mankas al la Ligo. Nova estas ĝia sperto, abstrakta ĝia leĝo kaj seka ĝia dulingva literaturo. De la komenco, du grandpotencoj plenigis la oficejojn per siaj regnanoj kaj trudis siajn du lingvojn kiel sole oficialajn.

Ĉe la kunvenoj, la ceterlingvaj delegitoj estas devigataj peni por legi angle aŭ france manuskripton antaŭskribitan, dum oratoro el Parizo aŭ Londono rajtas ilin fulmotondri per elokventa parolado en sia nacilingvo. Ofte la diplomatoj estas multlingvuloj. Malofte la gvidantoj mem de la popoloj. Kiu hejme kapablas entuziasmigi amasojn, tiu sama en Genevo fariĝas vireto ĝenata, komplete dependa de tradukistoj.

Nur imagu iun Briand en Nanking aŭ Tokjo por ekkompreni la maljustaĵon per supoza renverso.

Eĉ pli grave suferas la publika opinio en ĉiuj landoj. Al la bezonata sento pri *komuna patrujo krom la nacia* entute mankas organo. Por vivi aŭ kreski ĝi ne havas eĉ akvon. Ĉio, kion faris centra lingvo por unuigi vastan landon kiel Francujon aŭ Usonon, tie malestas. Iam la lingvo latina kunigis la kristanan mondon. El la uzo moderna ĝi plene forfalis sen ia espero al praktika reviviĝo.

La mondon Islaman servas araba lingvo, komuna ligilo kaj esprimilo. Vivanta kaj kapabla ĝin konservis senhaîta uzado.

Ekzistas ja sperto tutmonda pri helplingvo kaj federala sento sur malgranda skalo: la esperantista eksperimento. Multaj kleruloj ĝin ignoras. Ili nescias, ke ĉiudutage aperas nova libro en Esperanto kaj ĉiumonate kvanto da gazetoj en tiu lingvo. Neniam ili aŭdis, ke ĝin parolas kiel solan kongreslingvon grandaj internaciaj kunvenoj kaj aplaŭdas elokventajn oratorojn el diversaj landoj.

Tie la hungara delegito gravas kiom la usona, la ĉina kiom la franca. Neniu timas tie fari erarojn uzante fremdan nacilingvon de potenca najbaro. Pli certa pri si mem kaj pli egala kun aliaj, ĉiu sin esprimas pli trafe kaj libere.

Okazis kunvenoj de kleruloj, komercistoj, laboristoj, edukistoj, katolikoj, ĉiuj kun aparta ligo internacia. Sed komuna estas la helplingvo. Krom angla, franca kaj germana, Esperanto estas nuntempe la sola lingvo uzata de prelegistoj por organizi rondvojaĝojn kaj rekte alparoli ĉie sen traduko naciajn aŭdantarojn en urboj kaj urbetoj de kvin kontinentoj.

Pri esperanto enketis eĉ Ligo de Nacioj. Tion decidis ĝia dua ĝenerala kunveno. Ĝi trovis dekkvin ŝtatojn instruantajn la lingvon en diversaj lernejoj kaj kalkulis okcent mil plenaĝulojn sekvintajn publikajn kursojn. Sir Eric Drummond malfermis en la Sekretaria Palaco Konferencon de edukistoj pri la rezultatoj atingitaj per tia instruado. Deksep ŝtatoj partoprenis.

La raportintoj insistis pri la morala efiko al la geknaboj. Esperanto estas neŭtrala. Ĝin ilustras verda flago, el espera koloro, apud la nacia flago. Ĝi posedas ankaŭ himnon pri la nova sento kaj espero je konkordo. Stariĝas infanoj por ĝin kanti post la nacia himno.

Kun lernantoj alilandaj ili korespondas. Geografion ili lernas. Bildojn kaj specimenojn ili interŝanĝas. Grupe ili vojaĝas. Ilin eksterlando ĝoje bonvenigas. Por ili la nova lingvo simbolas idealon de kunlaboro kaj egaleco inter la popoloj super la diversaj kredoj politikaj aŭ kulturaj. Ekzistas jam vasta literaturo kreskanta ĉiutage pri laboroj de scienco, paco kaj belarto.

Tion konstatis la Liga raporto kaj ĝin akceptis per voĉdono la tria ĝenerala kunveno.[1])

Sed nenion pri lernejoj oni decidis. Pri gravaj aŭ malgravaj aferoj de ĝenerala utilo, pri senarmigo, pri doganoj, pri trafiko, pri helplingvo, pri ĉio ajn la Ligo, jam de la komenco, voĉdonis nur pri raportoj, malofte pri decidoj.

Lord Cecil kuraĝigis la esperantistojn plivastigi la eksperimenton. En la Komisiono por intelekta kun-

[1]) Ligo de Nacioj. *L'Esperanto comme langue aŭxiliaire internationale, rapport adopté par la Bème Assemblée*. Genève, 21 Septembro 1922.

laboro, la ministro Léon Bérard kontraŭbataligis Esperanton, kiun li malpermesis en la francaj lernejoj malgraŭ favora petskribo de dudekkvin scienculoj, membroj de l' Akademio.

Post kiam nuligis lian dekreton nova franca registaro, la Kvina Kunveno de la Ligo rekomendis, ke ĉiuj ŝtatoj akceptu, samtarife kiel nacilingve kaj latine, la telegramojn en Esperanto, konsiderata kiel »praktika helplingvo de internacia komunikado.«

En 1925 la regnoj de l' Interŝtata Telegrafa Unio, ĉe Pariza Konferenco, decidis tion per ŝanĝo en la statuto.

Kio interese elstaras el la duoncentjara sperto pri Esperanto, tio estas la nova mistiko aŭ ara sento, kiun ĝi disvastigis sur la kampo de interpopola toleremo kaj etiko.

Tiun apartan fadenaron de kolektivaj emocioj delikate analizis angla psikologo.[1])

Ĝuste ĉar ĝi vivas el sento propra, simile kiel nacilingvo, tial Esperanto riĉiĝis kaj fleksebliĝis tiom, ke ĝi sukcesis eĉ allogi novelistojn, oratorojn, eĉ poetojn, kiuj nun uzas ĝin por trafi rekte ĉiulandan publikon, se ne vastegan, almenaŭ tutmondan. Verko tuj legata en kvindek landoj kaj rimarkata de kelkaj ĵurnalistoj en ĉiu regno ricevas kalkulindan atentigon.

Ne informita klerulo imagas, ke tia lingvo restis senviva kun la sama vortareto kiel en 1887 kaj utilas nur en hoteloj aŭ stacidomoj. Fakte ĝi malmulte uziĝas en hoteloj, sed multe pli por kongresoj, teatro,

1) Profesoro Fluegel, Londona Universitato: *Psikanalizo de la esperantista movado.* London 1924. (angle).

somerkursoj, paroladoj kaj ĝenerala divastigo de kulturo kaj homaraj sentoj.

La plej granda parto de esperanta literaturo konigas al ceteraj popoloj la animon de la plej malproksimaj aŭ malgrandaj nacioj, kies lingvoj estas nelernataj ekstere.

La gramatika bazo restis simpla kaj regula, sed la postuloj de kolora esprimado kreskigis ja stilon kaj derivadon same kiel en ĉia ajn lingvo devigata kontentigi la bezonojn de natura uzado.

Tiun eksperimenton oni ĉefe rigardas kiel praktikan proponon por faciligi komunikadon. Fakte ĝi estas multe pli originala kaj rimarkinda kiel elemento de tuthomara patrujamo, kiu respektas la nacian senton kaj ne naskiĝis el antagonismo. Tio estas la neŭtralismo, ofte mokata de revoluciuloj.

Ĝi entenas ĝuste tiun amikeman mistikon — senkoleran kaj senmalaman — kiu mankis al la Ligo de Nacioj por varbi la koron de l' amasoj per lernejo kaj fervoro. Kiuj preferas konservi anemian aŭ senvivan Ligon, tiuj kompreneble havas intereson forpuŝi Esperanton al aliaj Internacioj, kie ĝi povas nur ludi la rolon de ilo oportuna, ĉar ili jam posedas sian propran mistikon, ĉu klasan, ĉu eklezian.

»La perlingva potenco estas granda forto, konstatis la oficiala raporto, kaj la Ligo de Nacioj havas seriozajn motivojn por sekvi kun aparta intereso la progresadon de la esperantista movado, kiu povus iam grandrezulte efiki al la morala unueco de l' mondo, se ĝia disvastigo fariĝus ĝenerala.«

Alia ebleco estas la tutmonda oficialigo de la angla kiel helpa mondlingvo. Tion kontraŭstaras Francujo kaj ankaŭ iom malfide timas aliaj nacioj, kiuj

pliŝatus neŭtralan mistikon ol influon de unu grandpotenco, kompreneble vastigotan per ties lingvo.

En Azio la hinda nacia movado ja uzis la anglan lingvon por sin organizi, sed nun ĝi emas ĉie lernigi hindi, por ĝin anstataŭi kiel helplingvon de la nova Federacio. Tie la sento reaperas kaj sopiras al pli taŭga organo, eĉ se malgajnos la utilo internacia.

Ne la teoria ideo pri internacia lingvo kapablas interesi nin. Pri ĝi same kiel pri paco kaj senarmigo, ni aŭdis priparoli jam de generacioj. Centoj da aliaj vortsistemoj estis konstruitaj kaj ne sukcesis. Postvivis Esperanto pro sia sentoforto. Kio gravas, tio estas la sperto kaj la fakto pri tiu lingvo sur la kultura kampo.

Naskita en tiu Polo-Litovujo, kie miksitaj gentoj kaj religioj interfrapas siajn antaŭjuĝojn kaj malamojn, Zamenhof proponis al la popoloj homaran etikon, bazitan sur la respekto al la ceteraj. Li petis ilin allasi, eĉ simpatie, la kredon kaj lingvon de la ceteraj gentoj kiel egalajn laŭ rajto.

Por miksaj landoj li eĉ rekomendis neŭtralajn nomojn, kiel *Belgujo, Usono, Svislando, Serenisima Respubliko* (antaŭa Polo-Litovujo). Similan ideon jam ŝatis Napoleono, kiam li akceptis la nomon *Ilirio* por la regno de la serboj, kroatoj kaj slovenoj.

Se la germanlingvaj alemanoj, kiuj fondis la svisan Konfederacion, estus nomintaj ĝin *Alemania,* tiam la franclingvaj kaj italaj romanoj ne havus en ĝi sian lokon egalan kaj liberan. Nur unu kvaronon ili reprezentas laŭ nombro, sed multe pli laŭ influo, ĉar ili sidas egale kaj la plimulto ne forigas, sed subtenas ilian apartan kulturon. Ano de la malplimulto rajtas tion konfesi.

Zamenhof klare vidis la solvon de la problemo. En miksa regno: neniu privilegia nacio, kredanta sin sola mastro kaj posedanto de la ŝtato. Interŝanĝe: lojalaj malplimultoj, kunlaboremaj, ĉar egalrajtaj.

Tian kunlaboradon de popoloj, konservantaj propran lingvon kaj animon, li konsideris ebla por la tuta mondo per helpa lingvo kaj homara etiko, universala kaj neŭtrala.[1])

Esperanton li iniciatis por disvastigi tian etikon. Pri liaj ideoj oni forgesis. Tamen, iom post iom, la disvastigo de la lingvo allogis ĉie parencajn pensantojn. Sufiĉe tipa estas la kutimo de la esperantistoj nomi sin reciproke *samideanoj*, eĉ se ili nescias precize kial. Pli ĝuste ili estas ĝenerale samsentanoj.

La sopiro al tolerema kaj federacia mondo ja bezonis esprimilon. Troviĝis Esperanto kaj utiliĝis kiel kanalo. Al la lingvo mem tiu fluo donis forton kaj vivon. La filozofia etiko de Zamenhof revenis en formo de popola sento. Liajn malnovajn broŝurojn pri *homaranismo* jam neniu legas. Nur la lingviston oni konas. Tamen ĝusta sin montris lia kalkulo. Lingvo disvastigas atmosferon. Samtempe ĝi logas al si ĉian sopiron komunan.

La sperto pri Esperanto kuŝas en tio, ke ĝi ebligis disfloriĝon de tiu fluganta sento, kiu bezonis esprimilon. La naskiĝanta kredo je unueco en diverseco, la homaro ekkonscia pri si mem samtempe fidela al la naciaj valoroj, riĉaj je ĉarmo kaj koloro, jen tio, kio donis al Esperanto flugilojn kaj karakteron. Sen ia mistiko enkorpigota, neniam ĝi estus mem

[1] Vidu: *Vivo de Zamenhof*, Leipzig, Hirt und Sohn, 1923.

fariĝinta lingvo vivanta, kapabla servi al parolantoj por entuziasmigi aŭdantaron kaj rabi ties ploron aŭ rideton.

Tiu sperto vekas la scivolemon de lingvosciencistoj penantaj ekzameni la faktojn,[1]) sed ĝi eĉ pli multe interesas psikologojn kaj etikistojn, kiuj esploris arajn mentalecojn. En la *interna ideo* de la esperantista mondo ili vidas kristaliĝon de tiu religia sento, kiu mankas al la Ligo de Nacioj. En la lernejoj Esperanto montriĝis katekismo pli vivanta kaj pli efika ol diplomataj aŭ juraj formuloj.

Tiu sento estas tute malsama ol la klaskonscio kompreneble multe pli potenca en la mondo. La laborista internaciismo devenis el batalo por socia egaleco. Malsimile esperantismo naskiĝis el simpatio kaj scivolemo pri la nacia vivo de la ceteraj popoloj, speciale la malgrandaj. Ĝi entenas la plezuron ilin koni kaj ilin trovi amindaj, ankaŭ la ĝojon konigi al ili la valorojn de la propra patrujo kaj plie ĝui siavice la fakton, ke tio plaĉas al ili.

El tio sekvas amikeco gajema kaj ia sento pri unueco kultura. Britoj, francoj, germanoj, ĉinoj, danoj aŭ poloj estas fine nur homoj, ĉiuj kun similaj zorgoj. Kune oni ŝatus vivi pace. Kian kutimon disvastigas Esperanto, tio estas fidema egaleco kaj reciproka respekto: ĉiuj nacioj kun egala rajto, neniu trudanta sian lingvon al la ceteraj, sed ĉiu konservanta ĝin interne de siaj landlimoj.

»Kio ĉefe impresas, skribis Inazo Nitobe, la japana senatano, kiu reprezentis la Ligon de Nacioj al

[1]) Vidu Prof. *Meillet: Les langues dans l'Eŭrope Nouvelle* Paris 1918.

pluraj Esperanto-Kongresoj, tio estas la unuanima kaj egaleca aspekto de tiaj kunvenoj pro la uzo de de unu komuna lingvo neŭtrala«.[1])

El tiaj akiritaj kutimoj formiĝas novaj moroj de interpopola konduto. Sed la plej forta rezultato, sur tiu limigita kampo, estas la sento, kiu disvastiĝis.

El sentoj vivas la homaro multe pli ol ĝi vivas el racia pripensado.

[1]) *Ligo de Nacioj: Raporto pri Esperanto 1922.* Vidu ankaŭ *Nitobe: The use and study of foreign languages in Japan.*

## *KONKLUDO*

*Esploro de faktoj — Interfrapo de moraloj — Kutimoj kaj sentoj — Ŝanĝoj — Publikaj fenomenoj — Privataj antaŭvidoj — Individuaj iluzioj — Ara vivo — Erinacoj kaj histrikoj — Bono kaj malbono sub naciaj plafonoj — Relativa klasigo — Patrujo kaj patrujoj — Evoluo de moroj — Justeco kaj frateco — Batalo kaj saĝo — Konflikto aŭ adaptiĝo — Formiĝanta estonteco — Ministro Grandi pri sankta egoismo — Gandhi pri angloj — Amo de libereco por aliaj — Nacia honoro — Okulon pro okulo, denton pro dento — Sento kaj logiko — Demando de hindo ĉe religia Kongreso — Lao-ce pri nomoj kaj vortoj — Rolland pri kolektivaj animoj — Individuaj kaj araj respondecoj — Milita fervoro kaj paca kvieto — Rajtoj de subhomaj estaĵoj — Labordivido — Unueco de la mondo — Evoluo de araj sentoj.*

Ni esploris faktojn: Nacian moralon en konflikto kun aliaj. Internacian moralon formiĝantan. Ĝeneralajn faktojn pri kutimoj kaj pri sentoj. Eksperimentajn faktojn, kiuj enkondukas novaĵojn.

Gravas eĉ la plej malgrandaj. El estintaj kaj estantaj miksaĵoj devenas la estonteco. Patriotismo estas,

kunmetaĵo el revolucio kaj konservemo. Similaj elementoj kreskigas novan moralon aŭ moraron. Ĉiu sperto farita, ĉiu kutimo akirita, ĉiu sento disvastigita partoprenas la floriĝon.

Ni ĉiuj emas preferi unu doktrinon. Ĝi kunagas tiom, kiom ĝi estas aplikata, sed ne sola ĝi trovigas. Ankaŭ mil aliaj faktoj lasas sian postsignon en la moviĝanta realo.

Ni ĉesu nun priskribi publikajn fenomenojn. Eĉ sen provo profeti, ĉiu povas ja riski antaŭkalkulon aŭ dedukti konkludojn. Estas lia privata rajto. Sola kondiĉo estu, ne kompromiti sciencon kaj nur propraspeze kalkuli.

La vivo de homaj aroj similas al la vivo de individuoj. Ankaŭ por ili necesas interna sano kaj harmonio de ĉeloj: Iom oni trograndigas iluzie la gravecon de unu ero. Ankaŭ ĝi mem estas aro kaj daŭras nur tiom, kiom ĝi kontentigas la bezonojn de la konsistaĵoj. Malatentitaj partoj emas al dissolvo de la korpo kaj al reveno je aliaj unuaĵoj.

Eroj kaj aroj, individuoj kaj grupoj, akiras konscion pri sia aparta ekzisto. La konfliktoj kun la ekstero kreas kompleksojn aŭ sentarojn batalajn kaj defendajn. Erinaca mistiko de la pikharaj bestoj.

Kiam erinacoj-homoj vivas en societo, tiam ilian konkordon ĝenas tiuj kompleksoj. La flamiĝon de tiuj emoj repremas iom post iom la sento grupa, la respekto al la aro. Kreskas kontraŭaj kutimoj kaj stariĝas moralo malfavora al egoismo de ĉiu individuo.

Tiun necesaĵon helpas racio por faciligi kunvivadon. Helpas ankaŭ sento. Speco de sankta abomeno ĝeneraliĝas. Ĝi haltigas la deziron mortigi interne de la grupo. Ĝi starigas barilon al troa vanteco kaj troa

krueleco de ĉiu. Dumaniere ĝi agas: en individuo, per kredo kaj kutimo; ĉirkaŭ li, per kolektiva premo de publika opinio kaj leĝaro.

Timo je onidiro, timo je tribunalo, ĉiaj timoj egalas minacon je puno. Honton aŭ bedaŭron, riproĉon aŭ mokon, monpunon aŭ kondamnon.

Ĉio estas penso, ekkrias filozofo. Ĉio estas sento, respondas psikologo. Ĉio estas kutimo, konstatas sociologo. Kiom utilus kontraŭmeti unu al alia realaĵojn fakte miksitajn?[1])

Kune ili konsistigas la ekzistantan moralon. La plej grandaj edukintoj de l' Homaro ĉiam predikis ŝpari tribunalojn kaj kreskigi en ĉiu individuo la personan kunmetaĵon de interna memkritiko, akirindaj kutimoj kaj reganta konvinko.

Nenia juĝistaro, nenia polico sufiĉus por reteni ĉies enviojn, se ilin ne moderigus jam la potenca kutimsentaro de la kolektiva moralo.

Interne de la grupoj, ĝi malakrigis iom post iom la pikilojn de l' individuaj erinacoj. Sed nun pli proksime staras la diversaj homaj aroj pro la rapidiĝo de la komunikiloj. Malvastiĝis la spaco aŭ la tempo por ĝin traveturotaj. Nun la civilize kombitaj erinacoj amasiĝis en gigantajn histrikojn[2]) laŭ la bildo de la Troja ĉevalego aŭ moderna tanko. Ekzistas nun la societo de la histrikoj aŭ pli ĝuste de la dornpikaj grupoj.

[1]) Vidu *Novicov: La morale et l' intérêt,* Paris, Alcan 1912, *Dewey: The nature of human conduct,* New-York, Hall, 1922. *Levy-Bruhl: La morale et la science des moeurs.* Paris, Alcan 1903.

[2]) Histriko estas pli granda besto kun longaj pikharegoj, kvazaŭ dorna porko.

Tiu nova societo de grupoj aŭ aro de aroj ne povas pace vivi alimaniere ol la pli malgrandaj tutoj el kiuj ĝi konsistas. Siavice ĝi devos nepre tondi la pikilojn de la naciaj histrikegoj, strangaj aroj da kombitaj erinacoj, emaj relevi eksteren ĉiujn siajn dornojn, kiam ili stariĝas en kolektivaj buloj unu kontraŭ alia.

Tiu sama distingo inter bono kaj malbono, kiu valoris interne de la kolektivaj buloj, nun valoras ankaŭ por la gruparo. Nur la transiro estas konfuza.

En la nacia patrujo, ĉiujn pikilojn vi klasigas en la fakon pri malbono, se ili leviĝas inter individuoj. »Mortu malamo, rabo kaj mortigo, mortu minaco kaj brutala minaco.«

Sed en la fakon pri *bono* vi klasigas la samajn pikilojn, se ili eksteren leviĝas kontraŭ alia grupo. »Vivu malamo, buĉado kaj venĝo«, se la nacio ricevis ofendon aŭ malkontentigon. Tiam »vivu vanteco, fiero kaj egoismo« de la dorna bloko!

Kio estis kulpa inter anoj de la grupo, tio nun fariĝas virta kontraŭ alia grupo. Kiu rifuzas venĝi kaj malami, tiu pekas kontraŭ patrujo. Amo, pardono, helpo, kompreno aŭ ofero al malamiko, fariĝas krimo kaj perfido al la nacio.

En la regno, dekstrulo kaj maldekstrulo bataladis kaj insultadis unu la alian. Subite okazas la pli vasta konflikto inter ilia lando kaj la ekstero. Jen ili paciĝas kaj interkisiĝas. Kortuŝe. »Vivu pardonemo«.

Nun ili minacas kaj insultas la dekstrulojn kaj maldekstrulojn de la najbara ŝtato. Ankaŭ kortuŝe. »Vivu malamo sankta«.

Ne plu taŭgas tia klasigado. Se viajn plafonojn

vi metas sub komunan tegmenton, necesas akiri ankaŭ komunajn ideojn pri bono kaj malbono.

La plej grava kulpo de la ŝtataj moralistoj kaj pastraroj estis erara konfuzo inter ununombro kaj multnombro. Ne ekzistas nur *unu* patrujo, *mia* patrujo, *la patrujo,* sed *multaj* patrujoj, *niaj* patrujoj, *la patrujaro.* Tute same en nia lando ne estas nur *mi,* sed *ni.*

Se iu kredas posedi moralon eternan, kiel li povas samtempe ĝin subigi al malvasta provizora plafono, limigita en spaco kaj daŭro? Konstante la landlimoj ŝanĝigis dum centjaroj kaj ĉiam nur partojn de la terglobo ili okupis. Rigardu la geografiajn kartojn de la diversaj epokoj. Se la patrujon oni starigas ame kvazaŭ egan personon, tiam ĝi kapablas kunvivi kun aliaj samuloj nur kun la sama konscienco, kiu nepre necesas al individuoj en societo, tio estas sento pri bono kaj malbono, supera al si mem.

Ja materialistoj, ne religiuloj, simple konstatas: al nova grupiĝo, nova moralo; al pli vasta socio, pli vasta etiko.

Kredanto, rifuzanta la pli vastan amon, povus tiam ankaŭ rifuzi la adoron al la nacio, se li volas koni nur homojn, ne arojn. Sed ami limigitan grupon kaj ne la gruparon, tio fatale gvidas al malamo kontraŭ homoj. Ŝovinismo entenas malpli da amo al unu patrujo ol da malamo kontraŭ homoj, amantaj alian patrujon, aŭ kontraŭ samlandanoj, amantaj patrujaron.

»Se vi permesas malamon, tiam lasu nin elekti, kion ni malamu!« ekkriis la forgesitaj ĉeloj, kiuj provis grupiĝon laŭ klaso. Inter unu batalo kaj alia batalo, tiam la premato elektis tiun kampon, kie li

vidis esperon. Por lin refratigi al la patrujo, necesus unue ĝin mem refratigi ekstere kun la ceteraj kaj interne instigi ĝin ami pli frate tiun mizeran duonon, neglektitan kaj suferantan.

Se oni devus kalkuli nure sur bonvolo, tiam nek interna justeco, nek ekstera paco iam atingiĝus laŭ la nuna rapido. Sian brutalan laboron faradas ankaŭ la bezono kaj la ribelo kun la helpo de publika lernado. El interfrapoj kaj zigzagoj elstariĝas la nova moralo.

Ekzistas nur du rimedoj de ŝanĝa kreskado ĉe grupoj, ankaŭ ĉe individuoj. Tion atestas kuracarto kaj psikanalizo tute same kiel sociologio. Unu estas blinda rezisto al la novaj kondiĉoj, kaj rezultanta eksplodo. Morton oni riskas. La dua estas alkonformigo de l' organoj, ideoj kaj sentoj. Malpli riske.

Vi prenis tro multon el tio, kio nun mankas al najbaro. Kiam ekregos lia bezono, kiaj estos la du eblaĵoj? Aŭ vi cedos al li la troaĵon, aŭ li forprenos ĝin de vi, eble kun la resto. Saĝo racia kaj bonvolo profunda montras la unuan metodon por restarigo de l' ekvilibro. La dua signifas batalon. Ĉiutaga realo entenas ambaŭ. La unua plejofte malfruas, kvazaŭ beleta virino pri si mem okupita.

Se la bonvolo plikleriĝus, se la saĝo plivastiĝus, ili kune ludus egan rolon por pasigi la homaron de unu al alia moralo. Ili konformigus individuan egoismon al socia egaleco kaj nacian patrujamon al pli vasta sento. Tiam ĉesus militoj, kiel ĉesis dueloj.

Sed superstiĉo metas lokajn limojn al bonvolo kaj nescio haltigas ja saĝon. Ne multaj homoj demandas la religion de Kristo aŭ la etikon de Budho por gvidi sian voĉdonon aŭ sintenon al la ŝtato. Nur sian

klasan, eklezian aŭ partian pasion ili esprimas kaj ofte ĉiujn tri kune.

Anstataŭ fariĝi milde, adaptiĝo naskiĝas el interbatoj kaj rebatoj. Tiam la nova moralo konservas postsignojn el tio. Arma rezisto kaj ribelo postlasas en la vundoj la venenon de perforto. Niaj idoj ja vivos el stranga miksaĵo de klaskonscio, parte sukcesinta, kaj de patriotismo, larĝigita al kuna tegmento super plafonoj aŭ al kuna ĉielo super tegmentoj.

Tiam la eklezioj, ankaŭ adaptitaj al la nova sento, kredeble helpos ĝin per evoluinta mistiko. La popolanimo estos ĉerpinta komunan moralon homaran el akiritaj kutimoj kaj renovigitaj instruoj. Interbatalintaj elementoj, Ligo de Nacioj kaj sovjetunuiĝo, revolucioj okcidentaj kaj orientaj, budhista veko kaj kristana pento, ĉiu laŭ granda aŭ malgranda partopreno, estos kunfarinta la estontecon.

Grizonda torento ŝaŭmu pro kolero pensante je kristala rivereto. Tamen ambaŭ ne evitos, ke iliaj akvoj troviĝu kunmiksitaj en posta rivero kaj maro. La estonteco ne elektas sian devenon.

Hieraŭ la sankta egoismo ŝajnis idealo. Hodiaŭ ĝi montriĝas danĝero, ĉar ĝi staras ja plurope. Al antaŭa kompreno aldoniĝas plua. Aŭdu Ministron Grandi, parolanta en la nomo de l' faŝista registaro en 1931:

»Je certa momento Italujo, ĵus faronta sian plej grandan nacian klopodon, nomis *sankta egoismo* sian rajton kaj liberecon. Hodiaŭ tiu formulo ne plu kontentigas nian menson tute. La grandeco de nacio mezuriĝas ne nur per la amplekso de la defendotaj avantaĝoj,

sed ankaŭ per la graveco kaj nobleco de la plenumotaj devoj[1])«.

Jam de longe oni parolis pri la rajto de popoloj. Hodiaŭ oni malkovras, ke rajto de unu fariĝas devo de alia. Ni citis jam deklaron de Gandhi: »La angloj estas popolo praktika. Liberecon ili ŝatas por si mem. Ĝin ami ankaŭ por aliaj estas nur paŝo plue.«[2])

Estas fakte la samo, kiel ami ĝin por si mem, ĉar la alia havas propran *sin* tre similan al nia *si* kaj tiom gravan en liaj okuloj. Ni ĉiuj rigardas nur unu saman valoron finfine identan. En tio kuŝas nia iluzio, ke ni kredas ĝin samtempe unusola kaj malsama.

Neniu juĝisto povus rezoni tiamaniere sen risko montri sin partia kaj indignigi la publikon. Li ne vidas miajn interesojn teleskope grandigitaj kaj viajn interesojn ridinde malgravaj. La balancan pezilon li devas teni egale por ĉiuj kaj rigardi ĉiujn interesojn, kiel ĉiuj plendantoj vidas ilin: gravaj por si.

Tio estas nenio alia ol vero scienca. La sento pri justeco estas nura speco de objektiveco. Ignori la rajton de la ceteraj, tio similas kaŝi la kapon sub sablo.

Kiom utilas konservi, pri la graveco de si mem kaj de siaj avantaĝoj, iluzion, kiun ni konsideras erara ĉe najbaroj? Akcepti la vidpunkton de juĝisto estas pli praktike; ankaŭ pli vere.

Kiam oni atingis tion, oni jam ne bezonas eksteran juĝiston, ĉar oni posedas en si mem advokaton de la kontraŭuloj. La regulo pri *fair play*, tiu sporta leĝo,

[1]) *Le Temps*, 16 Mars 1931.
[2]) Vidu ĉapitron XII.

La estonteco apartenos al tiu kredo, kiu preĝos per agoj utilaj al ĉiuj. Kio gravas, tio estas plimultigi la eksperimentojn pri paco kaj justeco. La vortoj mem ne havas eĉ sencon sen apliko viva.

Plej trafe predikas la Kvakeroj aŭ Amikoj, ĉar ili silentas kaj nur agas tiel, kiel ili dezirus, ke ĉiuj agu. Ili ankaŭ ne atendas. Ili tuj komencas. Templon aŭ pastron ili eĉ ne havas, sed ili rifuzas mensogi, ekspluati aŭ militi kaj iras volonte helpi al ĉiaj konstruantoj de pli bona mondo, egale ĉu mahometanoj, ĉu hebreoj, ĉu budhistoj, ĉu sendiuloj. La Samaritanon amas tiuj silentaj kristanoj. Sian ateston ili skribas per spertitaj provoj, akiritaj kutimoj kaj sekvitaj ekzemploj. Pli ol ĉiaj predikoj ĝi efikas.

Kia homo, kia popolo vi volas mem esti? Kian mondon vi deziras kunkrei? Al kia homaro vi sopiras, por tie kunvivi feliĉe kaj egalece? Montru vian ideon per via agmaniero, de progreso al progreso. Jen praktika bazo de tutmonda katekismo por homoj kaj ŝtatoj.

»Granda popolo, skribis Romain Rolland, havas ne nur sian landlimon por defendi... Spirito ne estas la malpli grava parto de popolbieno. La homaro estas simfonio de grandaj kolektivaj animoj. Kiu ne kapablas ĝin kompreni kaj ami alie ol detruante parton de ĝiaj elementoj, tiu montras, ke li estas barbaro.«[1])

Tiu alvoko al la popola konscienco eksonis meze dum la ondego de 1914. Ankoraŭ nun ĝi pravas. Sed apenaŭ ekzistas tia konscio pri komunaj kaj reciprokaj valoroj. Ĝi estas organo kulturinda.

Ĝis nun la respondeco de unu homo limiĝis je sia konduto individua. Kolektiva konscienco plivastiĝos

[1]) *Super la batalo* (1914).

tiujn limojn. Necesos pensi ne nur al unuopaj maljustaĵoj, sed ankaŭ al tiuj faratej are aŭ grupe, kaj al tiuj, kiujn oni profitas, permesante ilin al ceteruloj.

Pasinte de la kampo pri etika racio al la kampo de religia entuziasmo, necesos, por organizi pacon kaj justecon, veki tiom da fervoro kaj oferkapablo, kiom patrujamo tion sukcesis por militoj.

Momenton imagu, kiom oni jam atingus per kvar jaroj da simila sindonado sen la buĉado! Kiel la kristanismo povis konsenti doni sian benon al ĉiaj kontraŭaj nacidefendoj kaj ankoraŭ ne predikis tiun pli urĝan senarman krucmiliton?

La homaj aroj emos al interna justeco kaj ekstera federacio por atingi tuton harmonian. Kiu scias, ĉu ili haltos tie? Progresos ilia moralo. Iam ili sentos ankaŭ la rajton de la bestaro kaj sian devon al tiu najbara mondo. Jam ni amas iujn bestojn. Aliajn ni turmentas. Ĉevaloj estas sklavoj senkompate uzataj.

Vidante, kiom da homoj buĉas aŭtomobiloj ĉiutage sur la stratoj, oni povas ekpardoni nur memorante, kiom da ĉevaloj antaŭe tiradis tro pezajn ĉaregojn.

Kiam ni komprenos ĉian ekzistaĵon kiel ĝi vidas sin mem, tiam la universo jam havos nenion por klarigi al ni kaj ni konscie partoprenos ĝian signifon.

Tiam ni povos mezuri la iluzion de ĉiuj egoismoj, homaj kaj naciaj. Taŭga labordivido postulas ja, ke ĉiu en la mondo plenumu sian taskon individuan kaj aran. Sed necesas bone scii kian taskon. Ĝin plenumi malutilante al ceterulo, sen ia kalkulo pri liaj reagoj, kaj igi tian forgeson ĉefa religio sia, tio estas nur voki militon kaj ĝin antaŭe sanktigi.

Aŭ evoluos patriotismo al ara moralo, kiu igos

la nacion kapabla kunvivi en societo, aŭ ĝin anstataŭos alia formo de kolektiva sento, pli favora al paco. Verŝajne ambaŭ emoj apude kreskos kaj, iom post iom, ili kuniĝos. Ambaŭ estas nur aspektoj de unu fenomeno viva.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA
KUL
Esperanto
513 I